

# IL POPOLO CINIO


中國報道

6 1987





*Gazetkiosko en parko*



*Antaŭ stacidomo*

TRA NIA LENSŌ

## Legantoj sur Stratoj

Fotoj de CAJ MING

Printempe mi revenis al Fuĝoŭ por viziti mian familion. Sur stratoj multaj geknaboj soife legis librojn. Laŭ statistiko, ĉiu loĝanto aĉetas en jaro meze 11 librojn por si. La geknaboj legas ne nur en lernejoj, sed ankaŭ sur stratoj, en parkoj kaj aŭtobusoj.

En la atendejo de la stacidomo iu pasaĝero legis libron, sin apogante sur pakaĵo. Sur placo iu juna handikapulo irante foliumis librojn pri statistiko ĵus aĉetitajn en Librejo por Memlernantoj. Ĉe stando por luigo de infanlibroj ne nur infanoj, sed ankaŭ plenkreskuloj absorbiĝis en legado de bildrakontoj. Iu instruistino, kiu legis vicatendante por fari aĉeton, diris al mi: "La hejmlaboroj okupas min, tial mi devas kapti ĉiun minuton por ion legi."

*En legado*





*Ce librostando  
surstrate*





*Konsultiĝa aktivado pri librolegado*



*Antaŭ afiŝo*

*Malgrandaj legantoj*

Foto de ŬAN JI





## Enhavo

“Malgrandaj reĝoj” de Ĉinio . . . . .	2
Amo ligita kun eduko . . . . .	5
Nova generacio prizorgata de la tuta socio . . . . .	7
SOS-infanvilaĝo en Tjanĝin (Kolora bildoserio) . . . . .	9
VOJAĜO LAŬ JANGZI-RIVERO (6): Ĉe Tongtjan-rivero . . . . .	65
<b>JUBILEA JARO DE ESPERANTO:</b>	
Ĉinaj veteranaj esperantistoj pri la jubilea jaro de Esperanto . . . . .	14
Internacieco de Esperanto . . . . .	16
Varsovio, la kongresurbo de Esperanto . . . . .	19
Tion ni neniam forgesos . . . . .	20
ESP-NOVAĴOJ . . . . .	21
POR KOMENCANTOJ: Parolado de d-ro Strigo; Pavo . . . . .	40
Tropika musona arbaro de Ĉinio . . . . .	55
La naturparko Ŝjiŝuangbanna (Kolora bildoserio) . . . . .	57
Virina skriblingvo nelegebla por viroj . . . . .	24
Ĉinaj akrobatoj viglas en la mondo . . . . .	37
ĈINAJ ARTOJ: Ĉinstilaj pentraĵoj (II) Liberstilaj pentraĵoj (Kolora bildoserio) . . . . .	33
Nova balaistino (Novelo) . . . . .	27
<b>ĈINA LITERATURO:</b>	
Pri la “Dek Naŭ Antikvaj Poemoj” . . . . .	41
El la “Dek Naŭ Antikvaj Poemoj” . . . . .	43
POR VIA SANO: Ok sanigaj ekzercoj (IX) . . . . .	45
Vinujoj de la antikva Ĉinio . . . . .	46
Kian influon havas la klimato sur la socion kaj ekonomion . . . . .	49
ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: La marbordo de Ĉinio . . . . .	52
ĈINAJ POŝTMARKOJ: Poŝtmarkoj pri infanoj (Kolora bildoserio) . . . . .	60
AMUZO . . . . .	64
KARIKATURO . . . . .	64
KURANTAJ AFEROJ . . . . .	61
KORESPONDI DEZIRAS . . . . .	44, 45, 48
SUR LA KOVRILLO: Gajaj mjaŭ-oj . . . . .	Pentraĵo de <b>ĈEN BAJJI</b>
TRA NIA LENSŬ: Legantoj sur stratoj . . . . .	Fotoj de <b>CAJ MING</b>

<b>JARABONTARIFO</b>		Britio	£	8.00	Japanio	Yen	3000	Svisio	SF	25.00	
Aŭstralio	\$A	14.00	Finnlando	Fmk	64.00	Jugoslavio	Din.	500	Usono	US\$	12.00
Aŭstrio	Sch	200	Francio	FF	90.00	Nederlando	Gld.	34.00	Kanado	Can\$	13.00
Belgio	BF	550	Hispanio	Ptas	1200	Nov-Zelando	NZ\$	20.00			
FR Germanio	DM	30.00	Italio	Lit	18000	Portugaliao	Esc	1100			
Por aliaj landoj en Eŭropo:		£	8.00	US\$	10.00	Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:		£	5.00	US\$	6.50

# “MALGRANDAJ REĜOJ” DE ĈINIO

Ami infanon, sendube, estas naturo de la homaro. En parto de la ĉinaj familioj aperis jena fenomeno: La geavoj kaj gepatroj faras ĉion eblan por sia solinfano. Ili ĝojas malgraŭ sia laciĝo pro flegado. Oni timas, ke iutage la ĝojego kondukos al malĝojo.

Jam meze de la 70-aj jaroj Ĉinio alvokis, ke ĉiu paro da geedzoj havu nur unu infanon. Poste, naskiĝis 35 milionoj da solinfanoj. Plejparto el ili kompreneble estas tro amataj kaj dorlotataj. Ili kondutas arogante en la hejmo, infanĝardeno kaj lernejo. Tial oni nomas ilin “malgrandaj reĝoj de Ĉinio”.

Ne malmulte da sociologoj enketis pri solinfanoj. Ankaŭ prudentaj personoj skribis artikolojn pri la afero unuj post aliaj kaj prezentis neignorendajn faktojn kaj pensigajn demandojn. Jen kelkaj ekzemploj.

## “MI HAVAS MONON!”

Ofte okazas, ke en domo de lernejo amasiĝas diversaj objektoj perditaj de lernantoj, ekz. plu-

*Solinĉanoj*



moj, vestoj, ĉapoj, librosakoj kaj elektronaj brakhorloĝoj. La perdintoj ne volas ilin repreni dirante, ke la objektoj ĉiuj estas malnovaj kaj antaŭ longe oni ja devus aĉeti novajn por ili.

Kiam lernejo organizis printempan ekskurson al parko, instruistoj atentigis al la lernantoj, ke ili ne pluku florojn. Iuj infanoj tamen tion faris. Iliaj kunlernantoj avertis ilin, ke pro tio oni punos ilin per mono, kaj la infanoj indiferece diris: “Tute ne gravas, mi havas monon!”

Iu ĉefinstruisto de la tria klaso en elementa lernejo gvidis 16 lernantojn en ekskurso al antaŭurbo. Ĉiuj infanoj kunportis kun si manĝaĵojn. 11 el ili havis stufitajn kokojn kaj viandon, femuraĵojn, frititajn salikokojn kaj aliajn bongustaĵojn. La instruisto ŝerce diris: “Mi proponu kunmeti viajn manĝaĵojn por kunmanĝado, ĉu bone?” Venis komuna opono: “Mi ne prenas alies manĝaĵojn.” “Miaj manĝaĵoj nur por mi mem.” Iuj lernantoj aĉetis ĉiajn bongustaĵojn. Kritikite ili larĝe malfermis la okulojn: “Mi havas monon!”

Iu elementlernejano nomiĝas Mingming. Lia patro estas ŝoforo de ŝtalfabrika kaj lia patrino vendistino de magazeno. Ili estas ordinara laboruloj. Sed Mingming ne estas ordinara. Kiam ili kune vizitis magazenon, la gepatroj aĉetis por sia filo tion, kion li volis. Sukeraĵoj putrigis liajn dentojn. Nova vesto estis uzita de li nur unu fojon, li ja ne plu volis ĝin porti kaj insiste petis alian novan.

En lernejo, tuj post kiam oni donis novan kajeron al Mingming, li kaj liaj kamaradoj ĝin disŝiris por fari ŝipojn kaj raketojn kaj flugigis ilin tra la klasĉambro. Kiam instruisto kritikis lin, li rezolute diris: “Mi aĉetos alian novan.”

## “LA OVO NE HAVAS FENDON!”

Iu lernanto de la kvara klaso loĝanta malproksime de la lernejo kunportas tagmanĝon ĉiutage, senescepte kun kuirita kokovo. Ĉiufoje liaj gepatroj senŝeligas kaj metas ĝin en lian





*La centro de la familio*

ladskatolon. Foje la enmetita ovo ne estis senŝeligita. La lernanto rigardis kaj rigardis ĝin kaj ne trovis fendon sur ĝi. Li ne sciis kiel ĝin senŝeligi. Li do devis ĝin reporti hejmen. La patrino demandis, kial li ne manĝis ĝin. Li diris: "Sur la ovo ne troviĝas fendo, kiel do mi povus manĝi?"

### **POR FESTI OKJARIGON**

La ok-jara Mingming estas la solinfano de familio de tri generacioj. Li ne nur ordonas siajn gevojn kaj gepatrojn, sed ankaŭ agas arogante kontraŭ siaj du kuzinoj. Lia patro diris, ke li estas kvazaŭ grupo inter la kokoj.

Tiu tago estis la oka datreveno de la naskiĝo de Mingming. Matene lia avo diris: "Por ĝojigi la infanon, ankaŭ aĉetu grandan torton krom prepari abundajn bongustajn pladojn." La patri-no tuj ordonis al sia edzo aĉeti festotorton. La familio estis tre okupita pro Mingming.

La familioj de liaj onkloj venis gratuli lin. Ankaŭ liaj kuzinoj estis tre ĝojaj. Tagmeze la granda ronda tablo pleniĝis de varmaj kaj malvarmaj pladoj. "Toston pro la okjariĝo de Mingming!" proponis la avo, la aĝoprezidanto de la festeno. Dum multaj jaroj li ne trinkis en tia

okazo. Tiutage li sentis grandan agrablon. Kun gratulaj vortoj la ĉeestantoj ĉiuj tostis al Mingming.

Dume lia kuzino malĝojiĝis, ĉar la avo neniam gratulis ŝin pro ŝia naskiĝtago. Ŝiaj okuloj pleniĝis de larmoj preskaŭ elruliĝantaj. Mingming laŭte diris: "Lasu, se vi ne volas manĝi, tamen mi manĝas. Dio kreis vin kiel virinon! Mi estas grupo kaj vi koko."

### **NEKUTIMAJ MANĜADO KAJ DORMADO**

Jŭanjŭan estas aminda kun ronda vizaĝo, sed malsanema. Ŝi neniam bone prenas manĝon. En manĝ-tempo ŝi kuras de la gastoĉambro al la dor-moĉambro, de la dor-moĉambro al la kuirejo, kaj la avo postkuras ŝin, imitante bojadon. Nur post tio ŝi ekmanĝas. Se ŝi ne volas manĝi, ŝi do kuras al la necesejo, kaj la avo devas atendi ekstere. La manĝaĵo malvarmiĝas, li do ĝin revarmiĝas. La manĝado daŭras pli ol unu horon. Post la manĝado la avo devas laŭdi ŝin: "Vidu, kiel obeema nia Jŭanjŭan!"

Jŭanjŭan postulas ankaŭ, ke oni frapetu ŝin por ŝia endormiĝo. Iam kaj iam la avo longe frapetas ŝin, sed ŝi ankoraŭ montras malkontenton,



*En vilaĝa infanĝardeno*

do la tuta familio laŭvice faras la samon, iajoje eĉ zumante lulkanton.

### MALKONKORDO

Hanhan difektis la risorton de vekhorloĝo, sed li mensogis, ke tio estis farita de kato. La patro opiniis la filon malhonesta kaj lin batis. Hanhan plorante kuris en la ĉambron de la avino. Informiĝinte pri tio, la avino do batis sian filon, dirante: “Kio grava! Eĉ cent horloĝojn mi povas kompensi.”

Foje, ricevinte la salajron, la patro tuj iris kun Hanhan al restoracio. Ili mendis stufitan kokon, ŝarkan naĝilon, kokobrustaĵon kaj fungojn. Hanhan diris, ke la pladoj estas pli bongustaj ol tiuj preparitaj de la avino. Forlasinte la restoracion, ili iris al infanludejo, poste ili venis al magazeno, kie la patro aĉetis multajn ludilojn por Hanhan. La infano havis tre agrablan tagon.

Reveninte hejmen, Hanhan donis al la avino stakon da fakturoj. La avino kolere riproĉis sian filon: “Vi tre dorlotas la infanon. Kiom da mono vi elspezis por li antaŭtagmeze!”

“Ĉu vi ne dorlotas lin ĉiam? Hodiaŭ mi tion faris ĝuste por vin komprenigi, ke antaŭe mi edukis la infanon nur kun la celo, ke li bonfaru!”

### EL TAGNOTO DE INSTRUISTO PRI SOMERA KAMPADO

Profundan nokton mi deĵoris en koridoro. Subite mi aŭdis bruon en la dormoĉambro de knaboj kaj post momento denove silento. Mi atente observis, ke ne estas kato nek hundo. Ĉu ŝtelisto? Mi eklumigis poŝlampon kaj vidis viron kun litkovrilo sub lito.

“Kiu vi estas?”

“Mi estas la patro de Su Ping. Post kiam li partoprenis en somera kampado, mi kaj mia edzino ne povis dormi trankvile. Eĉ unu tagon antaŭe li ne forlasis nin. Hieraŭ nokte mi songiĝis, ke li falis de sur la lito,” respondis la viro.

“Kial vi kuŝas sur la planko?” mi ne komprenis.

“Mi timas, ke li falos de sur la lito. Mi subtenos lin, se tio okazos.” □



# AMO LIGITA KUN EDUKO

Nuntempe aperas "malgrandaj reĝoj" en ĉinaj familioj, kiuj havas solinfanon. Sociologoj kaj pedagogoj rigardas tion kiel socian problemon kaj senĉese atentigas la publikon, precipe gepatrojn. Mi vizitis tiajn familiojn kaj rimarkis, ke iuj prudentaj junaj kaj mezaĝaj gepatroj ekkomprenis la gravecon de la familia eduko, tial ili penas instrui en la ĉiutaga vivo sian infanon, ke ĝi konduku dece kaj ĝentile.

## EDIFO

Ĝang Nan, 9-jara, estas elementlernejano de la tria klaso. Lia patro laboras kiel oficisto en iu scienc-esplora instituto kaj lia patrino, kiel teknikistino. Iuvespere mi vizitis tiun 3-membran familion. Geedzoj Ĝang Ĵūdōng rakontis al mi, kiel ilia petola solfilo fariĝis elstara lernanto kaj amanto de kaligrafio kaj akordionludo.

Ĝang Nan fariĝis tre petolema en la aĝo de 4 jaroj. Liaj manoj tuŝadis jen ion jen alion. Li, obstina kaj batalema, ofte difektis objektojn. Iam li difektis seruron sur najbara pordo kaj forigis kaŭĉukan valvtubeton de biciklo antaŭ alia pordo. Li kune kun siaj kamaradoj disrompis fenestrovitron en la lernejo. Ju pli malofte oni lin edukis, des pli senbride li agis.

Geedzoj Ĝang vere ne sciis kion fari kun sia petolema solfilo. Ĝuste tiam lia lernejo okazigis renkontiĝon de gepatroj, kiun

ĉeestis ankaŭ la gepatroj de Ĝang Nan kaj estis edifitaj, aŭskultinte rakontadon de iu patro, kiel li kondukis la superfluan energion de sia infano al la ĝusta vojo. Poste Ĝang Ĵūdōng sendis sian filon al iu kurso, por ke li lernu akordionludon. Tio multe interesis la knabon. Ĉiutage, fininte la hejmtaskojn post la lernohoroj, li ludas akordionon anstataŭ petoladi. Ĝang rimarkis, ke la filo ŝatas desegni, li do sendis la filon lerni kaligrafion.

Por havigi al li intereson pri diversaj aferoj, ili akompanis lin al la Muzeo de Naturaj Sciencoj kaj la Muzeo de la Ĉina Historio

aŭ ekspozicio kaj konkurso de kaligrafio, sin amuzis kune kun li, rekomendis al li instruajn librojn kaj inspiris al li amon al muziko. Ili postulis, ke li legu unu artikolon ĉiutage kaj faru unu noton ĉiusemajne.

Geedzoj Ĝang trankviliĝis kaj ĝojis, ke ilia filo fariĝis prudenta kaj ĝentila, kvankam li restas ankoraŭ petolema. La instruistoj tre ŝatas lin. Li ofte per sia akordiono akompanas prezentaĵon en la lernejo kaj plurfoje partoprenis en kaligrafia konkurso de geknaboj de Pekino aŭ ĝia distrikto kaj ricevis multajn laŭdatestojn kaj premiojn. Montrante al mi la premiojn zorge

*La gepatroj de Ĝang Nan festas lian naskiĝtagon.*





*Ĝoŭ Je ludas pianon sub la gvido de sia avino.*

konservitajn, lia patro estis tiel ĝoja, kvazaŭ liaj okuloj ridetus.

### **INSTRUO PER SIA PROPRA EKZEMPLO**

Jam en sia infaneco Ŝeng Ĉjang ricevis bonan familian edukon. Liaj gepatroj dubis, ĉu ilia knabo povos prizorgi ilin, kiam ili fariĝos maljunaj, se li estas dorlotata de sia infaneco kaj zorgas nur pri si mem. Ĉu tiu, kiu ne amas eĉ siajn gepatrojn, povus ami la patrolandon kaj la popolon? Ili do decidis eduki sian solfilon kiel respekti aliajn de la infaneco. Antaŭ Ŝeng Ĉjang ili parolas aŭ faras ion ĉiam kun eduka celo. Ekz., vidinte bongustajn manĝaĵojn aĉetitajn de la patrino, Ŝeng Ĉjang ilin tuj prenis kaj manĝis sola. La patrino diris al li: "Ankaŭ mi ŝatas la manĝaĵojn, sed via avino estas la plej aĝa en nia familio; ni ĉiuj estas pli junaj ol ŝi, do ni devas doni ilin unue al ŝi." Tiel multfoje korektita, Ŝeng Ĉjang kutimiĝis doni bon-

gustajn manĝaĵojn unue al la avino kaj gepatroj kaj poste preni por si, neniam metante sin en apartan pozicion.

Ŝeng Ĉjang vivas en paca kaj harmonia familio. Liaj gepatroj respektas la avinon kaj la lasta ilin tre amas. Neniam liaj gepatroj disputis antaŭ li. Tio iom post iom influis lin kaj havigis al li bonan kutimon kaj mildan karakteron. Li estas pli kapabla ol aliaj infanoj en la vivarangō. Li povas mem lavi la manĝilaron kaj ordometi la vestojn, ŝuojn, ĉapojn, librojn k.a. En la lernejo li respektas instruistojn, harmonie vivas kun kamaradoj kaj enviciĝas inter la elstaraj lernantoj. Li estas saĝa, vigla kaj ankaŭ iom petola.

### **KARESO KAJ SEVERA EDUKO**

Ĝenerale, geavoj tro dorlotas sian solnepon aŭ solnepinon. Sed la avino de Ĝoŭ Je ne estas tia. Mi vizitis ŝin. Ŝi estas afabla kiel ordinaraĵ maljunulinoj kaj

impresis min per memkulturo, memestimo kaj nelacigebleco. El nia interparolo mi informiĝis, ke ŝi devenis de intelektula familio kaj ŝatas legi librojn kaj deklami poemojn. Ŝi faris siajn du filinojn kaj unu filon kapabluloj. La patrino de Ĝoŭ estis elstara studentino de Ĉinghŭa-universitato, nun ŝi laboras eksterlande. Ĝoŭ kaj ŝia kuzo vivas kune kun la avino. Ĝoŭ tre amas sian avinon, kiu ĉiutage rakontis al ŝi rakonton kaj poste ŝi ripetigis. Krome, la avino ankaŭ instruis al ŝi legi kaj pentri. Kiam Ĝoŭ lernis en la unua klaso, ŝi jam sciis legi pli ol mil ideografiaĵojn. Rimarkinte la afekton de Ĝoŭ, la avino, anstataŭ ŝin riproĉi, rakontis al ŝi rakonton, por ke ŝi mem pripensu problemojn. Ĝoŭ kun ŝiaj avino kaj kuzo ofte sin amuzis per vortludo. Ĝoŭ ankaŭ lernis prepari programecojn. Tute egale, ĉu ili estas konvenaj aŭ ne, la avino ilin laŭdis. Ju pli la avino kuraĝigas, des pli la knabino tion volas.

Iafoje Ĝoŭ ne bone ludis pianon, ŝia avino diris kun rideto: "Ne maltrankviliĝu, ne hastu." Post ŝia ludo de iu melodio, la avino tuj diris: "Bone, vi bone ludis, strebu antaŭen!" La knabino ĝojegis.

Ĝoŭ ricevis ĉiufoje plej altan poentaron en ekzamenoj kaj estas fama elstara lernejanino. Tio ligiĝas kun la konvena eduko de ŝia avino. La kompreno kaj konfido de la avino al Ĝoŭ estas amo neanstataŭigebla per io alia. Kun tia amo Ĝoŭ estas tiel gaja kiel birdo kaj sentas sin plena de fido kaj energio. □

### **KOREKTO**

Anstataŭ ALS legu AIDS en la dua kolumno, p. 60, n-ro 2, 1987.



# Nova generacio prizorgata de la tuta socio

En Ĉinio la medioj kaj kondiĉoj por kreskado de la plejparto de la 35 milionoj da solinfanoj diferencas de tiuj de la infanoj en la plurinfanaj familioj, tiel ke la flegado kaj edukado al ili estas iom originalaj. Tion montris la enketo pri la familioj kun 3-7-jara solinfano en Pekino, Ŝanhajo, Kantono kaj Tjanĝin kaj la provinco Anhuj. La enketo montris ankaŭ, ke la novan generacion prizorgas la tuta socio.

## FAVORAJ KONDIĈOJ POR KRESKADO

La nunaj solinfanoj estas aparte prizorgataj de siaj familioj kaj la socio. La solinfanoj kun solinfana atesto, ĝenerale dirite,

ĉiuj ĝuas bonan traktadon en vizito de infanvartejo kaj lernejo, kuracado kaj sanprotektado, loĝado kaj laboro. La enketo montris, ke multaj familioj respondas al la alvoko, ke paro da geedzoj havu nur unu infanon, kaj nur 11% de la familioj malsamopinias pri tio.

Pro tio, ke en la familio estas nur unu infano, li nature estas bone flegata de la familio. Nun en Ĉinio la solinfanaj familioj koncentriĝas en urboj. Inter ili 40.5% de la gepatroj de la solinfanoj estas laboristoj kaj servistoj, 44.2% ŝtatoficistoj kaj 15.3% intelektuloj. Kian ajn laboron havas kaj kiom ajn enspezas la gepatroj de la solin-

fanoj, ili senescepte malavare elspezas por kulturaj siajn infanojn. La familioj, kiuj ĉiumonate enspezas pli ol 200 jŭanojn kaj elspezas pli ol 60 jŭanojn por sia infano, konsistigas 75% de la totala nombro; la familioj, kiuj ĉiumonate enspezas malpli ol 150 jŭanojn, kaj elspezas pli ol 50 jŭanojn por sia infano, konsistigas 43% de la totala nombro. El tio videblas, ke krom la necesaj elspezoj por lupago de domo, akvo, elektro, hejtaĵo ktp., en ĉiu trimembra familio el la gepatroj kaj solinfano la infano jam estas ĉefa konsumanto.

33.3% de la solinfanoj estas favorataj ankaŭ de siaj geavoj. Plejparto de la geavoj regule pli-

*Instruisto instruas radiogoniometrion.*



igas al la infanoj la manĝkoston. Iuj geavoj eĉ pagas por la vestoj de sia nepo aŭ nepino. Estas tre ordinare, ke la geavoj aĉetas por sia nepo aŭ nepino frandaĵojn, ludilojn, librojn ktp. Estas ankaŭ geavoj, kiuj konsentas senkondiĉe subvencii sian nepon aŭ nepinon, se necese.

Ĝenerale la solinfanoj estas bone flegataj. Interalie 81.1% de la solinfanoj estas flegataj en infanvartejoj kaj iliaj gepatroj estas kontentaj pri la flegado kaj edukado. La gepatroj de knabino Sju Ĝing skribis en la enketilo: "Tre konsciaj estas la instruistinoj de la infanvartejo. Ili zorgas kaj la nutradon kaj la edukadon de la infanoj. Nia filino timema ĉiam mallaŭte parolas, tamen la instruistinoj pacience faras demandojn al ŝi, tiamaniere ŝi paŝon post paŝo kuraĝas paroli.

Tamen, la infanvartejoj an-



*Infanoj ludas akordionon en geknaba domo.*

koraŭ ne povas kontentigi la bezonon de la socio. 18.9% de la infanoj ne povas viziti infanvartejon kaj infanĝardenon, tial ili povas esti flegataj nur de dungitaj servistinoj aŭ maljunuloj.

La solinfanoj, ĝenerale dirite, estas bone prizorgataj. La esceptoj estas tre malofte vidataj.

#### **BONA INTELEKTO, NESUFIĈA EDUKADO**

La gepatroj ne nur en la materia vivo plene prizorgas sian solinfanon, sed ankaŭ ĉiamaniere lin klerigas.

Iuj gravedulinoj, kiuj posedas infankulturajn sciojn, konscie faras fetokulturadon, kiaj aŭskultado de muziko kaj radio-disaŭdigo, por sin ĝojigi.

Post la naskiĝo de la infano, la gepatroj plejparte aĉetas por li inteligentajn ludilojn. Kiam la infano fariĝas iom inteligenta kaj eklernas paroli, la gepatroj do akurate instruas sian kerubon. Ili senescepte esperas kiel eble plej rapide saĝigi sian infanon. Alte taksu la fruperiodan edukon de la solinfanoj jam fariĝis ĝenerala socia konscio. Statistikoj montris, ke la familioj, kiuj instruas al sia infano ideografiaĵojn kaj infankantojn, kiam li iom kreskas, konsistigas 70% de la enketitaj familioj; la familioj, kiuj instruas sian infanon lerni

*(Daŭrigo sur p. 13)*

*Lernantinoj de la montregiono Daljangŝan lernas dancarton.*






*Al bazaro*

## SOS-infanvilaĝo en Tjanĝin

Fotoj de LI ĈUNGENG


*Infanoj en lernado*



La Internacia Organizo de SOS-infanvilaĝoj, kiel internacia popola filantropia organizo, estas iniciatita de aŭstria medicina doktoro. La organizo starigis en 77 landoj kaj regionoj 116 societojn kaj pli ol 600 infanvilaĝojn, en kiuj vivas 200 000 orfoj. Ĝi ricevis mondonacon de diverslandaj personoj.

Ĉiu familio en SOS-infanvilaĝo en Tjanĝin konsistas el orfoj kaj virino, kiu dediĉas sian tutan amon al ili. En la vilaĝo la infanoj ĝuas feliĉan vivon.





*Infanoj ludas sur placo antaŭ la infanvilaĝo.*

*Prizorgantino kaj infanoj*





*Prizorgantinoj de SOS-infanvilaĝo*



*Infanoj intimaj kiel fratinoj*







*Kuracistino testas infanon pri lia inteligenteco.*

*Infanliteratura verkistino Jan Tingting (la dua de dekstre) interparolas kun infanoj.*





(Daŭrigo de p. 8)

aritmetikon, konsistigas 60%; la familioj instruantaj sian infanon reciti antikvajn poemojn konsistigas 38%; kaj 24% de ĉiuj familioj instruas sian infanon lerni fremdan lingvon, interalie 15% de la familioj instruas sian infanon lerni pentradon, kaligrafadon, pianludon kaj violonludon kaj fari gimnastikajn ekzercojn. Krom sia laboro, multaj gepatroj dediĉas ankaŭ pli da energio kaj tempo al flegado kaj edukado de sia infano.

Dank' al la socia prizorgo kaj atentema edukado de la gepatroj la sanstato kaj intelekto de la solinfanoj evidente superas tiujn de la infanoj de la plurinfanaj familioj. La enketo montris, ke la solinfanoj estas pli saĝaj, pli sanaj kaj pli viglaj ol la infanoj de la plurinfanaj familioj. La ekzameno montris, ke la meznombra intelekta kvociento de la solinfanoj estas pli ol 110, dum tiu de la infanoj de la plurinfanaj familioj estas inter 90 kaj 100.

Tamen, estas rimarkinde, ke la favora flegado ne povas garantii al la solinfanoj bonkonducon kaj noblan moralon. Kvankam la intelekta kvociento de la solinfanoj estas alta, tamen ekzistas okulfrapaj mankoj en iliaj moralo, karaktero, klereco kaj konduto, kiuj estas multe malpli bonaj ol tiuj de la ordinaraj infanoj. Ĉiuj iliaj gepatroj opinias, ke la solinfanoj estas saĝaj, viglaj, inteligentaj kaj lertaj en posedo de scioj, tamen obstinetaj, elektemaj en manĝaĵoj, egoismaj, timemaj, skizoidaj, dependemaj kaj mallertaj en sinflegado.

### KIEL ĜUSTE EDUKI LA SOLINFANOJN?

Kiel garantii la sanan kreskon de la solinfanoj? Kiel science kulturi la novan generacion? La

problemoj fariĝis urĝe solvendaj de la gepatroj, pedagogoj kaj koncernaj departementoj de la registaro.

Nun la lernejoj de gepatroj (hejmeduka helpa stacio) en grandaj, mezgrandaj kaj malgrandaj urboj estas bonvenaj al la gepatroj de la solinfanoj. Ekzemple, en Ŝanhajo eĉ dum varmega somero multaj gepatroj sciavidaj iras al 1 500 lernejoj dislokitaj en malsamaj distriktoj, gubernioj, lernejoj kaj stratetoj, por akiri sciojn pri eŭgeniko, bona flegado kaj edukado de la infanoj. En Pekino la nombro de tiaj lernejoj nun atingis 500. Ili disvolvas aktivadojn per diversaj metodoj kaj kanaloj kaj en pluraj gradoj kaj donas al la gepatroj fundamentajn teorion kaj sciojn pri la hejmedukado kaj la sperton pri scienca edukado de solinfanoj, por harmoniigi la edukojn hejman kaj lernejan.

El la enketo evidentiĝas, ke multaj gepatroj jam scias, ke tro

da dorloto kondukas la infanojn nur al malbono. Ili jam komencis atente ŝanĝi siajn malĝustajn metodojn por korekti la malbonajn flankojn de la infanoj kaj kulturi al ili memstarecon kaj bonan spiriton.

Ili prezentis al la socio siajn postulojn kaj dezirojn. Iuj deziras, ke la registaro pliiĝu infanvartejojn kaj infanamuzejojn kaj edukajn instalaĵojn por ke la tuta socio alte taksu la edukon de la solinfanoj, aliaj proponis, ke oni multe produkti altkvalitajn intelektajn ludilojn kaj multe eldonu altkvalitajn porinfanajn legaĵojn, kaj triaj esperas, ke la socio liveros al la solinfanoj pli bonajn kondiĉojn de kuracado kaj sanprotektado kaj plibonigos la klerecon de infanartistoj kaj pedagogoj. Krome, iuj esperas, ke la socio kaj koncernaj departementoj dediĉos pli da energio al la esplorado pri la solinfanoj kaj alprenos metodojn por scienca eduki la solinfanojn. □

### En librejo





*Kuracistino testas infanon pri lia inteligenteco.*

*Infanliteratura verkistino Jan Tingting (la dua de dekstre) interparolas kun infanoj.*





(Daŭrigo de p. 8)

aritmetikoj, konsistigas 60%; la familioj instruantaj sian infanon reciti antikvajn poemojn konsistigas 38%; kaj 24% de ĉiuj familioj instruas sian infanon lerni fremdan lingvon, interalie 15% de la familioj instruas sian infanon lerni pentradon, kaligrafadon, pianludon kaj violonludon kaj fari gimnastikajn ekzercojn. Krom sia laboro, multaj gepatroj dediĉas ankaŭ pli da energio kaj tempo al flegado kaj eduko de sia infano.

Dank' al la socia prizorgo kaj atentema edukado de la gepatroj la sanstato kaj intelekto de la solinfanoj evidente superas tiujn de la infanoj de la plurinfanaj familioj. La enketo montris, ke la solinfanoj estas pli saĝaj, pli sanaj kaj pli viglaj ol la infanoj de la plurinfanaj familioj. La ekzameno montris, ke la meznombra intelekta kvociento de la solinfanoj estas pli ol 110, dum tiu de la infanoj de la plurinfanaj familioj estas inter 90 kaj 100.

Tamen, estas rimarkinde, ke la favora flegado ne povas garantii al la solinfanoj bonkondukon kaj noblan moralon. Kvankam la intelekta kvociento de la solinfanoj estas alta, tamen ekzistas okulfrapaj mankoj en iliaj moralo, karaktero, klereco kaj konduto, kiuj estas multe malpli bonaj ol tiuj de la ordinaraj infanoj. Ĉiuj iliaj gepatroj opinias, ke la solinfanoj estas saĝaj, viglaj, inteligentaj kaj lertaj en posedo de scioj, tamen obstinetaj, elektemaj en manĝaĵoj, egoismaj, timemaj, skizoidaj, dependemaj kaj mallertaj en sinflegado.

### KIEL ĜUSTE EDUKI LA SOLINFANOJN?

Kiel garantii la sanan kreskon de la solinfanoj? Kiel science kulturi la novan generacion? La

problemoj fariĝis urĝe solvendaj de la gepatroj, pedagogoj kaj koncernaj departementoj de la registaro.

Nun la lernejoj de gepatroj (hejmeduka helpa stacio) en grandaj, mezgrandaj kaj malgrandaj urboj estas bonvenaj al la gepatroj de la solinfanoj. Ekzemple, en Ŝanhajo eĉ dum varmega somero multaj gepatroj sciavidaj iras al 1 500 lernejoj dislokitaj en malsamaj distriktoj, gubernioj, lernejoj kaj stratetoj, por akiri sciojn pri eŭgeniko, bona flegado kaj edukado de la infanoj. En Pekino la nombro de tiaj lernejoj nun atingis 500. Ili disvolvas aktivadojn per diversaj metodoj kaj kanaloj kaj en pluraj gradoj kaj donas al la gepatroj fundamentajn teorion kaj sciojn pri la hejmedukado kaj la sperton pri scienca edukado de solinfanoj, por harmoniigi la edukojn hejman kaj lernejan.

El la enketo evidentiĝas, ke multaj gepatroj jam scias, ke tro

da dorloto kondukas la infanojn nur al malbono. Ili jam komencis atente ŝanĝi siajn malĝustajn metodojn por korekti la malbonajn flankojn de la infanoj kaj kulturi al ili memstarecon kaj bonan spiriton.

Ili prezentis al la socio siajn postulojn kaj dezirojn. Iuj deziras, ke la registaro pliigu infanvartejojn kaj infanamuzejojn kaj edukajn instalaĵojn por ke la tuta socio alte taksu la edukon de la solinfanoj, aliaj proponis, ke oni multe produktu altkvalitajn intelektajn ludilojn kaj multe eldonu altkvalitajn porinfanajn legaĵojn, kaj triaj esperas, ke la socio liveros al la solinfanoj pli bonajn kondiĉojn de kuracado kaj sanprotektado kaj plibonigos la klerecon de infanvartistoj kaj pedagogoj. Krome, iuj esperas, ke la socio kaj koncernaj departementoj dediĉos pli da energio al la esplorado pri la solinfanoj kaj alprenos metodojn por scien-  
ce eduki la solinfanojn. □

### En librejo



# ĈINAJ VETERANAJ ESPERANTISTOJ PRI LA JUBILEA JARO DE ESPERANTO

*Petite de nia redakcio, iuj veteranaj esperantistoj de nia lando verkis artikolojn omaĝe al la jubilea jaro de Esperanto en la lastaj sinsekvaj monatoj. Ili, famaj erudiciuloj kaj profesoroj, esprimis en siaj artikoloj profundan amon al nia lingvo. Ilia entuziasmo por Esperanto estas neniom malfortiĝinta. Ili, plenaj de fido pri la brila perspektivo de Esperanto, alte taksas ĝian rolon en la batalo por la mondpaco kaj homa progreso. Ĉi-sube ni aperigos resume iliajn artikolojn.*

— La Red.

## Esperanto — parto de la homa kulturo

de TANG ĜONGJAN\*

Post centjara praktiko Esperanto sendube fariĝis promesplena internacia lingvo. Dum la centjara praktiko Esperanto ne nur tenis la elementan strukturon de sia gramatiko projektitan de ĝia kreinto, sed ankaŭ asimilis la esencan kaj racian parton de diversaj naciaj lingvoj. Tiel ĝi fariĝis lingvo plej facile lernebla, plej logika kaj plej esprimoriĉa. Precipe pro tio, ke en sia centjara praktiko Esperanto jam metis solidan bazon en la homaro, ĝi

estas ne nur artefarita lingvo projektita de iuj lingvistoj, sed ankaŭ viva lingvo uzata en parolado kaj verkado kaj diferenciĝas esence de la aliaj lingvoj subjektive projektitaj. La sukcesoj de Esperanto en la cent jaroj post sia naskiĝo ja fariĝis brilega konsistiga parto de la homa kulturo.

*\* Tang Ĝongjan estas honora konsilisto de la Ĉina Tradukista Asocio kaj profesoro de la Hebej-a Instruista Instituto.*



Tang Ĝongjan

Ŭej Hŭangnu



## Esperanto kondukis min sur la brilan vojon

de ŬEJ HŬANGNU\*

Dum preskaŭ duonjarcento mi tenis profundan amon al Esperanto. Pere de ĝi mi konis la orienteŭropajn literaturojn, precipe la ĉeĥoslovakajn, en mia juneco, kaj sekve de tio mi iom post iom konis la rusan literaturon kaj la rusan lingvon. Mi povas diri, ke la perilo, kiu kondukis min sur la revolucionan vojon en la malnova socio, antaŭ ĉio estas Esperanto. Ĝi larĝigis mian vidkampon. Re-

trorigardante la pasintecon, mi forte sopiras al la tri veteranaj esperantistoj Hŭang Zunŝeng, Venlo Fon kaj Eltunko, kun kiuj mi konatiĝis en la tridekaj jaroj. Mi sopiras al ili ne nur pro ilia helpo kaj stimulo al mi, sed ĉefe pro ilia granda kontribuo al la Esperanto-movado.

*\* Ŭej Hŭangnu estas profesoro de la Pekina Universitato.*



# Esperanto intime rilatas kun la paco kaj progreso de la homaro

de ŬANG ĜONGFANG\*

Esperanto kreita de Doktoro Zamenhof ja disvastiĝis en pli ol 90 landoj en la pasintaj cent jaroj kaj ludas pli kaj pli gravan rolon en la homa kontakto. Tio estas ne nur sukceso de la lingvo, sed ankaŭ granda frukto en la batalo por paco, amikeco kaj progreso.

Mi esperantistiĝis en Jan'an. Jam pasis 50 jaroj, de kiam Esperanto enkondukiĝis en Jan'an en 1937. En la 50 jaroj Ĉinio akiris grandajn sukcesojn en la nacia sendependeco, ekonomia disvolviĝo, socia progreso

kaj popola feliĉo. Multe progresis ankaŭ la ĉina Esperantomovado. Tio pruvis, ke ĉu en Ĉinio, ĉu en la tuta mondo la disvastiĝo de Esperanto intime ligiĝas kun la deziro kaj batalo de la homaro por paco, progreso kaj feliĉo. La progreso de Ĉinio kaj la mondo akcelas la disvastigon de Esperanto, kaj la disvastigo de Esperanto siavice akcelas la progreson de Ĉinio kaj la mondo.

*\* Ŭang Ĝongfang estas prezidanto de la Ĉina Asocio de Jura Scienco.*



*Ŭang Ĝongfang*

# Brilan perspektivon al Esperanto

de CEN ĈJISJANG\*

Esperanto havas koncizan kaj racian sistemon kaj ankaŭ enkorpiĝas la noblan spiriton de la homaro. Ĝuste pro tio, tuj post ĝia kreiĝo diverslandaj personoj

ĝin komencis lerni unuj post aliaj kaj ĝia influo plivastiĝis tagon post tago. Sekve, proporcie al la disvolviĝo de ĉiuj aferoj, la radikoj kaj uzablaj vortoj de Esperanto pli-ol-naŭobliĝis. Ĝi aplikiĝas preskaŭ en ĉiuj kampoj. Lokaj Esp-asocioj aperas kiel bambuido post printempa pluvo. Multaj altlernejoj funkciigas Esperantokurson. En iuj landoj kaj regionoj oni fondis Esperantajn kolegiojn kaj institutojn por elkulturi fakajn esperantistojn, kiuj estas honoritaj per la titolo magistro aŭ doktoro.

La rapida disvolviĝo kaj granda influo de Esperanto dum la pasintaj sinsekvaj jaroj ŝajnis al ni nekredeblaj. Sed post pripensado ni venis al la konkludo, ke tio estas nepra konsekvenco de la disvolviĝo de la aferoj. Ni rememoru: ĉu la klasika latina lingvo ne estis la komuna lingvo de la eŭropaj feŭdismaj erudi-

ciuloj en Mezepoko? Nun multe ŝanĝiĝis la epoko. La vekiĝintaj popoloj bezonas lingvon kiel sian batalilon, kiu certe ne estas la klasika latina lingvo, nek iu alia moderna lingvo, sed Esperanto mem.

Ĉi jaro estas la centa datreveno de la naskiĝo de Esperanto. Dum la centjaro Esperanto disvolviĝis ne glate. Unue ĝi devis batali kontraŭ ĉiuj kalumnioj kaj la intenco sufoki ĝin. Due estis iuj, kiuj ne konvinkiĝis pri la rolo de nia lingvo kaj klopodis krei iun alian lingvon kontraŭ Esperanto. Kvankam oni ne povas antaŭvidi, ke ne plu okazos io simila en la estonteco, tamen ni devas deziri al la lingvo brilan perspektivon kaj longan vivon!

*\* Cen Ĉjiŝjang estas filologo kaj profesoro de la Pekina Universitato.*

*Cen Ĉjiŝjang*



# INTERNACIECO DE ESPERANTO

de IVO LAPENNA\*

Ekde sia naskiĝo en 1887 Esperanto suferis pro diversaj malsanoj: ĝin atakis la ido-krizo, la jam kronikaj riproĉoj pro la "ĉapelitaj" literoj, la sterilaj diskutoj, eĉ disputoj, ripetiĝantaj de tempo al tempo, pri demandoj jam delonge solvitaj, ekzemple pri la kristale klaraj pasivaj participoj, k. a. La fakto, ke la zamenhofa Esperanto bazita sur la Fundamento povis venki tiujn malfacilaĵojn kaj atingi sian centan jaron kiel alte evoluinta kaj socie enradikiĝinta lingvo, montras ĝian internan fortikecon kaj funkciajn adekvatecon. Evidente, ne la lingvo bezonis kuracilojn, sed la pseŭdokuracistoj-reformemuloj erare diagnozis kaj per tiuj falsaj diagnozoj tamen kaŭzis al ĝi multe da malbonoj.

Ankaŭ nuntempe la perfekte sana Esperanto estas viktimo de malsanaj teorioj, el kiuj almenaŭ du estas gravaj.

Unu estas la t.n. planlingvismo, kies protagonistoj, ne komprenante la socian karakteron de la lingvo, malkapablas distingi inter mortnaskitaj lingvoprojektoj, unuflanke, kaj Esperanto, la vivanta lingvo de monde internacia lingva komunajo, aliflanke. Per tiu kontraŭscienca identigo ili ege malutilas al Es-

peranto kaj bremsas ĝian pluan disvastiĝon. Tiun demandon mi jam pritraktis tiel vaste, ke mi ne emas diri pri ĝi unusolan plian vorton.

La alia malsano, fakte erara diagnozo, estas la kvazaŭe tro "eŭropeca" karaktero de Esperanto, ĝia kvazaŭa konformeco al "eŭropaj lingvokutimoj", k.s. Pri tio aperis nombro da artikoloj en la Esperanto-gazetaro, laste eĉ en la organo de UEA de decembro 1986 sub la stranga titolo "Lingvikaj Vortoj en Esperanto" (p. 211). Tial necesas dediĉi kelkajn vortojn al tiu demando.

Inter diversaj fantaziaj proponoj elstaras tiu pri la anstataŭigo de vaste internaciigintaj grekdevenaj aŭ latindevenaj vortelementoj per "pure Esperantaj" strukturoj por igi la lingvon kvazaŭe pli facila kaj tial pli akceptebla por la popoloj de Azio kaj Afriko. Ne estas dirite kio restus en la vortaro de Esperanto post tiu "purigo", se ĝi entute estus ebla. La tutan absurdecon ilustru unusola ekzemplo. Se, kiel sugestite, oni anstataŭigus la grekdevenajn **tele kaj fon** per la "pure Esperantaj" (!) **distanc kaj son**, **telefono** fariĝus **distansono**, do vorto per si mem tiel multsenca, ke estas pli ol dubin-



La aŭtoro

de, ĉu kiu ajn esperantisto en la mondo povus kompreni, ke ĝi signifas **telefono**. Krome, per tiaj akrobataĵoj oni nur anstataŭigas la grekdevenajn **tele kaj fon** per la latindevenaj **distanc kaj son**. Se oni konsekvence aplikus tian "plian internaciigon" al la tuta vortprovizo (kaj, aldone, ĉiu farus tion laŭ sia propra gusto), 100 jaroj de Esperanto-kulturo estus komplete perditaj kaj la lingvo mem transformiĝus en ian nekompreneblan groteskaĵon, kio siavice signifus ĝian finon.

## KION SIGNIFAS EŬROPAJ LINGVOJ?

La termino "eŭropaj lingvoj" kiel uzata de la nunaj pseŭdokuracistoj-reformemuloj, estas duoble erara el lingvistika kaj duoble el geografiaj vidpunktoj. Ĝi estas ankaŭ grave misgvida, ĉar ĝi povus kredigi personojn neinformitajn pri la lingva situacio en Eŭropo, ke sur tiu kontinento troviĝas unusola, eŭropa, lingva familio kun lingvoj similaj unu al alia, kiel ovo al ovo, kaj tial kun samaj "lingvokutimoj", kaj,



plue, ke tiu neekzistanta lingva familio estas limigita nur al Eŭropo. Ĉio ĉi pli ol malĝusta kaj konfuza!

Ne enirante en lingvosciencajn detalojn, ni nur memorigu pri kelkaj tiurilataj esencaj faktoj:

(I) **Historia kriterio.** La plimulto de la lingvoj en Eŭropo apartenas al la hindeŭropa lingva familio. Kiel la nomo mem indikas, tiu familio ne estas nur "eŭropa", sed ankaŭ "azia" pro la historie kaj kulture gravaj hinda kaj irana branĉoj. Siavice, la eŭropa parto de tiu familio konsistas el pluraj multrilate tre malsamaj lingvoj, inter kiuj troviĝas la latinida, la ĝermana kaj la slava, ĉiu el ili kun subdividoj en grupoj de memstaraj lingvoj kaj sennombraj dialektoj. Ekster tiuj branĉoj troviĝas la greka kaj albana en Eŭropo kaj la armena ĉefe en Azio.

La alia lingva familio en Eŭropo estas la finno-ugra, sed ankaŭ ĝi estas parte "eŭropa" kaj parte "azia". En Eŭropo troviĝas la finna, estona kaj hungara, kaj en la orienteŭropa parto de la Soveta Unio kelkaj lingvoj de relative malgrandaj komunajoj. Estas menciinde, ke la vaska en la Pireneoj troviĝas ekster tiuj familioj kaj havas iajn parencajn trajtojn kun la lingvo de Kaŭkazio. Pri kiuj, do, "eŭropaj lingvoj" oni skribas kaj parolas, se oni klasifikas ilin laŭ la parenceca aŭ historia kriterio?

(II) **Nuna geografia etendiĝo.** El vidpunkto de la leksika internacieco de Esperanto eĉ pli grava estas la nuntempa geografia etendiĝo de kelkaj el tiuj t.n. "eŭropaj lingvoj". Efektive, la angla, hispana, portugala, franca kaj rusa estas ne nur la komunaj naciaj lingvoj de la respektivaj

landoj en Eŭropo, sed tiu aŭ alia el ili ankaŭ en ambaŭ Amerikoj kaj Aŭstralazio, parte eĉ en Afriko kaj Azio. Tio vastege transpasas la limojn de Eŭropo. Tial ankaŭ el vidpunkto de la aktuala situacio estas malĝuste aserti kaj kredigi, ke temas pri iuj "eŭropaj lingvoj", geografie limigitaj nur al Eŭropo.

(III) **Morfologia kriterio.** La malsamecoj inter la lingvoj de Eŭropo, eĉ en la sama hindeŭropa familio, estas morfologie grandegaj. Ekzemple la franca kaj angla havas analizan strukturon kun deklinacio iom simila al tiu de Esperanto, dum la rusa, kroata kaj aliaj lingvoj, inkluzive la latinan, estas strukture sintezaj. La rusa aŭ kroata aŭ simila fleksia lingvo havas plurajn regulajn deklinaciojn kaj multnombrajn neregulajn kun sep kazoj por tri gentoj en singularo, sep en pluralo kaj sep en dualo, kiu lasta ne rilatas nur al "du aferoj", kiel indikite en "Plena Ilustrita Vortaro", sed ankaŭ al tri, kvar kaj ambaŭ. Similajn trajtojn havas la konjugaciaj reguloj. Verŝajne ne estas troigo diri, ke, ekzemple, por franclingvano ne estas pli malfacile ellerni la ĉinan aŭ japanan, ol la rusan aŭ kroatan. Kie, do, estas la "eŭropeco" de la lingvoj de Eŭropo, se oni klasifikas ilin laŭ la morfologia kriterio? Ankaŭ tiu aspekto estas grava el vidpunkto de la internacieco, tial ankaŭ facileco de Esperanto por ĉiuj popoloj, kiel montriĝos en la lasta parto de tiu ĉi artikolo.

(IV) **"Eŭropaj Lingvokutimoj".** Granda eraro estas pensi, ke ekzistas iaj komunaj "eŭropaj lingvokutimoj". Fakte, la lingvokutimoj eĉ de lingvoj tiel proksimaj, kiel la serba kaj kroata, aŭ la angla, usona kaj aŭstralia variantoj de la angla

estas kelkrilate tre malsamaj. Unu el la problemoj, kiujn frontis Zamenhof en la komencaj stadioj de Esperanto, estis ĝuste liberigi ĝin de kia ajn nacia lingvokutimo, t.e. stilo. Sufiĉas memorigi liajn saĝajn vortojn en unu el la "Lingvaj Respondoj": "La stilo Esperanta ne imitas blinde la stilon de aliaj lingvoj, sed havas sian karakteron tute **specialan kaj memstaran**" (substreko de Zamenhof). Kaj li donis ekzemplon per teksto korekta laŭ la Fundamento, sed tamen nekomprenebla, ĉar skribita sub la influo de ruslingva stilo, do de stilo en "eŭropa" lingvo! Daŭris sufiĉe longe antaŭ ol Esperanto, dank' al Zamenhof kaj al aliaj grandaj pioniroj atingis ankaŭ tiurilate aŭtonomecon. Oni fine komprenu, ke la "lingvokutimoj" en **Bona Esperanto** estas nek eŭropaj, nek aziaj, nek ĉinaj aŭ japanaj, nek anglaj aŭ rusaj, sed aŭtonomaj internacilingvaj, formiĝintaj dum la 100-jara ekzistado de Esperanto kaj nuntempe firme enradikiĝintaj. La komencantoj kaj precipe la "eternaj komencantoj" devus ellerni kaj praktiki tiun aŭtonoman Esperanto-stilon kaj ne provi altrudadi siajn nacilingvajn kutimojn. Eĉ memlernantoj povas facile atingi tion per legado de stile bonaj libroj kaj periodaĵoj, inkluzive de "El Popola Ĉinio", "Oomoto" kaj aliaj publikigitaj en aziaj landoj.

### TRI ELEMENTOJ DE INTERNACIECO

Tiuj klarigoj pri la objektiva neekzisto de lingvistike parencaj kaj geografie limigitaj "eŭropaj lingvoj", kiel ankaŭ pri la for-esto de kiaj ajn komunaj "eŭropaj lingvokutimoj", implice montras, ke Esperanto ne estas, nek povas esti "tro eŭropeca".

Sed tio per si mem ne pravas ĝian internaciecon.

En kio, do, ĝi konsistas?

Tiun demandon mi pritraktis en miaj verkoj “Retoriko”, “Elektitaj Paroladoj” kaj “Esperanto en Perspektivo”, kiel ankaŭ en multaj artikoloj kaj prelegoj. La konkludo estas, ke, laŭ mia opinio, la internaciecon de Esperanto determinas tri esencaj elementoj: interna strukturo, socia portanto kaj celo.

**(I) Strukturo.** La internacieco de la strukturo konsistas ne sole el maksimume internacia radikaro, sed el la tuto de la radikaro, gramatikaj reguloj, prononco kaj skribo. La gvidprincipoj de Zamenhof estis internacieco kaj facileco, inter si kunligitaj, ĉar maksimuma internacieco samtempe signifas maksimuman facilecon. Intuiciegenie li ne nur selektis, sed ankaŭ ordigis tiun internacian lingvo-materialon, kiun kreis la homa socio en la daŭro de sia evoluo, precipe en la lastaj du jarcentoj antaŭ la publikigo de la unua lernolibro en 1887, kaj spektakle daŭrigata post tiu jaro. La teknologia progreso ĝenerale kaj speciale la evoluo de la teknikaj rimedoj de komunikado ebligis internacian komercon, intelektajn interŝanĝojn kaj ĉiaspecajn aliajn internaciajn kontaktojn. Tion notis ankaŭ Marx kaj Engels jam meze de la 19-a jarcento. Kadre de tiu evoluo kreiĝis kaj plu kreiĝas kreskanta nombro da internaciaj vortoj. Ili estas internaciaj ne tial, ĉar ili devenas el la antikva greka aŭ latina aŭ el kiu ajn alia lingvo (parenteze: el kiuj fontoj ili eniris en tiujn lingvojn?), sed tial, ĉar ili fariĝis leksika parto de tre multaj lingvoj. En iuj pli multe, en aliaj malpli aŭ neniel. Tio estas la senco de la regulo

15-a de la Fundamento. En Esperanto ili estas aŭtonomaj kun siaj propraj formoj kaj precize difinitaj sencoj, kiuj ne ĉiam estas identaj kun la formoj kaj sencoj en iu aŭ iuj naciaj lingvoj. La t.n. “falsaj amikoj”, t.e. uzo en Esperanto de internacia vortradiko en nacilingva formo aŭ kun nacilingva senco, estas karakterizaj por esperantistoj, kies lingvoj asimilis internaciajn vortojn, ne por tiuj, kies lingvoj ne asimilis ilin, ellerni Esperantan vorton kaj ĝian sencon estas pli facile, ol forgesi alian sencon aŭ formon, kiun ne malofte la sama internacia vorto havas en tiu aŭ alia propra nacia lingvo. Se, kun tiu rezervo, Esperanto laŭ sia radikaro estas pli proksima al iuj nacioj ol al aliaj, ĝia aglutina karaktero faciligas la lernadon al tiuj personoj, kies lingvoj havas la saman aŭ similan aglutinan karakteron kaj, post iom da familiariĝo, fakte ankaŭ al ĉiuj aliaj. Fine, el fonetika kaj ortografia vidpunktoj Esperanto estas familiara por tuta aro da nacioj, kiuj havas en siaj lingvoj la samajn sonojn kaj fonetikan skribmanieron, malpli por aliaj.

Se oni prenas en konsideron ĉiujn ĉi aspektojn kune, Esperanto objekte estas maksimume internacia ne el vidpunkto de tiu aŭ alia popolo aŭ grupo da popoloj, sed el vidpunkto monda.

**(II) Socia portanto.** Ĉiu lingvo apartenas al iu socia grupo: tribo, hordo, gento, klaso, kasto, religio ktp., nuntempe ĉefe nacio. Ekde la komenco Esperanto estis kaj fariĝis ĉiam pli internacia ankaŭ laŭ sia socia portanto. Ĝi ne estas unu nacio aŭ unu socia tavolo, sed kolektivo konsistanta el apartenantoj de tre multaj nacioj, potencie de ĉiuj, kaj de ĉiuj sociaj tavoloj.

Kiel konate, Zamenhof tuj, samtempe kun la publikigo de la unua lernolibro, forcedis ĉiujn personajn rajtojn je la lingvo kaj lasis la pluan evoluon de Esperanto en la manoj de la lingvo-uzantoj, de la popolo mem. Tiu demokrata sinteno kaŭzis, ke la esperantistoj ĉiam sentis Esperanton kiel sian propran, ne kiel fremdan lingvon. En la unua jarcento de la Internacia Lingvo apartenantoj ne de unu popolo, sed de tre diversaj nacioj alportis sian parton al la ĉiuflanka riĉiĝo de la lingvo kaj al ĝia socia enradikiĝo. La mastro de la Internacia Lingvo estas la tutmonda esperantistaro.

Tiu fakto kaŭzas ankaŭ pozitivan psikologian flankefikon: oni pli amas kaj pli facile majstras sian propran lingvon, ol fremdan. Mi mem rilatas same emocie al mia regiona dalmata dialekto, al mia nacia kroata lingvo kaj al mia Internacia Lingvo. Mi fidas, ke la grandega plimulto de la esperantistaro havas la samajn sentojn koncerne siajn respektivajn dialektojn, naciajn lingvojn kaj Esperanton.

Estante intelekta proprieto de monde internacia kolektivo, Esperanto estas la sola vere internacia lingvo ankaŭ laŭ tiu plia decida kriterio. La diversaj projektoj de komuna lingvo por internaciaj rilatoj estas kaj restas projektoj, dum la naciaj lingvoj, eĉ se parte uzataj kiel helpaj en internaciaj rilatoj, estas kaj restas naciaj.

**(III) Celo.** Fine, Esperanto estas internacia laŭ siaj idea fono kaj celo, al kiu ĝi servas. Ĝi ne estas, nek povas esti instrumento de intelekta, ekonomia aŭ alispeca regado de unu nacio aŭ grupo da nacioj super la aliaj, sed ilo de libera interhoma komunikado je avantaĝo de la



# VARSOVIO, LA KONGRESURBO DE ESPERANTO

La hieraŭo, nuno kaj estonto de la lingvo Esperanto estas forte ligitaj kun Varsovio. Ĝuste tie en 1873 ekloĝis la 14-jara Ludoviko Zamenhof. En ĉi tiu urbo maturiĝis liaj pensoj pri la Internacia Lingvo, kies frukto — la “Unua Libro” — estis presita en privata presejo ĉe la ekzistanta ĝis nun strato Nowolipie. Malgraŭ oftaj forveturoj al aliaj urboj kaj eksterlanden, Zamenhof ĉiam revenadis al Varsovio por vivi, labori kaj agadi. Li mortis la 14an de aprilo 1917 kaj estis enterigita en la varsovia juda tombejo. Kiel vi vidas, estas multaj kaŭzoj, pro kiuj la 29a Universala Kongreso en 1937 (50-jara jubileo de Esperanto) kaj la 44a UK en 1959 (100a datreveno de Zamenhof) okazis en nia urbo. Pro tiuj samaj kialoj, Varsovio gastigos ankaŭ la 72an UK en 1987 okaze de la Centjara Jubileo de la Internacia Lingvo.

La hodiaŭa ĉefurbo de Pollando nombras pli ol 1.7 milionojn da loĝantoj. Nur en la sepdekaj jaroj ĝi akiris la staton de antaŭ la hitlera okupacio, kiu portis

morton al proksimume 700 000 varsovianoj. La tragika historio de la Dua Mondmilito grave decidis ankaŭ pri la nuna aspekto de la urbo: post la detruo oni fidele rekonstruis la plimulton de la antikvaj konstruaĵoj, i.a. la tutan Malnovan Urbon kaj la Reĝan Kastelon.

De apud la Reĝa Kastelo ni komencu la vizitadon de Varsovio. Antaŭ la ruĝmura, granda konstruaĵo staras la plej malnova el la neekleziaj monumentoj de la urbo — kolono de la reĝo Sigismondo la Tria, kiu en 1596 — 1611 translokiĝis la ĉefurbon de Pollando el Krakovo al Varsovio. De tie laŭ la Świetojańska strato, preterpasante survoje la Katedralon de la Sankta Johano, ni atingas la Placon de la Malnova Urbo. Ĝi estas loko tre ŝatata de varsovianoj kaj turistoj, kiuj povas viziti tie multajn muzeojn, vendejojn kun memoraĵoj, kafejojn, restoraciojn aŭ la faman vinejon de Fukier. Laŭlonge de Barbakano, restinta parto de la mezepoka defendkonstruaĵo, oni alpromenas la t.n. Novan Urbon, rekonstrui-



*La Reĝa Kastelo en Varsovio*

tan en la stilo de la 18a- kaj 19a-jarcenta arkitekturo. Sur la proksima Krasinścy-placo videblas Palaco de la Respubliko, en kiu troviĝas nun parto de la kolekto de la Nacia Biblioteko.

Alia rekomendinda vojo de la promeno estas la Reĝa Itinero. Ĝi komenciĝas sur la Kastela Placo kaj kondukas al la apudurba Wilanów, kie valoras viziti belan barokan palacon el la 17a jc., iaman rezidejon de la reĝo Johano la Tria Sobieski. La Reĝan Itineron konsistigas la strato Krakowskie Przedmieście, ĉe kies flankoj oni preterpasas multajn interesajn preĝejojn kaj


tuta homaro kaj de ĉiuj ĝiaj partoj. Esperanto lingve konkretigas la ideon de la plej nobla humanismo kaj de la plej vasta, tuthomara internaciismo.

\* \* \*

La tuto de la tri preparolitaj

elementoj de internacieco donas plenan signifon al la nomo mem “Internacia Lingvo”, sub kiu aperis la unua lernolibro en 1887, kaj al la moto presita sur ĝia kovrilpaĝo: “Por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas nomi ĝin tia.” □

*\* La aŭtoro estas esperantologo, membro de la Akademio de Esperanto kaj eksprezidanto de UEA. Laŭ nia peto li dediĉis sian artikolon memore al la 100-jara jubileo de Esperanto.*



*La Palaco sur Akvo en la parko Łazienki (18-a jc.)*

historiajn konstruaĵojn, ekz. la Varsovian Universitaton, la Akademion pri Belartoj, sidejon de la Pola Scienc-Akademio. Plue sekvas la strato Nowy Świat kun novklasikismaj domoj, en kiuj troviĝas librovendejoj, aĉetejoj de antikvaĵoj ktp. Laŭvica parto de la fama itinero estas la avenuo Ujazdowskie, najbaranta kun la plej belaj varsoviaj partoj. El inter ili precipe admirinda estas Łazienki,

kun multaj pontetoj, skulptaĵoj belega verdaĵo kaj la Palaco sur Akvo. Tiu ĉi konstruaĵo estis privata rezidejo de la lasta pola reĝo, Stanislaŭo Aŭgusto Poniatowski, kaj oni konsideras ĝin unu el la plej belaj 18a-jarcentaj someraj rezidejoj en Eŭropo.

Ĉiudimanĉe dum somero la parko Łazienki sonas per muziko de Frederiko Chopin. Aŭskultantoj sidas ĉirkaŭ la originala monumento de la komponisto;

apud ĝi ludas konataj pianistoj. La dimanĉaj muzikaj koncertoj rememorigas pri Zelazowa Wola — naskiĝloko de la plej fama el la polaj komponistoj. Indas viziti ĝin dum semajnfina ekskurso apud Varsovio (58 km.). La verko de Chopin ĉeestas ankaŭ riĉan internacian movadon de nia urbo. Krom la mondfama muzika konkurso pri la muziko de Chopin okazadas tie “Varsovia Aŭtuno” — Festivalo de la Nuntempa Muziko kaj la konata ĵaza ĵamboreo.

En la kultura vivo de la ĉefurbo gravan rolon ludas du imponaj konstruaĵoj. La unua estas Teatro la Granda, en kies proksimo staras du monumentoj, simboloj de la heroa historio de la urbo (Varsovia Nike kaj Tombo de Nekonata Soldato). La dua konstruaĵo estas Palaco de Kulturo kaj Scienco. Ĝi havas 234 metrojn de alteco kaj ampleksas kinejojn, teatrojn, muzeojn kaj dekojn da aliaj ĉambregoj. Ĝuste en salonoj de la Palaco kongresos la esperantistaro en la 100-jariĝo de Esperanto. □

**DONALD J. HARIOW** (Usono):

## TION NI NENIAM FORGESOS

—Memore al prof. S. J. Zee

Estis por mi granda honoro, ke mi povis unu fojon renkontiĝi kun la konata ĉina esperantista poeto prof. S. J. Zee dum mia vizito en Ĉinio okaze de la 71-a UK. La vizito, kiu okazis nokte en Ŝanhaja malsanulejo, estis mallonga, sed mi sentis min tre kontenta, ke mi povis almenaŭ omaĝi la solan ĉinan poeton en la unua eldono de “Esperanta Antologio” kaj la tradukinton kaj kompilinton de “El Ĉina Poezio”.

Por mi, tiu lasta verko estas aparte grava, ĉar ĝi unue prezentis al mi la veran ĉinan poezion. Mi antaŭe renkontis kelkajn ĉinajn poemojn, sed ili — ĝenerale elektitaj kaj tradukitaj de denaskaj anglalingvanoj — ŝajnis al mi interesaj esoteraĵoj, kiuj montris la ĉinojn kiel foran kaj strangan popolon. Sed nia samideano prof. Zee, per sia virtuoza tradukkapablo, prezentis al ni poemojn, kiujn oni memevidente

verkis ne nur por ĉinoj, sed por homoj en ĉiu loko kaj en ĉiu tempo. “El Ĉina Poezio” vere estis pruvo, ke, se la ĉina historio kaj kulturo estas interese malsimilaj al tiuj de la okcidento, tamen la ĉina koro funde identas kun la nia. Tiel prof. Zee faris gravan kontribuon ne nur al la internacilingva poezio, sed ankaŭ al la interpopola kompreniĝo. Tion ni neniam forgesos. □



### “ESPERANTO-ĈINA VORTARO” ELDONITA

Omaĝe al la centjara jubileo de Esperanto, la Ĉina Esperanto-Eldonejo eldonis la Esperanto-Ĉinan Vortaron marte de 1987. Ĝia ĉefkompilinto estas veterana esperantisto Honfan. 31 samideanoj partoprenis en la kompila laboro, kiu daŭris ses jarojn. En la kompilado oni konsultis plurajn Esperantajn vortarojn kaj fakajn terminarojn. Nombrante 18 000 artikolojn kun 27 000 subordigitaj artikoloj (kunmetitaj kaj derivitaj vortoj), la Esperanto-Ĉina Vortaro estas plej ampleksa siaspece en la historio de la ĉina Esp-movado. La eldoninto esperas, ke la eldono de la vortaro akcelos lernadon kaj studon de nia lingvo.

### NOVAJ SUKCESOJ DE LA ĈINA ESP-MOVADO

Laŭ statistiko 54 Esperantaj organizoj fondiĝis en diversaj lokoj de Ĉinio pasintjare. La nombro

estis rekorda en la historio. Tio montris, ke la Esp-movado de Ĉinio disvolviĝis rimarkinde en la pasinta jaro. Inter la novaj organizoj estas 3 provincaj, 6 subprovincaj, 18 urbaj, 9 guberniaj, 7 fakaj, 5 junularaj, 4 altlernejaj kaj unu veterana asocioj. En 1986 17 altlernejoj, mezlernejoj kaj elementaj lernejoj funkciigis Esperanto-kurson, kio estis malofte vidata en la pasintaj jaroj.

### NOVAJ ESPERANTAJ GAZETOJ

La Ljaŭning-a Esperanto-Asocio aperigis sian organon “Esp-movado en Ljaŭning-provinco”. En ĝia unua numero oni anoncis, ke la Unua Kongreso de Esperanto de Ljaŭning-provinco okazos junio en Ŝenjang.

La Liŭĝou-a Esperanto-Asocio de Gŭangŝi aperigas sian monatan organon “Heroldo pri Esp-movado”. Per siaj informado kaj sciadono ĝi fervore servas al lokaj kaj tutlandaj esperantistoj.

### ARANĜOJ DE KONFERENC POR LA ESPERANTA JUBILEO

**Aŭstrio:** Kadre de la Jubilea Esperanto-Konferenco en Graz, inter 18-25 de julio 1987, okazos ankaŭ granda ekspozicio “100 jaroj de Esperanto-literaturo” en la Stiria Landa Biblioteko; inaŭguro de la monumento “La Espero”, belega skulptaĵo de Jesper Neergaard dediĉita al Esperanto; solenaj kunsidoj de tri akademioj: AIS San Marino, ISA Comenius Uppsala kaj membroj de la Akademio de Esperanto; kaj kunvenoj de fakaj organizaĵoj. Informojn donas kaj aliĝojn akceptas la Loka Konferenca Komitato, konstanta adreso: D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 Graz, Aŭstrio, pĉk. 1257.845.

Krome, okazos la Internacia Scienca Simpozio inter 28-30 de okt. 1987 en la Universitato de Vieno, organizita de la Aŭstria Laborkomitato ‘Esperanto 100-jara’

*La inaŭgura kunveno de la Sinjang-a Junulara Esperanto-Ligo, Henan-provinco*





*Esp-istoj de Nanĉang festas en parko la 127-an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof.*



*Glumarko farita de hispanaj esperantistoj por la jubilea jaro de Esperanto*

kunlabore kun la Lingvistika Instituto de la Universitato de Vieno, la Wiener Sprachgesellschaft kaj la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno. Adreso: Aŭstria Laborkomitato 'Esperanto 100-jara', Postfach 92, A-1183 WIEN, Aŭstrio.

**Brazilo:** La 23-a Brazila Kongreso de Esperanto okazos de la 13-a ĝis la 19-a de julio, 1987 en la urbo Rio de Janeiro, kun la temo: "100 jaroj de Esperanto". Adreso: Rio de Janeiro Esperanto-

Asocio, Praca da Republica 54, 2 andar, 20211-Rio de Janeiro (RJ), Brazilo.

**Ĉeĥoslovakio:** La Fervoja Esplor-instituto en Prago planas kiel la unua en la mondo prove uzi ankaŭ Esperanton kiel laborlingvon dum sia Scienc-teknika Konferenco okazonta en okt. 1988. Fakuloj, kiuj pretas aktive partopreni ĝin, turnu sin al la fervoja sekcio de ĈEA, Jilska 10, CS-110 01 Prago.

*Poŝtmarko (projekto) emisiita de Bulgario omaĝe al la 100-jara jubileo de Esperanto*



### NOVA ESPERANTO-ORGANIZO "PEK"

Multaj personoj en nia lando Kolombio ignoras Esperanton. Por venki tiun barilon, simpatiantoj kaj nur du esperantistoj kunigis siajn manojn kaj fortojn kaj fondis en 1986 la PEREIRA ESPERANTO-KLUBO. Ĝia ĉefa tasko estas "amasa disvastigado de Esperanto".

### EKSPOZICIO

En la jubilea jaro 1987, en la tempo de la Budapeŝta Printempa Festivalo okazis la ekspozicio de Esperanto-libroj titolita "La vojo de Esperanto-libro en Hungario", en kiu estis eksponataj libroj de Karoly Fajsz kaj ankaŭ raraj antaŭesperantaj lingvoprojektoj.

### NOVA REVUO "JUGOSLAVIA STELO"

En la centjara jubileo de Esperanto la Jugoslavia Esperanto-Ligo denove havas sian organon "JUGOSLAVIA STELO" kaj la unua numero jam aperis komence de 1987. Ĝi informadas pri evoluo de la E-movado en Jugoslavio, pri ĝia socia rolo, pri disvolviĝo de E-kulturo kaj formiĝo de jugoslaviaj kulturaj valoroj pere de Esperanto en la mondo. La revuo



aperas trimonate, el 12 paĝoj, en formato A4. la ĉefa kaj respondeca redaktoro estas Djordje Dragojloviĉ, profesia ĵurnalisto, nun sekretario de JEL. La jarabono: 22.-n. gld. Provnumeron oni povas ricevi ĉe la eldonejo: ELBiH, V. Pelagiĉa 8/I, 71000 Sarajevo, Jugoslavio.

### ALVOKO AL FERVOJISTOJ- ESPERANTISTOJ

Okaze de la 100-jara jubileo de Esperanto la ĉefa gazeto de jugoslavaj fervojistoj semajne aperanta en Beograd sub la titolo "ŽELEZNIČKE NOVINE" (Fervoja Gazeto) planas realigi pere de Esperanto en 1987 internacian enketon pri la vivo de fervojistoj en la mondo. Ĉiuj skribemaj fervojistoj-esperantistoj partoprenu en

tiu interesa agado. Se la kolektitaj materialoj estos sufiĉe abundaj kaj kvalitaj, oni preparos el tiuj kontribuaĵoj apartan broŝureton. Materialon bonvolu sendi al: ZAJEDNICA JUGOSLOVENSKIH ŽELEZNICA, Za JAFE (G. Srediĉ), Beograd, Nemanjina 6 (poŝtfako 563). Ne forgesu fotojn kaj koncizan propran biografion.

### ESPERANTA POŝTMARKO

Por celebrado de la 100-jara datreveno de la fondiĝo de la internacia lingvo Esperanto, la Poŝta Direkcio en la Popola Respubliko Bulgario emisiis en januaro 1987 specialan poŝtmarkon dediĉitan al la jubileo. Sur ĝi troviĝas la portreto de D-ro Zamenhof, vorto Esperanto kaj la jaroj 1887-1987. □

Esperanta Verkista Asocio  
(EVA)

## LA JUBILEA KONKURSO

### PRI TEATRAĴO

La konkurson pri teatraĵo de EVA (kies premiojn finance ebligas s-ro Adam Goralski el Kanariaj Insuloj) partoprenis 14 aŭtoroj el Britio, Ĉinio, Hungario, Jugoslavio, Francio, Rumanio, Pollando, Sovetunio, Svedio kaj Usono.

La teatraĵojn prijuĝis la ĵurio konsistanta el s-roj Michel Duc Goninaz (Francio), Mauro Nervi (Italio), D. B. Gregor (Britio).

La ĵurianoj esprimis sian ĝeneralan malkontenton pro la malaltaj lingva kaj literatura niveloj de la konkursaĵoj. Aparte bedaŭrinda estis la fakto, ke pluraj konkursintoj ne sekvis la regularon de la konkurso, laŭ kiu la teatraĵa temo estis limigita al la unuaj jaroj de la ekzisto de Esperanto. Neniu el la proponitaj verkoj elstaris el teatreca vidpunkto. Tial

**la unua premio ne estis aljuĝita:**

**la duan premion gajnis la verko "ZAMENHOF PRIVATE" de Stefan MacGill nun loĝanta en Hungario.**

Inter la teatraĵoj, kiuj ne rilatas al la konkursa temo la ĵurianoj aparte elstarigis la teatraĵojn "LA FINO DE FERIO" de Harald Brown el Svedio kaj "Trajna Sonĝo" de Arno Lagrange el Francio, al kiuj estas aljuĝitaj laŭdaj mencioj de la konkurso.

Protokolis: **Spomenka Štimec**  
konkursata sekretario

*Membroj de la Pereira Esperanto-Klubo de Kolombio*




DA ŬEJ:

# VIRINA SKR NELEGEBLA


En la gubernio Ĝjangjong kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj de suda Hunan, Ĉinio, loĝas jaŭ-oj kaj han-oj. Jam de longe tie cirkulas aparta skriblingvo, legebla ekskluzive por tieaj virinoj. Ĝuste pro tio oni nomas ĝin virina skriblingvo.

Ĝi havas apartajn formojn el punktoj, linioj kaj oblikvaj sterkoj. Iuj estas similaj al la han-lingvaj ideogramoj kaj la aliaj formas propran sistemon.



*La 85-jara Gaŭ Jinŝjan skribas leteron en la virina skriblingvo.*

*Manuskriptoj en la virina skriblingvo*



# IBLINGVO POR VIROJ


La virina skriblingvo estas sonprononca kaj plursenca. Ĝi prononciĝas dialekte. Ĉiu vorto povas esti uzata kiel homonimo de la loka dialekto. Tial la virina skriblingvo nombras ne multe, nur 600-700 vortojn. Ili, kompreneble, estas ne sufiĉaj por esprimi kompleksajn ideojn, tamen estas facile skribeblaj kaj memoreblaj por la virinoj en la montregiono, al kiuj mankis ŝanco viziti lernejon.

Ĝenerale la lingvo skribiĝas de supre malsupren kaj de dekstre maldekstren, kaj la strekoj oblikvas de sor-dekstre sob-maldekstren. La skribaĵoj aspektas lozanĝe kun delikata kaj simetria formo.

Nun la hereditaj verkoj skribitaj en tiu lingvo estas baladaj. Ĉiu frazo konsistas el 7 vortoj kun ritmo harmonia, lingvo populara. Ili estas skribitaj sur papero, ventumilo aŭ teksaĵoj. Oni povas kante legi la skribaĵojn sur papero aŭ ventumilo. Legi ilin estis ŝatata distrado por la virinoj siatempe.

Pri la origino de la virina skriblingvo tie cirkulas tragika kaj kortuŝa legendo. Antaŭ tre tre longe tie vivis fraŭlino Pan Ĉjaŭ. Ŝi kultivis en nubokovrita monto. Ŝi iris leĝere kiel fluganta nuboj. Ŝi lavis siajn harojn kaj vizaĝon per fontakvo. Ŝiaj haroj

estis brilaj kiel ondoj, ŝiaj okuloj klaraj kiel aŭtuna lago. Ŝi trikis pasamentojn, brodis kaptukon sub la luno. Ŝia vizaĝo estis ĉarma kiel la luno. Ho ve, iutage, la ĉasista trupo de la prefekto hazarde renkontis ŝin kaj forportis ŝin malproksimen en la oficejon de la prefekto. Ŝiaj kamaradinoj sopiris al ŝi kaj esperis ŝian revenon. Pasis jaro post jaro, sed nenia informo venis. Ili do malesperis, opiniante, ke eble Pan Ĉjaŭ ekŝatis la vivon ĉe la prefekto kaj forgesis siajn kamaradinojn. Sed fakte la domo de la prefekto estis rigore gardata, kaj ŝi ne povis eldomiĝi eĉ kun flugiloj. Pan Ĉjaŭ cerbumis kaj cerbumadis tri jarojn kaj fine elpensis skriblingvon nekonatan de aliuloj. Ŝi skribis longan leteron kaj metis ĝin sub la harojn de sia ĉashundo por ke ĝi portu la leteron al ŝiaj kamaradinoj, kaj ke ili informiĝu pri ŝia malfeliĉo.



*Vortoj en la virina skriblingvo sur ventumiloj*





*Tang Baŭĝin (dekstre) brodas sur mantuko vortojn en la virina skriblingvo.*

49 saĝaj knabinoj cerbumis 49 tagojn kaj fine ekkomprenis la skribaĵojn. De tiam la knabinoj skribis kantotekstojn kaj leterojn per la de Pan Ĉjaŭ kreita skriblingvo, kiu herediĝis ĝis hodiaŭ.

La legendo montris, ke la virina skriblingvo iagrade rilatis kun la suferoj de la virinoj.

La ĝis nun konservitaj verkoj en tiu skriblingvo prenis malfeliĉojn de la virinoj kiel sian ĉefan enhavon.

“Suferanta Vidvino” estas ĝia tipa verko skribita en tiu lingvo. Ĝi rakontas la mizeran vivon de iu virino post la morto de la edzo:

*“Kun edzo oni vivas dolĉe,  
Sen edzo mi sentas amare.”  
“Ventegon mi elteni devas,  
De pluvego mi suferas.”  
“Al velka arbo mi similas,  
Sub nigraj nuboj mi baraktas.”*

Jen per la versoj la vidvino elverŝis sian malfeliĉon.

En sia prospera periodo la virina skriblingvo estis aplikata preskaŭ en ĉiuj flankoj de la virina vivo. Tiam per la lingvo oni skribis leteron al siaj amikinoj baldaŭ edziniĝontaj por gratuli kaj al la amikinoj, kiujn trafis malagrablaĵoj por ilin konsoli. Ankaŭ la preĝaj tekstoj antaŭ budhaj statuoj estis skribitaj en tiu lingvo. Kiam iuj fratiniĝis, ili skribis siajn bondezirojn en tiu skriblingvo. Kiam la edzo aŭ parenco de amikino mortis, oni skribis oracion en tiu lingvo.

Krome inter la verkoj skribitaj en tiu lingvo estis ankaŭ la tieaj popularaj eposoj tradukitaj el han-lingvo fare de talentulinoj bone posedantaj la virinan skriblingvon, ekz. “Florvendistino”, “Ljang Ŝanbo kaj Ĝu Jingtaj” priskribanta la tragedion de junaj geamantoj.

Nun tiun lingvon scias nur tre malmultaj, kiuj jam aĝas ĉirkaŭ 80 jarojn. Gaŭ Jinŝjan, 83-jara, eklernis la virinan skriblingvon en sia 16-jara aĝo. Tiam ŝiaj

fratino, onklino kaj bofratino bone sciis la lingvon. Ili skribis sur ŝtofo, ventumilo kaj papero kaj per ili instruis al ŝi legi kaj skribi. Tiam preskaŭ en ĉiuj vilaĝoj troviĝis virinoj lernantaj la lingvon. Kune kun ŝi lernis 6 samvilaĝaj knabinoj. Bedaŭrinde, ĉiuj aliaj jam forpasis.

Post la naskiĝo de la nova Ĉinio junaj virinoj en la montaro ekhavis ŝancon viziti lernejojn kaj ne bezonis tiun lingvon por interkomunikiĝo, sekve la virina skriblingvo perdis objektivajn kondiĉojn por plua ekzisto.

La alia grava kialo de la malprospero de la lingvo estas superstiĉo: la tieaj virinoj kredis, ke ekzistas infero por la mortintoj. Antaŭ sia morto ili petis siajn familianojn forbruligi la objektojn kun skribaĵoj de la virina skriblingvo, por ke poste ili povu legi plu en alia mondo. Tial pli kaj pli malmultiĝis la heredataj verkoj skribitaj en tiu lingvo.

Koncerne la aŭtentikan originon de la virina skriblingvo ekzistas pluraj konjektoj. Iuj opinias, ke ĝi estas skriblingvo de pingdijaŭ — parto de la tieaj jaŭ-oj. Aliaj opinias, ke ĝi evoluis el la antikva hana skriblingvo kaj fine fariĝis ĝia memstara branĉo.

Kiel naskiĝis la virina skriblingvo fakte? Pri tio oni devas fari pluan esploradon. Tamen klara estas ĝia valoro en studo pri lingvo, skriblingvo, virina kulturo, nacia historio kaj aliaj kampoj. □

**Solve por “Serĉu”:** La ŝnuro ligis la bovon al la dua arbo de maldekstre.

**Solvej por la enigmoj:** 1. vitro; 2. piedpilko.

# NOVA BALAISTINO

(Novelo)

Kiam la korto de la urba ensemblo estis kritikita de ĵurnalo kiel “malpura kaŝangulo”, la kultura buroo de la urbo, la gvida instanco de la ensemblo, tuj dungis por ĝi balaiston. Antaŭe la balaado de la korto estis plenumita de maljuna floristo Ŭang. Post lia forpaso la korto perdis la zorgadon. Sendube la ĵurnala kritiko estis hontiga, tamen la loĝantoj de la korto asertis, ke devas honti la kultura buroo. Anstataŭ dungi balaiŝton, ĝi decidis, ke la geaktoroj de la ensemblo laŭvice balau la korton. Jen kia absurdaĵo! Ĝi indas la ĵurnalan kritikon!

La brikaj kabanaj en la korto estis preskaŭ samaĝaj kiel la Maljuna Ŭang: La stukaĵoj de la muroj makuliĝis pro disfalo, la fenestroj oblikviĝis kaj la tegmentoj likis. Estis malfacile teni la korton pura. Kiam la Maljuna Ŭang estis zorganta pri la pureco de la korto, li nur povis teni puraj la lokojn facile vidatajn. Sed nun, por sia oportuneeco, la loĝantoj elĵetis balaĵojn kiel eble plej proksime, kaj la forĵetaĵoj amasiĝis kiel montetoj, kiuj englutis la florbedojn kaj sufokis la plantaĵojn.

La nova balaistino estis alta, sunbruna, fortika, kun manoj kaj piedoj grandmezuraj. Ŝi venis somermeze, en vestoj el kruda ŝtofo. Ĉe la unua rigardo oni eksciis, ke ŝi venis el malriĉa izolita montvilaĝo. Ŝia alveno vekis diversajn konjektojn en la korto. Sed tamen ĉiuj ha-

vis la saman opinion, ke por ŝi kompatinda kamparanino, balai la korton estas granda feliĉo. Kaj ŝia feliĉo havis pli malpli rilatojn kun ĉiuj loĝantoj de la korto. Kaj tiel ili ĉiuj rigardis sin ŝia “favoranto”. Ili asertis, ke ili estas almenaŭ dungintoj rajtantaj disponi pri ŝi.

Kredeble, la knabino konsciis pri tio kaj laboris diligente, montrante respekton al ĉiuj.

Fininte la festenon, la surnauludisto\* Dikulo Ĉen iris al la florbedo por ŝuti tien la ostojn, fruktoŝelojn kaj similajn forĵetaĵojn. Post hezito la balaistino alpaŝis kaj diris kun rideto: “Onklo, vi ne devas. . .” Sed Dikulo Ĉen respondis gaje ride-tante: “Ho, knabino, ŝajne vi estas subdukita. La ostoj servas kiel kalcia sterko, dum la cigareda cindro kiel la kalia. Ĉiuj tiuj estas plej bonaj organikaj sterkoj por floroj.” Jen li ŝutis la forĵetaĵojn antaŭ la knabino kaj foriris. La knabino ruĝiĝis, kaŭriĝis kaj mute elprenis per la manoj la forĵetaĵojn el la fendoj inter la brikoj kaj terbuloj.

Nepo de maljunulino Mo ŝutis pelvon da skorio tuj apud la vojo. Malfeliĉe, la knabino vidis tion kaj insistis, ke la knabo forbalau la skorion. La etulo, tamen ruza, ekploris, kio timigis la knabinon. Antaŭ ol ŝi ekkonsciis la kialon, la maljunulino Mo jam sin direktis al ŝi kaj insultis: “Ha fi, kiel arogante! Vi aŭdacas bati la infanon?”

La knabino tuj klarigis: “Mi mi ne batis lin. Mi nur postulis ke li forbalau. . .”

Ĉu la maljunulino povis permesi al ŝi klarigi? Ŝi ŝutis salvon da insultoj sur la knabinon: “Ĉu vi rajtas ordoni aliulon balai helpe al vi? Kia aroganteco! Absurdaĵo. . .” La maljunulino insultadis kun brakosvingado kaj buŝa ŝaŭmo, eskaladis la insultado. Konsternite, la knabino staris silente kun mallevita kapo, kvazaŭ lernanto punata pro kulpo. Fine la knabino subkomprenis la insultojn de la maljunulino. La oldulino avertis ŝin: “Ne intencu molesti honestulojn ekskluzive. Kiu ne tiel forĵetas siajn rubaĵojn? Kial vi humili-gas nur min? Sen mia flamiĝo vi eble prenis min kato! Hm. . .” Pruviĝis, ke oni neniam devas montri sin malforta!

La juna balaistino ne havis la scion, ke osto estas kalcia sterko, nek la kapablon ekvilibrigi sin en interhomaj rilatoj, tamen ne mankis al ŝi la kapablo pri-pensi. Post pririgardo al la korto ŝian menson subite lumigis la penso, ke oni laŭplaĉe ŝutas forĵetaĵojn pro tio, ke rubuloj estas distancaj de la korto. Eklumiĝis ŝia menso, ŝi aĉetis per sia propra mono du grandajn bambuajn korbojn kaj metis ilin en la korto, por ke oni povu ŝuti forĵetaĵojn pli proksime. Kiam la korboj pleniĝis, ŝi forportis ilin al la rubuloj. Vere saĝa elpen-saĝo! Ŝi ĝojis kaj insultis sin en



la koro, kial ŝi ne pli frue elpen-  
sis la ideon, sed male, saĝiĝis  
nur post alies insulto. Tio pru-  
vis, ke ŝi vere estis subdukita.

Oni ne sciis, kiu, emociita de  
ŝia faro, informis la intendanton  
de la ĝenerala servo de la ensem-  
blo pri la afero kaj insistis pri  
tio, ke la ensemblo pagu por la  
korboj. La intendanto do petis  
de ŝi la kvitancon por la korboj,  
sed ŝi diris kun honesta rideto:  
“Ili estas instrumentoj por mia  
laboro. Mi pensas, ke mi devas  
mem pagi por ili. Do lasu la  
aferon.” Ĝis fino la ensemblo  
ne repagis al ŝi, pro tio ke ŝi ne

havis la kvitancon. Multaj diris  
skuante la kapon, ke ŝi estas tro  
honesta, eĉ iom stulta.

Honesteco sendube estas bona  
virto, sed tamen ĝi provokas  
molestojn. Jen iuj profitis de tio.

Post pluvego, ŝtopiĝo de kloa-  
koj faris la korton marĉejo. Oni  
faris ponton per brikopecoj an-  
taŭ sia domo super akvo. La  
okjara Dikuleto, filo de la rek-  
vizitorino Li Joŭcaj, hejmen re-  
venis de lernejo. Paŝante sur la  
brikoj antaŭ sia domo, pro ne-  
atento li falis en la koton. Tiam  
preterpasis la balaistino kaj tuj

helpis lin restariĝi. Vidante, ke  
la vesto estis malpurigita, Diku-  
leto ekploris, timante riproĉon  
de la patrino, kaj ne aŭskultis  
ŝian konsolon. Aŭdinte la plo-  
ron, Li Joŭcaj tuj eldomiĝis. Vi-  
dinte la malpurigitan filon, ŝi  
flamiĝis kaj superŝutis lin per  
insultoj. Pro bonkoreco la bala-  
istino admonis: “Onklino, ne  
insultu la infanon. Li ja ne vo-  
las fali. Krome insulto jam hel-  
pas nenion.”

Sed kiu atendis, ke ŝia admo-  
no eksplodigis la rekvizitorinon,  
kiu ja estis en granda malkon-  
tento kaj nun verŝis la koleron  
sur ŝin. Li Joŭcaj indigne diris:  
“Kompreneble, ne helpas insulto.  
Tamen helpus, se la kloakoj  
ne ŝtopiĝus. Nun ĉiuj devas  
trairi ponton por endomiĝi. Kaj  
kiun ni insultu?”

La konsternita knabino diris:  
“Mi, mi ja ne volas, ke li falu.  
Kaj cetere, mi ne scias, ke ŝtopi-  
ĝis kloakoj. . .”

Li Joŭcaj diris ironie: “Kion  
vi scias ankoraŭ krom preni sa-  
lajron? En mia imago knabino  
el kamparo estas honesta kaj la-  
borema, sed fakte pli pigra ol  
serpento. . .”

Ĝuste tiam preterpasis Je Ĉiŭ,  
sangvina kaj justa junulo, mem-  
bro de la voĉmuzika grupo de la  
ensemblo. Aŭdinte la interpa-  
rolon, li diris: “Franjo Li, se vi  
estus gvidanto, multaj do mortus  
de via miskulpigo. Vi opinias  
tiel laboreman knabinon pli pig-  
ra ol serpento. Ĉu vi intencas  
senigi ŝin je la vivteno?” Li  
Joŭcaj tuj eksaltis kvazaŭ frapi-  
ta de elektro, metis la manojn  
sur la koksojn kaj insultis Je  
Ĉiŭ: “Kiam mi ofendis vin, bu-  
baĉo? Ĉu mi ŝokis vian ama-  
tinion? . . .”

Denton pro dento. Varmeg-  
sanga Je Ĉiŭ malcedeme rebatis



ŝin per vortoj. Tiutempe la balaistino jam fluge revenis en sian loĝejon kaj eklarmis sidante. Certiĝinte, ke jam ĉesis la kverelado, ŝi time eliris el sia ĉambro, kunportante korbon kaj hokon, kaj komencis dragi la kloakojn sentagmanĝe. En la tuta posttagmezo ŝi elprenis duonkorbon da ĉifonoj, boteletoj, ŝlimo k.a. malpuraĵoj. Fine la kloakoj estis malŝtopitaj. Oni estis tre dankaj al ŝi, vidante ke ŝi tutkorpe estas malpurigita, sed strange, neniu diris al ŝi sian dankon.

La sekvantan matenon, en kvieta angulo de la korto, la knabino balbute diris al la renkontita Je Ĉiŭ: "Mi dankas vin." Tuj post la diro ŝi mallevis la kapon kaj daŭrigis sian balaadon. Antaŭe ĉiumatene ŝi renkontis la junulon ekzercanta la voĉon, sed neniam parolis kun li pro nekonatiĝo.

Je Ĉiŭ demandis ŝin pri ŝia nomo, kaj ŝi respondis kun modesta rideto: "Mi nomiĝas Pan Juhŭa." Ĉe la diro montriĝis ŝiaj bonordaj eburaj dentoj.

"Juhŭa," serioze diris Je Ĉiŭ, "mi rimarkis, ke vi estas tro humila. Vi ne bezonas tiel pensi. Ni ĉiuj estas homoj. Kaj vi ne devas montri troan respekton al la loĝantoj de la korto. Viaj manĝo kaj vestoj ne dependas de ili, kaj vi ne devas timi ilin kaj esti cedema. Ĉu vi ne aŭdis la onidiron, ke obeema bovo laboras plej multe? Ju pli vi cedas al ili, des pli ili arogas kaj superŝutas vin per diversaj laboroj ekstraj."

Juhŭa aŭskultis silente, ride-tante, en plena pieco. Kiam Je Ĉiŭ finis sian predikon, ŝi denove mallevis la kapon kaj daŭrigis la balaadon, estante indifere-nta al lia diro. Je Ĉiŭ suspiris pro ŝia troa honesteco.

Juhŭa pasigis jam tri monatojn en la fremda urbo malproksima de ŝia hejmo. Ŝi sentis solecon, kaj la unika plezuro por ŝi estis en ĉiu monato poŝtsendi al sia hejmo plejparton de sia salajro. Ŝi vivis ŝpare kaj aĉetis por si nek veston nek frandaĵon. Elspezo por la manĝo en la komuna manĝejo estis tro granda por ŝi, kaj ŝi decidis mem prepari manĝon. Branĉaĵoj estis ĉie troveblaj, kaj en la ĉambro loĝis nur ŝi sola, tial ŝia manĝ-preparo ne ĝenis aliajn. Ŝi firme memoris la atentigon de siaj gepatroj: Ĉiujn laborojn faru kontentigaj, por ne malhonoru la onklon, kiu vin rekomendis.

Ŝi ĝojis, ke Je Ĉiŭ alparolis ŝin. Sed ŝi ne konsentis pri lia diro. Laŭ lia opinio, ŝi devus rigardi ĉiujn kortanojn fremdaj. Sed fakte ŝi volis, ke ĉiuj ŝatu ŝin kaj traktu ŝin familiare.

Post kelkaj tagoj Je Ĉiŭ donis al ŝi biletan kun peto: "Bonvolu rigardi nian prezentadon ĉi-vespere. Mi aĉetis la biletan speciale por vi."

"Ho ne!" Juhŭa faris paŝojn malantaŭen konsternite de lia granda afableco.

"Kial ne? Ĉu vi timas, ke mi delogas vin?"

"Ne," Juhŭa klarigis haste, "mi ja konfidas vin."

"Kial do? Ĉu vi domaĝas la monon? Mi regalas. Eble tio estas senkaŭza regalo? Ne gravas, estontece vi regalu min." Je Ĉiŭ neniel povis kompreni ŝin.

"Mi. . ." Juhŭa diris kun ruĝo pro embaraso, "mi. . . mi ne konas la vojon."

Je Ĉiŭ ekridis kaj diris en gajeco: "Kia grava kaŭzo! Ĉu tio ne estas bagatelo? Nu, tiele, ĉi-vespere mi ne povos akompani vin, sed tagmeze mi akompanu

vin koni la vojon, ĉu bone?" Juhŭa kapjesis.

Sur la strato viglis la trafiko, kio timigis ŝin. Ŝi subkonscie kroĉetiĝis al la basko de Je Ĉiŭ. Rimarkinte ŝian timon, Je Ĉiŭ prenis ŝin je la mano por konduki ŝin. Sed ŝi hontiĝis kaj ofte retiris la manon, de tio ili ambaŭ ĝeniĝis.

Post la vespermanĝo Juhŭa frue ekiris pro timo perdi la vojon kaj malfruigi. La vojo estis konata, sed ŝi ekiris tro frue kaj atendis pli ol unu horon ekster la teatro. Tamen post rigardo de la prezentado, ŝi pensis, ke la ĝuo sufiĉos kompensi eĉ plian du-horan atendadon. Ŝi neniel povis kredi, ke la graciaj geaktoroj sur la scenejo estas la loĝantoj de la korto, kiujn ŝi ĉiutage vidas. Ili estis eksterordinaraj homoj. Ili kantis pli ĉarme ol orioloj, kaj dancis multe pli elegante ol tiuj de la gubernia ensemblo de ŝia hejmloko. Ŝi rekonis Je Ĉiŭ. Li kaj tri aliaj beluloj kantis starante en unu vico. Ili ĉiuj portis arĝente grizan jakon kun ruĝa kravato. Ŝi adore plaŭdis per la manoj por li. Sed kiam ŝi rimarkis, ke la najbaroj mire rigardis ŝin, ŝi subite ekkonsciis, ke nur ŝi sola ankoraŭ manklakis. Ŝi ruĝiĝis de honto. "Mi estas tro provinca!" ŝi pensis.

En la sekvanta tago, kiam Je Ĉiŭ demandis ŝin pri ŝia impresado pri la prezentado, ŝi diris sincere: "Ĉarmege! Vi estas tre talentaj."

Je Ĉiŭ diris skuante la kapon: "Tre talentaj? Tio estas nia profesio, ni kantas, dancas, dum vi balaas, kaj ni ĉiuj estas talentuloj."

Juhŭa diris kun seriozeco: "Ne. Ĉiuj povas balai, sed ne ĉiuj kapablas bone kanti kaj danci. Talentaj estas vi."

“Jen pro kio vi rigardas vin humila kaj povas toleri ĉian insulton, ĉu ne?” diris Je Ĉiŭ en malkontento pro ŝia troa humileco.

“Ne,” koleretis Juhŭa, ĵetante rigardon al Je, “kiu insultis min? Ili nur opiniis, ke mi ne bone plenumis mian laboron. Dekojn da ĵuanoj por monato, tamen laboro tre facila. Mi ne bone faris la laboron, kaj meritas la insulton. Ĉu mi devas rigardi ilin malicaj kaj senkoraj? Unue mi devas bone plenumi mian laboron.”

Aŭskultante ŝian parolon, Je Ĉiŭ tute konsterniĝis. Estis ekster lia atendo, ke en la nunaj jaroj ankoraŭ ekzistas tiel honesta homo. Aŭ eble stulta, tro humila? Por tio li ne estis certa, tamen li ekŝatis ŝin.

Post la rigardo al la prezentado, Juhŭa laboris pli senlace kiel roboto. Montetoj da forĵetaĵoj estis forportitaj, la disfalinataj florbedoj reordigitaj, la latrinoj purigitaj, la musko sur la muroj en la banejo forskrapita, kontraŭsuna ŝedo starigita. . . La korto aspektis tute alie. La nove kalkitaj muroj, prosperantaj floroj, puraj klostroj. . . ĉio estis tiel agrabla. Juhŭa estis la plej ĝoja en la korto. Ŝi pensis: “Kiel ĉarmaj kaj talentaj estas la loĝantoj de la korto. Kiel ili povus loĝi en malpura medio? Mi nepre tenu la korton pura, ke ĝi konformu al la loĝantoj.”

Iu en la kultura buroo de la urbo skribis artikolon por la ĵurnalo. La artikolo detale raportis, kiel la gvidantoj de la kultura buroo kaj la ensemblo serioze akceptis la kritikon de la ĵurnalo kaj kiel la loĝantoj de la korto aktive ekagis por purigi la korton kaj fari higienajn regulojn. Tamen neniu vorto pri la balaistino Pan Juhŭa.

La redakcio de la ĵurnalo sendis enketi pri la afero, kaj la sendito trovis, ke vere radikala ŝanĝiĝo okazis al la antaŭe malpurega korto. Li faris fotojn kaj serioze publikigis sian raporton kun redakcia noto.

Kelkaj plendis por Juhŭa instigante ŝin malkaŝi al la ĵurnalo la gvidantojn de la kultura buroo, ke ili atribuis al si la ŝanĝiĝon de la korto. Sed Juhŭa diris sincere: “Tio ja estas frukto de la komuna klopodo. La kalko, cemento, sulfata acido, florsemoj. . . ĉiuj estis alportitaj de Je Ĉiŭ kaj geonkloj. Mi faris nur la farendajn.” Ŝia grandanimo konsideri pri la kolektivaj interesoj emociis eĉ la gvidantojn, kiuj sentis, ke tago post tago degeneras la moralo. En la fino de la sezono, neniam premiita Juhŭa gajnis la superklasman premion de cent ĵuanoj, kaj ŝia neniam altigita salajro de 55 ĵuanoj estis levita je unu grado laŭ la instrukcio de la supera instanco.

En ŝiaj okuloj, la rigardoj de la loĝantoj de la korto al ŝi jam ne estis tiel malestimaj kaj singardemaj kiel antaŭe. Iuj personoj, kia surnaisto Dikulo Ĉen, jam komencis varme saluti ŝin kaj interparoli kun ŝi. Kaj aparte ĝojigaj por ŝi estis la prizorgo kaj protekto de Je Ĉiŭ. Tiu dudek-jara knabino pli kaj pli bezonis lian kompanion.

Ŝi adoris kaj ŝatis Je Ĉiŭ. Li estis bela, eleganta, entuziasma, grandanima kaj justa. Kiam li informis ŝin, ke li estos operaciita je la voĉkordoj, ŝi pli klare vidis la virtan, strebeman kaj progreseman Je Ĉiŭ.

“Kial fari tranĉon sur la gorĝo?”

“Doktoro kaj fakuloj diris, ke la operacio faros mian voĉon

pli ĉarma kaj faros min solisto. Alie mi restos dumviva ĥoristo,” klarigis Je Ĉiŭ.

“Ĉu tiel magie?” Juhŭa ĝojis pro Je Ĉiŭ.

“Ne certe,” Je Ĉiŭ diris kun amara rideto. “Se malsukcesos la operacio, eĉ ĥoristo mi ne povos esti kaj devos ŝanĝi la profesion.”

“Do,” Juhŭa, surprizita, diris kun timo, “vi ne risku.”

Trankvile ekridetis Je Ĉiŭ kaj diris plu: “Mi abomenas la vegetan vivon. Mi amas kantarton, sed mi neniam rigardis ĝin rimedo por vivteni. Se estos ebleco por progresigi min en la arto, kial mi ne provu? Se malsukcesos la operacio, ne estos malhonora afero ŝanĝi profesion. Oni sukcesos en alispeca kariero. Ekzemple, vi bone laboras kiel balaistino kaj estas same respektinda por aliaj.”

Juhŭa ruĝiĝis de honto kaj diris sinĝene: “Nenion indas mia laboro.” Tamen ŝi sentis ĝojon en la koro.

Je Ĉiŭ diris en plena seriozeco: “Vi ne devas esti tiel humila. Mi ĉiam opinias, ke ĉiu profesio havas siajn talentulojn. Tial mi ne timas ŝanĝi la profesion. Tio estas nenio alia ol denove taksi sian kapablon kaj karieri dekomence. Oni ne devas ĉiam intenci superi aliajn. Tion komprenante, oni povas vivi bonhumore, sen ajna ĉagreno.”

Juhŭa kore estimis Je Ĉiŭ. Pli kaj pli oftigis ilia kontakto kaj profundiĝis la korinklinoj. Iun vesperon ili interbabilis en la ĉambro de Juhŭa. Subite Je Ĉiŭ fiksas la absorbiĝan rigardon sur Juhŭa kaj diris: “Juhŭa, mi sentas, ke mi enamiĝis al vi. Ĉu vi amas min?” Juhŭa surprizi-

ĝis kaj ruĝiĝis. Liaj vortoj estis ekster ŝia atendo. Li estas urbano, bela, talenta, kaj Juhŭa eĉ ne havis la kuraĝon pensi, ke li enamiĝos al ŝi. Ŝajnas al ŝi, ke ŝi estis ĉikanata. Ŝi do diris malvarme: "Fraĉjo Je, ne ŝercu kun mi. Por kio vi trompas min?"

Post mallonga silento pro miro, Je Ĉiŭ demandis en nervoza kolero: "Ĉu vi vere pensas, ke mi mistifikas vin kaj faras ŝercon?"

Juhŭa konfuziĝis pro lia seriozeco. Jes, kial ŝi senprিপense asertis, ke li mistifikis ŝin? Ŝi balbutis: "Pro kio mi indas vian amon? La urbaj knabinoj estas ĉarmaj kaj kleraj. . ."

Je Ĉiŭ vespiris kaj diris en tristo: "Juhŭa, vi estus perfekta, se vi ne estus tro humila. Tamen tio ne estas via kulpo." Post paŭzo li trankvile kaj klare daŭrigis: "Vi miras, ke mi amas vin, ĉu ne? Kiel klarigi al vi? Vi mem pensu. Kiam vi trovos la respondon, malaperos via humiliĝo."

Juhŭa dronis en dolora meditado. Iom post iom ŝi konsciiĝis, ke ŝi vere troviĝas en humiliĝo. Kio estas humiliĝo? Tio estas, ke oni ĉiam rigardas sin malsupera ol la aliaj. Persono insiste opinias sin malsupera, dum li estas neniom malpli bona ol la aliaj. Ĉu tio ne estas filistreco? Ankaŭ humiliĝo estas speco de filistreco. Estas ne bone malestimi aliulojn, sed ankaŭ malbone malestimi sin mem. En pluraj tagoj Je Ĉiŭ ne venis al la ĉambro de Juhŭa. Ŝi sciis, ke li atendas ŝian konsciiĝon. Fine ŝi komprenis, ke ŝi enamiĝis al li, kaj ke ŝi estas aminda ankaŭ por li.

Kiam Je Ĉiŭ venis al ŝia ĉambro laŭ ŝia invito, en ekstazo li

pretervole brakumis kaj kisis ŝin. Tio ne forte mirigis ŝin. Nun ŝi havis la kuraĝon iri al kinejo kune kun Je Ĉiŭ. Sub la diversaj rigardoj de la pasantoj sur la movoplenaj stratoj, ŝi sin tenis trankvile.

Je Ĉiŭ tre amis ŝin. Li amis legi romanojn, kaj li postulis ankaŭ Juhŭa legi. Li amis pentri, kaj li ankaŭ postulis ŝin lerni pentrarton. Unuvorte, kion li ŝatis, tion ankaŭ Juhŭa ŝati li volas. Ŝi obeeme nestis en lia sino kiel infano, lasante lin karesi ŝiajn belajn nigrajn harojn. Ŝi ĝuis tian kareson nur de la

patrino en sia infaneco. Nun, en tiu fremda urbego, li fariĝis ŝia unika fidinda amiko. Ŝi konfide akceptis lian aliseksan amon.

En impulso de juneco, li pasie petis ŝian permeson al la volupto. Terurite, Juhŭa baraktis kaj rifuzis lin konsternite. "Ne, mi ne volas, malbone. . ." Sed la ĉirkaŭpremo de Je Ĉiŭ preskaŭ sufokis ŝin, kaj ŝi forte mordis al li la brakon. "Huj" kun krio pro doloro Je Ĉiŭ retiris la manojn, kaj Juhŭa liberiĝis. Ŝi rimarkis, ke lia brako sangis kaj li fiksitis sur ŝi rigardon perpleksan





kaj tristan. Subite ŝi maltrankviliĝis kaj petis lian pardonon. . .

Kun amara rideto Je Ĉiŭ faris longan elspiron kaj diris: "Ne diru plu. Vi ne amas min. Mi estas aktoro. Certe vi rigardas tiaspecan homon malbona. Mi mem serĉis la ĉagrenon."

"Ne, mi ne opinias vin malbona!" Juhŭa sentis sin miskulpigita kaj urĝe ekskuzis sin: "Ni vilaĝanoj rigardas la aferon gravega. Bofranjo Ĝjaŭang, nia najbarino, estas tre bona, sed ŝi faris eraron tiuflanke kaj ŝia edzo ofte batas ŝin. Ili jam havas tri infanojn, sed la vivo neniam estas ĝoja. . ."

Atente aŭskultante, Je Ĉiŭ ne sciis, en kia animstato li troviĝas.

Juhŭa bedaŭre rigardis al li kaj eksentis, ke li estas kompatinda. Ekspasmis al ŝi la nazo, kaj ŝi preskaŭ eklarmis. Ŝi murmuris kvazaŭ al si mem: "Fraĉjo Je, kiam mi apartenos al vi, vi povos fari ĉion laŭ via plaĉo."

Ŝajne Je Ĉiŭ jam vekigis el la pasio kaj diris trankvile: "Juhŭa, mi petas vian pardonon. Nur nun mi eksciis, ke mi ne estas perfektulo, kvankam antaŭe mi ĉiam tiel taksis min. Kial mi ne antaŭvidis, ke tiele mi terurosin, knabinon sole vivantan malproksime de la gepatroj? Eble mi tro amas vin, aŭ eble mi timas, ke estonte vi malestimos min. Post tri tagoj mi estos operaciata en hospitalo. . ."

Juhŭa ne povis reteni siajn larmojn plu.

Je Ĉiŭ enhospitaliĝis, kaj Juhŭa unuafoje sendormiĝis. Ŝi sopiris lin ne pro tio, ke li donacis al ŝi arĝentan kolieron kaj ŝikajn vestojn. Ne, ŝi akceptis ilin nur pro la skrupulo, ke rifuzo vundos al li la koron. Fakte ŝi neniam portis ilin. Ŝi

klare sciis, ke li esperas, ke ŝi aperos fiere kaj bele antaŭ la publiko. En ŝiaj okuloj li estis tia, kia heroo en romano, nobla, respekta al aliaj kaj kuraĝas oferi sin mem. Sen li, ŝi sentis, ke ŝi perdis ion valoran. Ĝuste tiam tute ekster ŝia atendo falis al ŝi katastrofo.

Iun tagmezon, kiam Juhŭa estis preparanta manĝon, bando da homoj entrudiĝis en ŝian ĉambron. Komandate de iu kadro de la ensemblo, ili priserĉis la ĉambron, taŭzante ĉiujn ŝiajn havaĵojn. Ŝi paliĝis de teruro, ne sciante, kio kaŭzis la priserĉon.

Kiam ili trovis la arĝentan kolieron kaj ŝikajn vestojn, kiujn Je Ĉiŭ donacis al ŝi, ili prenis ilin atestoj por konvikti ŝin pri ŝtelo kaj faris pridemandon unu post alia:

"Diru, de kie vi ŝtelis tiujn objektojn!"

"Konfesu, kien vi kaŝis mian oran kolieron!"

. . .

Juhŭa estis terurita. Ŝi kvazaŭ komprenis, kio okazis, sed ŝi ne kredis. Ŝi nur ripetadis: "Mi ne scias! Mi ne scias. . ."

La kadro svingis la brakojn por haltigi la haoson. Li rikanis kaj severe "admonis" ŝin, eligante vorton post vorto: "Juhŭa, se vi komplete konfesos, kiel vi ŝtelis la oraĵojn, arĝentaĵojn, monon kaj deponatestojn de tiuj familioj, ni ne denuncos vin. La afero jam estas tute klara. Se ne vi, kiu faris la ŝtelon? Ĉu oni rajtas ŝteli kaj rabi estante malriĉa?"

Ĉe la bando eksplodis minaca krio.

La vizaĝo de Juhŭa jen ruĝiĝis, jen paliĝis, kaj pizograndaj ŝvitgutoj falis de la frunto. Dum

longa tempo ŝi ne povis diri eĉ unu vorton.

Misakuzite, ŝi dronis en timo kaj embaraso kaj laŭte ekploris. Tamen tio ne vekis ĉe la bando kompaton kaj simpatiecon. Iuj diris, ke ŝi ektimis pro la malkovriĝo. Aliaj asertis, ke ŝi persistis en sia krimo. Kaj triaj molestis ŝin. Ĝuste kiam la pridemandado atingis la kulminon, iu venigis la maljunan direktoron de la ensemblo.

Paŝinte en la ĉambron, li tuj kolere riproĉis: "Stultaĵo! Kiu levis la priserĉadon?"

Tuj silentiĝis la bando. Iuj forŝteliĝis. "Kamarado direktoro, ni suspektis ŝin pri ŝtelo, kaj ni priŝtelitoj venis nur por demandi. Jen baldaŭ ni trovis la ŝtelaĵojn," diris la kadro kun ŝajnigita maltimo, ĵetante tamen malkuraĝan rigardon al la direktoro. Post li kelkaj aliaj priŝtelitoj plendis ankaŭ. Sed la direktoro diris severe: "Mi ne zorgas, ĉu tiuj estas ŝtelaĵoj. Vi ne havas rajton priserĉi la ĉambron de Juhŭa." Post paŭzo li serioze avertis: "Vi levis la aferon kaj vi responsos, se ia malfeliĉo okazos al Juhŭa. Mi anticipas mian atentigon."

La ĉeestantoj ekrigardis unu al alia kaj elŝoviĝis el la ĉambro.

Ordigante kun Juhŭa la objektojn, la maljuna direktoro konsolis ŝin: "Juhŭa, mi ne kredas, ke vi ŝtelas. Ne ĉagrenu vin per sensencaj pensoj. Aŭskultu min!" Juhŭa viŝis al si la larmojn kaj kapjesis. Ŝi sentis varman fluon en la koro.


Informiĝinte de sia amiko pri la afero, Je Ĉiŭ, ĵus operaciita, haste revenis al la korto. Vidinte la malgajan Juhŭa en la ĉambro, li plendis en indigno: "Kial vi ne forpelis ilin per balailo? Se tion vi ne kuraĝis fari, vi almenaŭ

(Daŭriĝo sur p. 54)

# Ĉinstilaj Pentraĵoj (II)


## Liberstilaj Pentraĵoj

*Bv. legi la artikolon "La Ĉinstila Pentraĵo" en la 5-a n-ro, 1987.*



*Bambufolioj* de ŬEN TONG (1018-1079)






Poemlegado sur azeno  
de SJU ŪEJ (1521-1593)



Montvilaço de Fuçun  
de HŪANG GONGŪANG (1269-1354)

Loçdomo en monto  
de JŪAN GJI (1642-1718)








Sovaĝanseroj en fragmitejo de ĜU DA (1626-1705)



Pino kaj gruo  
de SJU GU (1824-1896)

出畫共  
十又三  
頁如兒  
畫蟲  
乃余畫  
花艸  
白石  
老人  
九十四歲



Floroi de CJI BAJSI (1863-1957)



西藏舞  
丁巳年  
冬  
東  
陳  
生  
寫  
於  
北  
京

Tibeta soldanco "Aglo"  
de DONG CENSENG (1929- )

# ĈINAJ AKROBATOJ VIGLAS EN LA MONDO

La Internacia Cirka Festivalo en Montekarlo estas rigardata kiel olimpikoj de la cirkaj rondoj kaj ege disfamis sovietian burleskulon Popov, francan rajdartiston Gruss k.a. Pro la intensa konkuro estas tre malmultaj la personoj, kiuj estas ĉiam respektataj de spektatoroj kun alta apreĉkapablo.


Tamen, en 1983 la statuo de ĉina knabino bele ruliĝanta kun

stako da bovloj sur la kapo estis starigita por eterne en la vestiblo de la cirka tendo en Montekarlo: La 15-jara knabino Li Liping el Hebej-provinco, Ĉinio, gajnis la unikan premion Ora Burleskulo kaj du apartajn premiojn per sia superba akrobataĵo kun stako da bovloj sur la kapo en la 9-a Internacia Cirka Festivalo en Montekarlo. Krome, ankaŭ Lu Liŝin kaj Ŝen


Ning el Sandong-provinco kaj Kong Hongŭen el Henan-provinco gajnis la premion de Ora Burleskulo kaj tiun de Arĝenta Burleskulo per la Piedludo de Benkoj kaj Ekvilibriĝo de Piramido da Seĝoj en la 10-a kaj 11-a Internaciaj Cirkaj Festivaloj en Montekarlo respektive.

En la konkurso de la Monda Cirka Festivalo de "Morgaŭ", kiu estas paralela al la Interna-

*Ekvilibrigo de Piramido da Seĝoj*



*Akrobataĵo kun stakoj da glasoj sur la kapo, manoj kaj piedoj*







*Akrobataĵo kun stako da bovloj sur la kapo*

cia Cirka Festivalo en Montekarlo kaj karakteriziĝas per kulturado de novaj steloj, ĉinaj akrobatoj mirige gajnis sesfoje sinsekve la Premion de Prezidanto de Francio, la unuan el la oraj premioj. En la lastaj kvin jaroj la nacia flago de Ĉinio, kiel emblemo de venkinto, ĉiam flirtas super la Franca Nacia Cirko Gruss. Parizaj ĵurnaloj raportis plurfoje: "Ĉinio refoje venkis!"

Kial ĉinaj akrobatoj gajnis venkon sinsekve, kiam la rigardantoj havis diversajn interesojn kaj postulojn pri akrobataĵoj?

Februare, ĉi-jare, mi vizitis la Hangĝoŭ-an Akrobatan Trupon. Kiam la kvin akrobatinoj, kiuj gajnis la Premion de Prezidanto de Francio en 1983, staris antaŭ mi, mi streĉis mian imagpovon por trovi ion distingiĝan en ili,

kiuj havis superban lertecon. Tamen, vane. Mi trovis, ke krom ĉefrolulino U Min, kiu estas fortika, la aliaj aspektas neniom distingiĝaj.

Ekster mia atendo, ke iliaj servojaroj estas multe pli mallongaj, ol kiel mi supozis. U Min eklernis akrobatarton en la aĝo de 15 jaroj. Por ŝi, akrobatino, estis malfrue tion fari. Kaj la aliaj lernis danci kaj ludi teatraĵon, antaŭ ol fariĝi akrobatiinoj.

Akrobataĵo, unu el la plej antikvaj artoj de Ĉinio, havas historion de proksimume 3 000 jaroj. Mi pensas, ke eble en tio kuŝas la ĉefa kaŭzo, ke la ĉinaj akrobatoj povas atingi la kulminon de akrobatarto.

Jam en la Periodo de Printempo kaj Aŭtuno kaj Militantaj Regnoj (722-221 a.K.), akrobatarto havis konsiderindan skalon. El la elterigitaj ŝtonskulptaĵoj de Han-dinastio (206 a. K.-220 p. K.) estas akrobataj figuroj en lerta prezentado. Dum la pasintaj pli ol 2 000 jaroj akrobatarto cirkulis inter la popoloj kaj estis plaĉa al ili.

Sed dum longa tempo la akrobatoj havis tre malaltan pozicion en la socio, plejparto el ili vivis vagabonde. Tio ŝanĝiĝis nur post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko en 1949. Akrobatarto fariĝis floro agrabla kaj bonodora en la ĉinaj artaj rondoj. Kaj la akrobata trupo estis la unua, kiu vizitis aliajn landojn post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko.

En la lastaj jaroj la ĉina akrobatarto rapide disvolviĝis. Ĉinaj akrobatoj gajnis 11 ĉampionecojn, 16 orajn premiojn kaj 36 orajn medalojn en naŭ internaciaj akrobataj konkursoj. La totala nombro de premioj gajni-

taj de la ĉinaj akrobatoj okupis la unuan lokon en la mondo tiuflanke.

Invitite, Ĉinio partoprenis en la konkurso de la Kvina Monda Cirka Festivalo de "Morgaŭ" en 1981. Tio estis la unua fojo por la ĉina akrobata rondo partopreni en internaciaj konkursoj. Rapida ritmo kaj forta ekscito regis en la mondaj cirkoj. En la tempo, kiam profunde dekolitaj akrobatinoj flirtis en la aero tien kaj tien, blanka urso obeeme moviĝis laŭ la direktado de la dresisto kaj maltrankvilo regis en ia tendo, sur sceniĝis la ĉinaj akrobatoj akompanate de agrabla muziko de Gŭangdong-provinco. Unue ili prezentis ĝentile akrobataĵon kun stakoj da glasoj sur la kapo, manoj kaj piedoj kaj poste animskuan akrobataĵon kun staĝo da bovloj sur la kapo. La senĝenaj movoj kaj aplomba teniĝo de la ludantoj en naciaj vestoj kun belaj filigranoj kaj buntaj desegnoj fariĝis pli allogaj. La spektantoj estis tuj interesitaj de la orienta belo. Poste ili ludis imponan leondancon en akompano de arda muziko, kio tute ekstazigis la spektantojn.

En 1983 la Hangĝoŭ-a Akrobata Trupo gajnis la Premion de Prezidanto de Francio per la ludo de telerturno kun mirinda lerteco. La ĉefludantino U Min turnis per ambaŭ manoj 12 telerojn kaj firme tenis per la buŝo feran framon kun benko sur ĝi. Unu akrobatino, kiu turnis per la manoj 6 telerojn, staris sur la benko. La totala pezo superis ĉ. 50 kilogramojn. La ludo vere mirigis la rigardantojn. La alia akrobatino sur la benko fleksis sin malantaŭen kaj kaptis floron de sur la framo per la buŝo. Ĝuante la belan prezentadon la rigardantoj dronis en admirado.

La ĉinaj akrobatoj dediĉas sian energion al kreo de io nova en kvanto kaj vario de iuj malfortaj ludoj. Tion ekzemplis, ke en 1986 la manakrobataĵo kaj bicikl-akrobataĵo de ĉinaj ludantoj gajnis samtempe la Premion de Prezidanto de Francio. Eksterlande, bicikl-akrobataĵo estas ĝenerale prezentata de du aŭ kvin ludantoj, sed tiu de Ĉinio — de 12 ludantoj. (Diversaj formacioj kaj danĝeraj movoj, kiaj Ludo sur Fiksitaĵoj, Aglforma Ruliĝo sur Du Bicikloj kaj la lasta ludo Pavado, ĉiuj estis novaj, originalaj kaj animskuaj. La manakrobataĵo des pli forte mirigis la akrobatajn rondojn per lerteco. Tio, ke akrobato povas ĵetludi 6 bastonojn samtempe, estas rigardata kiel la plej alta

nivelo de la publiko, sed ĉina akrobato povas ĵetludi 7 volanrakedojn en pli alta lerteco. Prezentante cirklan akrobataĵon, alilandaj akrobatoj prenas 3 cirklajn komence kaj maksimume 7, dum la ĉinaj prenas 7 komence kaj maksimume 10. La 5 spadformaj bastonoj povas esti ĵetitaj kvinfoje unu post alia post la dorso por alilandaj akrobatoj, sed ĉinaj akrobatoj povas tiamaniere ĵeti ilin per ambaŭ manoj 25-foje kaj per unu mano pli ol 60 fojojn, kio gajnis senĉesan aplaŭdon ĉe rigardantoj per sinsekvo da movoj kaj ĉarmaj bildoj.


La ĉinaj akrobatoj, multe kontribuintaj al la monda akrobatarto, estas sentoplenaj. Unu el la ludantoj de telerturnado Han Jŭanĝi edziniĝis antaŭ kel-

ke da jaroj kaj havas ĉarman filinon. Pri sia filino Han diris al mi triste: “Kiam ŝi ploras, ŝi vokas sian patron anstataŭ sian patrinojn.” Nun Han estas ankoraŭ ĉefludantino de la Hangĝoŭ-a Akrobata Trupo kaj en aprilo ŝi vizitis FR Germanion kune kun la trupo.

La pordmalferma politiko praktikata nun de Ĉinio ebligas al la ĉinaj akrobatoj fari kreadon sur pli alta nivelo, asimilinte alies fortajn trajtojn. Ili estas vaste bonvenigataj kaj admirataj de eksterlandaj rigardantoj, aprecantaj ilian prezentadon, per mirinda lerteco kaj forta nacia gusto. Akrobatarto funkcias jam kiel ponto inter la ĉina kaj alilandaj popoloj por fari pli da kontaktoj kaj akceli ilian amikecon. □

## Nova libro de la ĈINA ESPERANTO-ELDONEJO

# Ĉina Antologio [1919-1949]



En la libro kolektiĝis 55 verkoj inkluzive de noveloj de Lusin, Maŭ Dun kaj Bakin, raportaĵo de Ŝja Jan, eseoj de Ĝu Ziĉing, Bingŝin kaj He Ĉjifang kaj poemoj de Ĝuo Moĵŭo kaj Ŭen Jidŭo, skribitaj en la periodo 1919-1949. Ili prezentas al niaj legantoj la socian fizionomion kaj popolan vivon de la siatempa Ĉinio kaj suferojn, strebadon kaj batalon de ordinaraj ĉinoj. En tiu senco la antologio povas esti rigardata kiel spegulo de la ĉina socio en tiu tempo.

Div. aŭtoroj kaj tradukintoj  
 Kompil. la redakcio de ĈEE  
 612p. Ilus. 21cm. Bind. 10-Es-2064S  
 Prezo: £ 6,40 US\$ 9,80

Mendu ĉe: Libroservo de UEA  
 perantoj de EPC

aŭ Esperanta Sekcio de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio  
 (GUOJI SHUDIAN), P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

## PAROLADO DE D-RO STRIGO

Ĵus subiris la suno. Birdoj kolektiĝis en arbaro por aŭskulti paroladon de d-ro Strigo.

D-ro Strigo estas tre fama. Laŭdire li legis ne malmulte da libroj kaj posedas multajn sciojn. Tial la novaĵo pri lia parolado tuj surprizis ĉiujn en la arbaro.

Post longa atendado de la aŭskultantoj la Strigo malrapide suriris la podion en aplaŭdado. Dirinte kelkajn kutimajn vortojn, li transiris al sia paroltemo. Li multe citis vortojn de famuloj. Lia parolado daŭris de la lunleviĝo ĝis la lunsuĉo. Kiam li ankoraŭ parolis entuziasme, kokeriko jam aŭdiĝis el proksima kamparana korto kaj interrompis lian

paroladon. Eklumis la horizonto. La Strigo levis la okulojn kaj rimarkis, ke la aŭskultantoj jam forflugis. Li nevole kapsalutis la vakajn sidlokojn kaj ĉesigis sian paroladon.

La Strigo kutime dormas tage, sed en tiu tago li neniel povis endormiĝi. Kun fermitaj okuloj, li sin kaŝis en densejo por aŭskulti opiniojn de siaj aŭskultantoj pri lia parolado.

Nun li aŭdis dialogon de turdo kaj oriolo.



“Frato oriolo, kion vi opinias pri la parolado de d-ro Strigo?”

“Laŭ mi, li paroladis kiel papago.”

“Ha ha! Ankaŭ mi havas la saman opinion.”

La Strigo tremis de kolero. Li murmuris en si: “Kion vi scias! Sentaŭguloj...” □

## PAVO

Antaŭe pavo povis flugi. Ĉu sur alta monto ĉu ĉe marbordo oni vidis ĝin fluganta en la ĉielo, kun frapetantaj flugiloj kaj dancanta riĉkolora vosto. Oni admiris: “Kia belega pavo!”


Tion aŭdinte, la pavo fieriĝis. De tiam ĝi ofte haltis sur la tero kaj paradis per sia bela vosto. Post longa tempo ĝiaj flugiloj perdis flugpovon. Nun ĝi povas nur iradi kun peza vosto, balanciĝante sur la tero. □

## Lucky-filmoj tre utilaj por vi!

La Unua Filma Fabriko sub la Kemi-industria Ministerio de Ĉinio estas la plej granda fabriko, kiu produktas plurspecajn filmojn kaj magnetajn materialojn. Ĝiaj produktaĵoj estas uzataj en kinematografio, televizio, kulturo, eduko, naciddefenda industrio, astronautika telegvido, medicino, presado, fotado k.a. Estas pli ol 70 specoj de produktaĵoj, el kiuj tri oni premiis per ŝtata arĝenta medalo, 12 oni titolis elstaraj produktaĵoj de Hebej-provinco aŭ la nomita ministerio kaj 12 oni vendas en 12 landoj kaj regionoj de Azio, Eŭropo kaj Afriko.



乐凯胶卷给您留下幸福的回忆



化工部第一胶片厂

中国保定

电话: 37901 37902  
电报: 5231

Bonkvalitaj kaj bonvenaj estas la koloraj kaj pankromataj Lucky-filmoj de ĉiaj normoj.

Unua Filma Fabriko sub la  
Kemi-industria Ministerio de Ĉinio  
Baŭding, Ĉinio

Tel.: 37901 37902

Telekso: 5231



# PRI LA “DEK NAŬ ANTIĴVAJ POEMOJ”

de MEJ ĜI

Poemo kun kvin ideogramoj en ĉiu verso, unu el la ĉefaj formoj de la klasika ĉina poezio, formiĝis en Han-dinastio (206 a.K. — 220 p.K.). La popolkantoj de *jüefu* de Han-dinastio ĉefe prenis tiun formon. Inluante de la popolkantoj de *jüefu*, literaturistoj de Han-dinastio imite verkis multajn poemojn kun kvin ideogramoj en ĉiu verso. La “Dek Naŭ Antikvaj Poemoj” estas tiaj verkoj. Ili kulminis en la poemoj kun kvin ideogramoj en ĉiu verso de la literaturistoj de Han-dinastio kaj markis ĝian maturiĝon.

Jam perdiĝis la nomoj de la verkintoj de la “Dek Naŭ Antikvaj Poemoj”. Ŝjaŭ Tong, kronprinco de Ljang-regno (502-557 p.K.) de la Sudaj Dinastioj (420-589 p. K.) kolektis ilin en la “Krestomatio” kompilita de li sub la titolo “Dek Naŭ Antikvaj Poemoj”, kaj tiele ĝi fariĝis la propra nomo por tiuj 19 poemoj.

La poemoj ne estis verkitaj de unu sama poeto nek en sama tempo. Laŭ la enhavo kaj stilo oni konjektas, ke ili estis verkitaj de mezaj kaj subaj literaturistoj en la posta periodo de la Orienta Han-dinastio (25-220 p.K.). La poemoj spegulis de diversaj flankoj la psikojn de la verkintoj antaŭ la baldaŭ venonta granda tumulto de la socio, montris iliajn aflikton kaj kontraŭdirojn pro la neefektivigeblaj deziroj en reala vivo, ilian profundan suspirojn kaj maltrankvilon pro la mallongeco de la homa vivdaŭro kaj la fluga paso de la tempo. Tiuj poemoj kun peza sentimentaleco prezentas mallarĝajn temojn, kaj pro tio ne havas altan ideologian valoron. Tamen ili estas signifaj por konado pri la historio. Aliflanke la asimilo de la nutraĵoj de popolaj kantoj kaj la alta klereco de la aŭtoroj dotis la poemojn per aparta arta stilo. Dank’ al tio la “Dek Naŭ Antikvaj Poemoj” fariĝis modeloj por la fruperiodaj lirikaj poemoj en la ĉina literatura historio.

Granda parto de la “Dek Naŭ Antikvaj Poemoj” temas pri aflikto pro malsukceso en la ambicio kaj pri la ĉagreno pro la realo. Tion

kaŭzis en certa grado la malsukceso de la aŭtoroj en promocio. La poetoj ofte esprimis en siaj verkoj emociiĝon pro la mallongeco de la homa vivdaŭro. Iu skribis en sia poemo:

*Inter la ĉielo kaj la tero vasta,  
Homo vivas kiel trapasanto hasta.*

Alia suspiris, ke

*En la universo vivas homo,  
Kiel er’ de polvo en ciklono.*

kaj tria veis, ke

*Eterne alternadas la sezonoj,  
Matena roso estas viv’ de l’ homoj.*

Tamen la sama emocio venis de malsamaj sintenoj. Iuj instigis sin debuti laŭeble pli frue kun senmorta “honoro”. En la poemo “Ĉaro Hezitas en Orientiĝo” la aŭtoro esprimis sian impreson pri la ŝanĝiĝoj viditaj sur la hejmenrevena vojo kaj emociiĝis ĉe la penso, ke tro rapide venas al homo la maljuneco. Tamen la poeto ne estis deprimita pro tio. Li skribis:

*Por ĉio estas propra prosperhoru,  
Tardiĝon sekvas ĉiam nur bedaŭro.  
Ne estas homo ŝtono aŭ metalo,  
Kiel do povas ĉiam bati l’ koro?  
La vivo efemeru en normalo,  
Valoru do akir’ de vivogloro.*

La versaĵoj aprobas, ke oni devas fari ian meriton en sia mallonga vivdaŭro. La aŭtoro de la poemo “Veture el la Nordorienta Pordo” pensis malsame. En la poemo li skribis, ke ankaŭ sanktulo mortas kiel ordinarulo, do estas stulte klopodi por fariĝi sanktulo. Li opiniis, ke ĉio en la homa vivo estas vanta, sekve oni ne bezonas klopodi en sia ambicio kaj strebi al “gloro”. Li opiniis, ke nur luksaj vestaĵoj kaj frandaĵoj estas la plej realaj ĝuoj. Analogaj verkoj estas “Homa Viro Daŭras Malpli ol Cent Jarojn” kaj “Orienta Urbomuro Alta kaj Longa”.

*Se kurtas tag’ kaj longas morna nokto,  
Kial ni ne promenu kun kandelo?*

*Por ĝui l' vivon ja ne perdu tempon,  
Kial preteri ŝancon en prefero?*

En tiaj versaĵoj plievidentas pasiveco kaj dekadenco.

Iuj el la poemoj pri deprimiĝo pro malsukceso en la ambicio kaj afliktiĝo por la socia realo spegulis patoson de la verkintoj, kiuj ne volis resti sur malalta socia pozicio kaj klopodadis por promociiĝo, sed malsukcesis en tio. En "Abunda Festeno Hodiaŭ" troviĝas tiaj versoj:

*Kial ne sur ĉeval' galopi al la celo,  
Por preni gravan lokon sur la tero?  
Kial do resti stagne en mizero  
Kaj ĉiam baraktadi en sufero?*

Por ĉasi altan rangon kaj renomon multaj el la literaturistoj de Han-dinastio migris aliloken por lerni aŭ oficistiĝi, kio fariĝis moro. Tiu socia fenomeno speguliĝis ankaŭ en la "Dek Naŭ Antikvaj Poemoj". Tiuj poemoj temantaj pri migrantoj kaj sopirantaj virinoj konsistigis grandajn procentojn de la poemoj.

Unu el la ĉefaj artaj karakterizaĵoj de la "Dek Naŭ Antikvaj Poemoj" estas ilia lirikeco. La kutima metodo estas kontrastigi per afero aŭ objekto, kunfandi sentojn kaj medion. Ekzemple la poemo "Stelo Bovisto<sup>1</sup> en Foro" priskribas ekskluzive pejzaĝojn kaj enknedis sentojn en la versojn. Ŝajne la poemo priskribas nur du stelojn (Steloj Bovisto kaj Teksistino) sur la ĉielo, sed fakte esprimas aflikton de geamantoj en la homa mondo pro la disiĝo. La plej gravaj versoj por la lirikeco estas:

*Dum tuta l' tago ŝi<sup>2</sup> malmulte teksis,  
Komencis ŝi per pluv' da larmoj plori.*

*Ĉe l' bordoj de la streta Arĝentfluo<sup>3</sup>,  
Ne povas ili eĉ interparoli.*

Kvankam la versoj priskribas nur la teksistinton kaj la medion, ili tamen fidele esprimas la profundan aflikton de la geamantoj pro la disiĝo. En la poemo "Arĝenta Lumo de la Luno" rolas migranto. En nostalgio la migranto sendormis en kulvualo priverŝita per la arĝenta lunlumo. En la kvieta luna nokto pli turmentis lin la hejmsopiro kaj li leviĝis, paŝadis en la ĉambro kaj murmuris al si mem:

*Kvankam migrado estas plezurplena,  
Ja preferindas frua hejmraveno.*

La brila luno verŝis sian arĝentan, frostan lumon sur la plankon. Li iris el la ĉambro kaj rigardis



ĉirkaŭen, sed krom la tero prilumita de la luno nenion vidis. Do al kiu verŝu la hejmsopiron? Larmoj nerimarkite malsekigis la bruston de la kitelo. Escepte de la unuaj du verslinioj, la ceteraj esprimas nur sentojn. La pejzaĝo de hela luna nokto fandiĝis en la sentoj, kaj el tio reliefigas viveca homfiguro sendorma pro nostalgio.

Esprimi pensadon de la aŭtoroj pere de priskribo de detalaĵoj en la vivo, por ke la lirikaj poemoj havu pli da eposeco, estas alia arta karakterizaĵo de la "Dek Naŭ Antikvaj Poemoj", kion ekzemplis poemo "Domego en la Nordokcidento. . ." La poemo priskribis malsukcesinton en ŝtatoficistiĝo, sed la priskribo ne estis rekte direktita al la afliktiĝo de la aŭtoro pro la talento nerimarkita kaj lia malsukceso en la ŝtatoficistiĝo. La poemo priskribis aprecadon de kantado en domego, esprimante simpatian al la kantanto:

*Ne tiom nin ĉagrenas mem la kanto,  
Kiel pokeco de la komprenantoj.*

Pere de tio la poemo montris, ke la aŭskultanto kaj la kantanto komprenas unu la alian pro sia samsorteco, kaj tiel senrezerve elverŝis la morozecon de la aŭtoro pro la malbona sorto. Ĉe la fino de la poemo la aŭtoro esperis, ke li kaj la kantanto kune fariĝos cigoj kaj libere flugos sur la ĉielo. Dank' al la finalo de la poemo reliefigis kaj pliklariĝis la figuro de poeto, kiu strebadis en sia ambicio, tamen ne trovis simpatiaĵon. Poemoj, kiuj montras la psikon kaj skulptis karakterizan homfiguron pere de priskribado pri konkretaj aferoj en la vivo, ne estas malmultaj el la "Dek Naŭ Antikvaj Poemoj". Tion atestis "Jarfino en

Frosto”, “Frosto en Frua Vintro”, “Amato de Malproksimo” k. c.

La tria arta karakterizaĵo de la “Dek Naŭ Antikvaj Poemoj” estas tio, ke tiuj poemoj heredis la bonan tradicion de la “Libro de Poezio” kaj “Poezio de Ĉu”, lerte uzis metaforojn por kontrastigo de sentoj kaj aludon profunde pensigan. Tion bone ekzemplis “Bambuo Kreskas Solece”. La poemo elverŝis la aflikton de novedzino pro la longa disiĝo tuj post geedziĝo. Aperis en la poemo plurfoje metaforoj per vegetaloj. Ĉe la komenco la poemo komparis la heroinon kun “bambuo solece kreskanta”. Poste metaforo “kuskuto implikiĝas kun usneo<sup>4</sup>” prezentas la amon de la novgeedzoj. Sed la edzo migris foren senrevene, kaj ŝi devis sole pasigi jarojn de bela juneco en morna sopiro. Verŝante ŝian malĝojon kaj plendon, la poemo komparas ŝin kun hisopo kaj orkideo. La poemo aludas ŝian ĉarman junecon per “disvolviĝanta floro brilanta” kaj ŝian ĉagrenon pro la paso de la juneco per

*Se l' floron oni plukos tro malfrue,  
Velkiĝos ĝi samkiel herb' aŭtuna.*

La distingiĝaj metaforoj konkrete priskribas la mornan korstaton de la heroino.

La lingvo de la “Dek Naŭ Antikvaj Poemoj” estas simpla kaj natura, sen troa poluriteco, tamen en rafinita sugesto. Tio estas alia distingiĝa karakterizaĵo de la “Dek Naŭ Antikvaj Poemoj”. Ĝenerale dirite, tiuj poemoj konservas en si la simplecon kaj naturecon de popolkantoj, kaj enkorpiĝis la seriozecon kaj atentemon de la verkintoj. □

1. *Stelo Bovisto, ĉina nomo por la stelo Altaĵro en la Konstelacio Aglo, dum la stelo Teksistino, ĉina nomo por Vego, en la Konstelacio de la Liro. En ĉina mito la Teksistino estas ĵeino sur la ĉielo. La Bovisto kaj Teksistino geedziĝis, sed poste ili disiĝis pro la malhelpo de la Ĉiela Reĝino.*
2. *Ŝi ĉi tie sugestas ĵeinion Teksistino sur la ĉielo, edzino de la bovisto.*
3. *Arĝenta Rivero estas ĉina nomo por la Lakta Vojo.*
4. *Usneo, vegetalo latine kiel Usnea logissima, speco de musko.*

## EL LA “DEK NAŬ ANTIKAJ POEMOJ”

### VI IRAS KAJ IRADAS...

*Vi iras kaj iradas sub ĉielo,  
Ĉagrene ni disiĝis pro sortpelo.  
Nun pli ol dekmil liojn<sup>1</sup> fore estas  
La vivoloko via sur la tero.  
La vojo longas, malfacila estas.  
Ja kiu pri revido nia certas?  
Norda ĉeval' sin turnas al nordvento<sup>2</sup>,*

*Sur suda branĉo suda birdo nestas<sup>2</sup>.  
Forglitas temp' sezono post sezono,  
Loziĝas pli kaj pli la strikta zono.  
La brilan sunon kovras flosaj nuboj,  
Migrant' ne povas iri al hejmdomo.  
Oldigas min sopiro kaj domaĝo,  
Rapide maljuniĝas nia aĝo.  
Pri la forlaso jam plu ne parolu,  
Sed penu multe manĝi dum vojaĝo!*



## MI VADAS FLUON...

*Mi vadas fluon jen por lotusfloro,  
Tra riĉa orkidea bonodoro.  
Al kiu mi donacu la plukaĵon?  
Ja vivas mia sopirat' en foro!  
Mi serĉas ronde l' hejmon de intimo,  
— troviĝas nur la longa voj' sen fino.  
La paro de amantoj disigitaj  
Cagrenon ĉiam portas en l' animo.*



## EN MIA KORTO ARB' DE RARA BELO

*En mia korto arb' de rara belo  
Ekfloris, verdĉolia en prospero.  
Tenante branĉon plukis mi floraron  
Por al la sopirato jam livero.  
Aromas kaj l' manikoj kaj la sino,  
Sed vane — estas li en malproksimo.*

### KORESPONDI DEZIRAS

\* Juna esp-isto (26-j.) dez. kor. tm. pri diversaj temoj, kolektas naci-lingvajn gazetojn kaj ĵurnalojn el diversaj landoj. Adr.: Zhang Xiaoyu, Rou Shi-Xiang 5, Nei-jiang, 641000, Sichuan, Ĉinio.

\* 32-j. fervojisto Jia Juncheng dez. kor. kun esp-istoj el Azio pri ĉiuj temoj esperante, angle aŭ japane. Adr.: Cao Yang 7 Cun, 61 Hao, 104 Shi, Shanghai, Ĉinio.

\* Ba Jingke (37-j. instruisto de matematiko) dez. kor. tm. kun esp-istoj pri ĉiuj temoj kaj in-

*Ne altvaloras tiu ĉi donaco —  
El la sopira koro jen esprimo.*

## DOMEGO EN LA NORDOKCIDENTO...

*Domego staras en Nordokcidento  
Kaj nubojn skrapas en la firmamento;  
Tre belas la fenestroj filigranaj  
Kaj l' tri ŝtuparoj, ĉarmas la tegmento.  
Aŭdiĝas en ĝi kant' kaj kordmuziko  
Plendantaj pro malĝojo kaj tragiko!  
Ja kies verko estas en prezento?  
Ĉjiljang-edzina<sup>3</sup> kanto en praktiko.  
Muzikon Ĉingŝang<sup>4</sup> portas dise l' vento,  
Ripete sonas meza l' movimento.  
Akord' vibradas eĥe al la tonoj,  
Kortuŝas ĝia trista sentimento.  
Ne tiom nin ĉagrenas mem la kanto,  
Kiel pokeco de la komprenantoj.  
Fariĝu paro da sovaĝanseroj  
Kaj flugu alte al la ĉielrando.*

Elĉinigus LAŬLUM

1. lio = duonkilometro.
2. La hejmsopiraj ĉevalo kaj birdo tiel sin lokas por esprimi sian inklinon.
3. En la periodo de Printempo kaj Aŭtuno (722-481 a. K.) kortegano Ĉjiljang de Ĉji-regno martiriĝis en milito. Lia edzino ploris dek tagojn kaj poste sin mortigis.
4. Ĉingŝang estas la titolo de muzikaĵo.

terŝanĝi pm. kaj katalogojn de pm. Adr.: Changji Shi Jiaoshi Jinxiu Xuexiao, Changji, Xin-jiang, Ĉinio.

\* 25-j. inĝeniero dez. kor. kun orientaziaj kaj mezaziaj gekorespondantoj. Didier Chazal, Route de Rustrel, 84400, APT, Francio.

# OK SANIGAJ EKZERCOJ (IX)

(Daŭrigo)

Frotu ambaŭ manojn ĝis varmigo kaj frotu per manplato la plandkavojn po pli ol 80 fojojn (Bildo 23). Vi povas tion fari horizontale aŭ vertikale.

La plandkavo ĉe la rena vojo de pied-ŝaŭjin, kiu komenciĝas de la piedkavo kaj finiĝas ĉe la supra brusto, estas loko, kie malutila vitalaĵo malleviĝas. La frotado malfortigas ekstreme varman simptomon kaŭzitan de nesufiĉa vitala esenco de la renoj kaj mallevas malutilan vitalaĵon de la brusto, tiel ke la hepato kaj okuloj funkcias bone. Estas multe pli efike froti la plandkavojn post piedlavo.

La frotado de la plandkavoj tre faciligas nazspiron.

La piedoj estas plej malproksime de la koro, plej malalte

kaj ofte premataj, tial al ili ofte okazas nesufiĉa sangocirkulado kaj malhelpo al refluo de la vejna sango, precipe en vintro la sango cirkulas pli malbone. Pro tio la piedoj tre facile malvarmiĝas kaj edemiĝas. La ofta frotado de la plandkavoj povas akceli sangocirkuladon, sango-provizon kaj limfan kaj vejnan funkciadon. Tial la frotado estas utila por preventi kaj kuraci al maljunulo piedajn formikadon, malvarmiĝon, edemon, per-nion k. a.

La plandkavoj, sentemaj je ekscito, estas malproksime de la cerbo, tial la ekscito al ili povas esti fortan fiziologian efikon per nerva reflektio. La ofta frotado utilas al la fiziologia funkcio de iuj histoj kaj organoj.



Bildo 23

Ekscitado al la plandkavoj utilas ankaŭ al kuraco de sveno, ŝoko, kapturniĝo, malklara vido, hipertensio, angino, afazio, palpacio, epilepsio, sendormo, konvulsio de la malsupraj membroj, vertalgio k. a. □

## KORESPONDI DEZIRAS

- \* 39-j. instruistino, kiu interesiĝas pri astrologio, geografio, vojaĝoj, muziko, volas kor. kun tm. esp-istoj. Adr.: Bezenna Slezak, Lodz 90-368, ul Piotrkowska 182 M 505, Pollando.
- \* Dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj interesiĝante pri Esperanto, naturo, turismo kaj muziko. Adr.: Both Jolan-Rita, Str. Kozeptiz Nr. 380, Loc: Sindominic Jud:Harghita cod: 4142, Rumanio.
- \* 27-j. instruisto, fotisto kaj filatelisto dez. kor. tm. kaj interŝanĝi pm. Adr.: Marek Jama, 53-649 Vroclavo-Wroclaw, ul Jnovroctavska-str 25/9, Pollando.
- \* Esp-istoj-komencantoj (9-14j.) el Ĉeĥoslovakio dez. kor. tm. pri diversaj interesoj. Adr.: Pionira Domo-Esperanto, ĈSSD, 017 01 Povazska Bystrica, ĈSSR.
- \* Kolektanta sekcio de SK dez. ricevi insignojn pri karateo, uŝuo, E-to kaj aliajn. Sendanto de ili ricevos egalan nombron da sovetiaj insignoj aŭ alian deziratan. SK, Kesto 27, Postamt, Minsk, 220050, USSR.
- \* Kolektanta sekcio de SK dez. ricevi pk. pri karateo, uŝuo, katoj, E-to, aktoroj, belulinoj kaj aliaj. Sendanto ricevos egalan nombron da sovetiaj pk laŭ indikita per vi temo. SK, Kesto 27, Postamt, Minsk, 220050, USSR.
- \* Nacia k Internacia Nomo-Servo. Sola distribuanto de nacia kaj internacia nomverko. 50 bilionoj da div. nomoj. Adreso: Viljo Eronen, PL-685, SF-00101 Helsinki, Finnlando.
- \* Dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Adr.: Dragomir Julieta, Str.: L. Pasteur nr 73, Bl Viie Ap 29, Ro-3400 Cluj-Napoca, Rumanio.
- \* Esperanto Klubo de urbo Tamasi dez. kor. tm. pri turismo, popolaro, ĝardenado, alternativaj kuracmetodoj. Ni kolektas b, p, kaj lecionojn en Esperanto. Adr.: Csurgo Sandor Esperanto Rondo, H-7090 Tamasi, Gardonyi u, 19, Hungario.
- \* 22-j. f-ino dez. kor. tm. Ravazadeh, K. Englab/23, KH. Marvdasht, KH. Moalem Tehran 16397, Irano.

# VINUJOJ DE LA ANTIKVA ĈINIO

En 1974-1978 ĉinaj arkeologoj faris prifoson en la ruino de la ĉefurbo de la antikva civilizita regno Ĝongŝan (la nuna gubernio Pingŝan de Hebej-provinco), kiu ekzistis antaŭ 2 300 jaroj, kaj trovis en la maŭzoleo de la regnestro du bronzajn kruĉojn kun vino. Malferminte la kovrilon, oni tuj ekflaris la agrablan odoron de la vino. Antaŭ nelonge en la gubernio Lŭoŝan de Ŝinjang-subprovinco de Henan, ĉinaj arkeologoj trovis hermetike fermitan bronзан *joŭ-on* kun unu kilogramo da vino en


tombo ekzistinta 3 000 jarojn (*joŭ-o* — antikva vinujo kun granda ventro kaj malgranda aperturo). Ĝi, ŝajne, estas la plej antikva vino nun konservata en la mondo. La prapatroj de ĉinoj jam scipovis fari vinon, trovinte grenon manĝebla. Laŭdire, antaŭ 4 000 jaroj la monarko Ju de Ŝja-dinastio (la 21-a jc. — la 16-a jc. a.K.) profetis pri vino, ke “Estonte certe okazos ŝtatpereo pro vino”. Pli ol 400 jarojn poste, lia profetaĵo estis pruvita. La lasta monarko Ĝje de Ŝja-dinastio estis kruela kaj

diboĉema. Lia viand-stoko altis montete kaj la vino eĉ plenigis basenon. Li diboĉis senfine. Lian festenon ĉeestis 3 000 drinkemuloj, dum la ordinaraj popoloj baraktis en mizera vivo. Fine la regado de Ĝje estis renversita de la tribo Ŝang.


En Ŝang-dinastio (ĉ. la 16-a jc. — la 11-a jc. a.K.) oni jam povis produkti kelkajn specojn de vinoj, kiaj riz-vino kaj dolĉa vino.

Ĉinoj prenas vinon ne nur kiel trinkaĵon sed ankaŭ kiel kultaĵon religian. En la antikva Ĉinio oni trinkis vinon por adiaŭi siajn

*Bronza vinujo de Ŝang-dinastio*



*Vinvarmiga kruĉo de Song-dinastio*







Arĝenta kruĉo (maldekstre) kaj ora taso (dekstre) de Tang-dinastio



Bludesegna porcelana vinkruĉo de Ĵuan-dinastio

amikojn, soleni venkon, celebri festotagon kaj alianciĝon, akcepti gastojn, entombigi mortinton, okazigi nupton ktp.

Ĉinio havas longan historion pri vinotrinkado kaj en ĝi estas diversaspecaj vinuoj, kiaj bronza, feraj, stanaj, oraj, arĝentaj, jadaj kaj ceramikaj. El la vinuoj de diversaj dinastioj en la ĉina historio tiuj de Ŝang-dinastio estis la plej rafinitaj laŭ siaj malsamaj destinoj, kiel vinodistilejo, vinotenujo kaj vinotrinkilo. Tiam oni eĉ uzis malsamajn bronzaĵojn por malsamaj vinoj. Ekzemple, la bronza *joŭ-o* estis destinita por enteni vinon el nigra milio kaj tulipo. Post la kulta ceremonio oni verŝis tiuspecan vinon surteren por trinki diojn kaj fantomojn aŭ donaci al meritohavaj subuloj. *Joŭ-o* estis uzata en Ŝang-dinastio kaj en la unuaj jaroj de la Okcidenta Ĝoŭ-dinastio (ĉ. la 11-a jc. — 771 a.K.). Kaj en la posta periodo de la dinastio *joŭ-o* aliformiĝis kaj ne plu troveblis.

En Ĉinio estis multaj famaj drinkemaj poetoj. Oni donis al la granda poeto Li Baj en Tang-dinastio (618-907 p.K.) kromnomon Ebria Feo. Oni diris, ke li povis verki cent poemojn post ebriiĝo. Ju pli multe li drinkis, des pli energia

li fariĝis en kreado de versoj. Foje, imperiestro Li Longĝi kun sia edzino aprezis prosperantajn peoniojn kaj deziris ĝui ankaŭ novan kanton, tiel ke li ordonis venigi Li Baj por verki versojn. Tiam Li Baj estis morte ebria. Oni do portis lin al la imperiestro, kaj tiu ĉi ordonis prepari por li malebriigan supon. Li Baj do verkis tri famajn poemojn kun la titolo Ĉingpingdjaŭ, kiuj estas recitataj eĉ hodiaŭ en Ĉinio. Li Baj ne nur estis drinkema, sed ankaŭ erudicia pri vinuoj. Jen liaj famaj versoj:

*La vino de Lanling aromas  
je tulipodoro,  
en jada bovlo brila je  
sukcenkoloro.*

Ankaŭ alia fama poeto Ŭang Han de Tang-dinastio verkis belajn versojn:

*Rebrilas vino en scintilaj  
blankaj jadpokaloj,  
por trinki, sed nin urĝas  
bivludistoj sur ĉevaloj.*

Taso noktluma estas farita el jado blanka, flava, verda aŭ nigra de Ĉjiljan-montaro, Gansu-provinco.

En Song-dinastio (960 — 1280 p.K.) oni turnis grandan atenton al la koloroj de vino kaj taso, kaj plie, inventis kruĉon por varmigi

vinon, kiu estas subtenata de bovlo. Antaŭ la trinko oni verŝis varman akvon en la bovlon por fari la vinon en la kruĉo varmeta. Ĝi estas oportuna kaj belaspekta. Tia kruĉo furoris en Song-dinastio. Sur freskoj kaj pentraĵoj de Song-dinastio videblas tia vinkruĉo sur tablo de kunvenantaj literaturistoj.

Oni elterigis *joŭ-on* de Ŝang-dinastio kaj tian kruĉon de Song-dinastio en Ĝjangŝji-provinco. La bronza *joŭ-o*, elterigita en 1986 en Sujĉuan-gubernio, Ĝjangŝji-provinco, aspektas elipsa, kun kovrilo, cirkla piedo kaj tenilo. Ĝi havas sur si okulplaĉajn geometriajn figurojn, kun muldita epigrafo en la interno de la kovrilo kaj sur la fundo. Ĝi jam estis sub la tero 3 000 jarojn, tamen ĝi ankoraŭ brilas metale kaj restas sendifekta. Vera raraĵo ĝi estas!

Alia kruĉo por varmigi vinon, elterigita en Ĉjanŝan-gubernio, Ĝjangŝji-provinco, estas blublanka porcelanaĵo. La rando de la subtenanta bovlo prezentiĝas ondoforma, kun desegnaĵoj. La kruĉo-verŝilo estas svelta. Sur la kovrilo estas sida leono, versimile skulptita. Ĝi estas ne nur taŭga ujo, sed ankaŭ delikata atraĵo. □

## KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: 1 internacia respondkupo por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

\* 25-j. fraŭlo Wang Hong dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj, kolektas pk, pm, kaj glumarkojn, precipe kun tiuj, kiuj vizitos Ĉinion. Adr.: Hunan Xinhua Yinshua Yichang, Changsha, Hunan, Ĉinio.

\* Juna pedagoga geedzparo dez. kor. kun esp-istaj familioj. Jozefo Nemeth, Tomord, Ady u 6, 9738 Hungario.

\* Inĝeniero, vegetarano, naturistoj. kor. tm. pri naturaj rimedoj por resanigo kaj reunigo. Adr.: S-ro Inĝ. Ionel Hiristea, Gruia 58 Cl ap. 8, Cluj-Napoca, Ro-3400, Rumanio.


\* 22-j. f-ino dez. kor. tm. Ravazadeh, K. Englab/23, KH. Marvdasht, KH. Moalem Tehran/16397, Irano.

\* Dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Adr.: Bede Hajnal, Jnimii, Bl: 10, Ap: 10, 4100-Miercurea-Ciuc, Jud: Harghita, Rumanio.

\* Dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Adr.: Dragomir Julieta, Str.: L. Pasteur nr. 73, Bl Viie Ap 29, Ro-3400 Cluj-Napoca, Rumanio.

\* Komencanto deziras korespondi bildkarte (prefere bildoj de sunsubiroj): S-ro Claes Bredvad-Jensen, Lilliegatan 8-57, S-416 47 Gotenburgo, Svedio.


## LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Naturparko Sjiŝuangbanna
2. Naturparko Ĝjanfengling
3. Daljan-haveno
4. Ĉinhŭangdaŭ-haveno
5. Jingkoŭ-haveno
6. Tjanĝin-haveno
7. Jantaj-haveno

8. Ĉingdaŭ-haveno
9. Ljanjungang-haveno
10. Nantong-haveno
11. Haveno de Sanhajo
12. Ŭenĝoŭ-haveno
13. Hangĝoŭ-haveno
14. Ĝjilong-haveno

15. Ĉjŭangŝoŭ-haveno
16. Fuĝoŭ-haveno
17. Ŝjamen-haveno
18. Santoŭ-haveno
19. Haveno de Kantono
20. Ĝanĝjang-haveno
21. Bejhaj-haveno



*Congming, la tria granda insulo de Ĉinio, kun 11 mili-  
noj da arboj en totala arbara areo de 346 hektaroj*

**ĈEN JUĈJONG:**

## **KIAN INFLUON HAVAS LA KLIMATO SUR LA SOCION KAJ EKONOMION**

En la 20-a jc. senĉese kreskis la monda loĝantaro (en 1930 ĝi nombris 2 miliardojn, en 1975 — 4 miliardojn kaj nun ĉ. 4.8 miliardojn), kio akcelis la ekspluatadon kaj utiligon de la limigitaj riĉfontoj kaj sekve plimultiĝis la sentemajn regionojn de klimato. La reduktiĝo de la grena rezervo (la konsumebla greno rezervo de la tuta mondo en 1961 estis sufiĉa por 105 tagoj, en 1970 — por 89 tagoj, en 1973 — por 55 tagoj kaj en 1975 — nur por 35 tagoj) kaj la anormala klimato de la mondo

en la 70-aj jaroj serioze minacis la ekonomion de iuj landoj kaj atentigis ĉiujn landojn de la mondo pri la klimato. Nun oni ĝenerale opinias, ke klimato estas la plej kaprica kaj plej malfacile regebla el la mediaj faktoroj. En 1979 la Monda Meteologia Kongreso ellaboris la mondan meteorologian planon kun kvar subplanoj, nome esploro pri klimato, klimataj influoj, materialoj kaj la influo fare de la homa aktivado sur la klimaton.

Ĝenerale, klimato havas kaj utilan kaj malutilan influojn sur

la homaron. Unuflanke, la malsamaj klimatoj donas gravajn mediajn kondiĉojn por la formiĝo de diversaj faŭnoj kaj flaŭroj kaj por la homaro en gajno de ekstreme abundaj naturaj riĉfontoj; aliflanke, la klimataj katastrofoj (ekz. malalta temperaturo, varmego, inundo kaj trosekeco) minacas la homan vivon kaj ekonomion. La grado de influo de klimataj katastrofoj sur la homan socion kongruas kun ofteco, seriozeco kaj tempo-daŭro de katastrofoj kaj ankaŭ kun la vivmanieroj, ekonomia



strukturo de la socio, volo kaj rezistpovo kontraŭ la katastrofoj kaj kompreno pri ili de la damaĝitaj landoj. En la fino de la 70-aj jaroj oni montris, ke klimato iom post iom disvastigas sian influon sur la homaron de rektaj naturaj fenomenoj al la tuta socio, kio inkluzivas jenajn 5 flankojn: ŝanĝiĝo de klimato mem, la influo sur la ekologian sistemon kaj naturajn kaj geografiajn mediojn, la influo sur la homan ekonomion kaj sociajn aktivadojn. reago de la homa socio al la influoj, kia konstruado de agrikulturaj hidraŭlikaj konstruaĵoj kaj la influo sur la superstrukturon inkl. de ellaboro de politikoj kaj leĝoj, internaciaj kunlaboroj k.a. Krome oni devas montri, ke la klimato influas la socion kaj longtempe kaj mal-longtempe. Oni devas precipe atenti la longtempan influon kaj ĝian estontan sekvon.

La influoj de la klimato sur la homan socion kaj ekonomion montriĝas ĉefe en jenaj flankoj:

### **KLIMATA ŜANĜIĜO ESTIGAS HOMAN TRANSLOĜIĜON KAJ MALSATEGON**

Jam en la 2 000-a jaro a.K., oni notis en la antikva egipta libro: "Rivero sekiĝis kaj homoj povas travadi nudpiede." "Malsatego kaj morto volvas la supran Egiption kaj oni manĝas eĉ siajn infanojn." De 1271 ĝis 1285 ie en la usona ŝtato Kolorado sinsekve okazis trosekeco, kio devigis la antikvajn indianojn, longe loĝantaj en kaverno, fuĝi aliloken. En la 11-a jc. estis multaj loĝantoj en Anglio pro la modera klimato kaj poste reduktiĝis la nombro de la loĝantoj, pro tio, ke tie fariĝis iom post iom malvarme. Inter 1638 kaj 1641 Ĉinion atakis longedaŭra trose-

keco nekonata dum mil jaroj. La plago volvis 11 provincojn. "Dezertiĝis mil kilometroj da tero", "Grenplantoj ne kreskas", "Ne videblas eĉ herboj sur la tero", "Multe altiĝis la grenaprezono", "Malpleniĝis la domoj plejparte", "Survoje ĉie kuŝis mortintoj pro malsato" kaj "Homoj manĝas unu alian", ĉio ĉi estis vera priskribo de la tiama stato. De 1968 ĝis 1973 Saharo de Afriko suferis de 6-jara kontinua trosekeco, kio kaŭzis la plej gravan malsategon en la 20-a jarcento.

### **KLIMATAJ KATASTROFOJ KAJ PERDOJ DE LA HOMOJ KAJ EKONOMIO**

Laŭ statistikoj, el la 484 naturaj katastrofoj, la klimataj estis 343, t.e. 70% de la totala nombro. Kaj la mortintoj en la klimataj katastrofoj konsistigas 70% de tiuj kaŭzitaj de la naturaj katas-

*Malgranda oazo en dezerto de miloj da jaroj en Gongŭej-gubernio, Ningŝja*



trofoj. Tio montris, ke la ĉefa kaŭzo de la naturaj katastrofoj estas klimata. Krome oni trovis, ke ciklono de la tropikaj zonoj estas plej danĝeraj. La materialoj pri 1966-1977 faritaj de la Ekonomia Komisiono de Azio kaj Pacifiko montris, ke la ciklono de la tropikaj zonoj meznombre mortigas 15 000 homojn kaj kaŭzas ekonomian perdon je 2.631 miliardoj da usonaj dolaroj ĉiujare. Laŭ la statistikoj faritaj en 1979 la ciklono de la tropikaj zonoj ĉiujare perdis 6 miliardojn da usonaj dolaroj.

Laŭ nekompletaj statistikoj, inter 180 a.K. kaj 1949 p.K. en Ĉinio okazis minimume 203 klimataj katastrofoj, ĉiu kun pli ol 10 000 mortintoj. El tiuj katastrofoj la plej grandnombraj estis inundoj, uraganoj en dua loko, malsatego kaj trosekeco okupis la trian lokon kaj malvarmego estis la lasta. Sed juĝate laŭ la nombro de la mortintoj trosekeco kaj malsatego estis la plej grava, malvarmego okupis la duan lokon, inundo la trian lokon kaj uragano mortigis plej malmulte.

Studinte la historion de 1600-1867, kiam Japanio izolis sin de la ekstera mondo, ĝia ekonomia fonto ĉefe estis rizo, la nombro de la loĝantoj ne multe ŝanĝiĝis kaj la socio estis stabila, iuj japanoj trovis, ke tiam la agrikultura rikolto de Japanio strikte ligiĝis kun la klimato, dume la socia kaj loĝantara ŝanĝiĝo rilatis kun la agrikultura rikolto. Tial nelonge post la sterila jaro la socia ŝanĝiĝo de Japanio pligrandiĝis. La variigo de loĝantoj ĝenerale kongruas kun tiu de la agrikultura rikolto, tamen tia variigo postigas-je 20 jaroj.

Ke la klimataj katastrofoj influas la socian ekonomion, tio

estas kompleksa problemo. Oni ne povas esprimi ilin ĉiam per ekonomiaj ciferoj. Tamen la ekonomia perdo kaŭzita de klimataj katastrofoj montras, ke la klimata influo sur la ekonomion ne estas subtaksebla. En 1900-1978 Usono perdis 10.3 miliardojn da usonaj dolaroj pro uragano. Ĉiujare Usono perdas 12.7 miliardojn da usonaj dolaroj pro malfavora klimato. En 1970-1979 Aŭstralio perdis 2 000 miliardojn da aŭstraliaj dolaroj pro klimataj katastrofoj, dume la duonon de la perdo kaŭzis ciklono kaj inundo ĉe Brisbano en 1974. Komence de 1984 Eŭropon atakis malvarma ondo kaj neĝoŝtormo la plej severaj en la nuna jarcento. En la Norda Eŭropo abrupte altiĝis la prezoj de ŝtonoleo kaj benzino pro grandkvanta uzo de benzino por hejtado.

## INFLUO DE KLIMATO SUR AGROKULTURON

La klimataj ŝanĝiĝoj kaj anormaliĝoj havas klaran influon sur agrokulturon. La unua ŝanĝas ne nur la produktokvanton, sed ankaŭ la flaŭron. Ekz. enmigrintoj fiksloĝiĝis en Islando en 870 p.K. Tiam tie la tero plejparte taŭgis por graminacoj, sed en la 13-a kaj 14-a jc. la tiea klimato malvarmiĝis kaj oni povis kulturi nur hordeon kun mallonga kreska periodo, kaj sekve en la 16-a jc. oni ne plu plantis graminacojn. Sed de post 1920 aveno kaj hordeo denove fariĝis kultureblaj tie kaj plie bone kreskis. Por tio la kultura areo rapide plivastiĝis. Fama ĉina klimatologo Ĝu Keĝen en sia verko "Unuapaŝa studo pri klimata ŝanĝiĝo de Ĉinio dum la 5 000 jaroj" traktis pri la rilatoj inter la klimataj ŝanĝiĝoj kaj la limlinio por kreskado de oranĝoj en Ĉinio.

La influo de la klimato sur la agrokulturon rilatas ankaŭ al la ekspluato kaj apliko de la klimataj riĉfontoj. Ekz. en la baseno de Jangzi-rivero de Ĉinio la varmo estas abunda por rizo unurikolta jare, sed nesufiĉa por la durikolta. La esplorado montris, ke la malalta temperaturo en somero de Ĉinio ne estas neglektebla klimata faktoro, malutila al la kresko de la agrikulturaj plantoj. En la malalttemperatura jaro en somero en la baseno de Jangzi-rivero, la riza produktokvanto povas malleviĝi je 10%. En la malalttemperatura jaro en la Nordoriento, Nordokcidento kaj la baseno de Jangzi-rivero ankaŭ la produktokvanto de la akcesoraj grenoj povas malleviĝi je 10%, dume la totala grena produktokvanto de la tuta Ĉinio povas malleviĝi je 5%.

Resume dirite, la klimata influo sur la homan socion kaj ekonomion estas tre kompleksa problemo. La malsama lokiĝo kaj diferenca intenseco de la klimataj katastrofoj en tempo kaj spaco povas ŝanĝi la kaŭzon kaj staton de la katastrofoj en la malsamaj lokoj, kaj plie la socio povas graviĝi kaj malgraviĝi la katastrofojn, tiel ke estiĝas akcesoraj, aŭ pluraj sinsekvaj influoj. Ekz. en 1943-1944 diluvo en Bangladeŝo englutis ĉ. 3-4 milionojn da homoj. Tio estis klimata katastrofo kaŭzinta la plej severan mortigon en la nuna jarcento. La diluvo komplete neniigis la rizan rikolton kaj kaŭzis malsategon. Kaj la socian kaŭzon formis la milito, kiu ŝtopis la vojon por importi rizon. El tio vidiĝas, ke en esplorado de la influo de la naturaj katastrofoj sur la socion kaj ekonomion, oni devas studi sciencojn pri la naturo, socio, ekonomio k.a. □

# LA MARBORDO DE ĈINIO

de LAN ŜAN

Ĉinio havas ne nur vastan teritorion, sed ankaŭ longan marbordon, kiu komenciĝas norde de la enfluejo de Jalu-rivero inter Ĉinio kaj Koreio, finiĝas sude ĉe la enfluejo de Bejlun-rivero inter Ĉinio kaj Vjetnamio, longas je ĉ. 14 000 km. kaj formas arkon elstarantan sudorienten. Ekster la ĉeftero dissemiĝas multaj insuloj. La totala marbordo de Ĉinio, inkluzive de la marbordo de la insuloj, longas je 20 000 km.

Laŭ la longa kaj zigzaga marbordo dislokiĝas multaj havenoj, kiuj kvazaŭ perloj inkrustiĝas ĉe la ĉeftera rando. Laŭ la situo la ĉinaj marhavenoj dividiĝas en riverbuŝajn kaj naturajn marhavenojn. La tri grandaj riverbuŝaj marhavenoj de Ĉinio estas la havenoj Tjanĝin, Ŝanhajo kaj Hŭangpu de Kantono. Ili sin ligas kun la landinterna parto ne nur per riveroj, sed ankaŭ per fervojoj, ŝoseoj kaj aerlinioj. Ĝuste pro tio ili havas vastan

landinternon kaj fariĝis centroj de akva kaj tera trafiko kaj marhavenoj por eksterlanda komerco. La naturaj marhavenoj, ĉirkaŭitaj de insuloj kiel ventŝirmiloj, plejmulte lokiĝas en golfoj kun profunda kaj vasta akvaro. Daljan-haveno de Ljaŭdong-duoninsulo, Ĉingdaŭ-haveno de Ŝandong-duoninsulo, Ĉanĝjang-haveno de Lejĝou-duoninsulo kaj Ĝjilong-haveno de Taj'ŭan-insulo ĉiuj estas famaj naturaj marhavenoj.

*La plej granda ĉina haveno en Ŝanhajo*







La marhavenoj estas la pordoj de la ĉeftero. Antaŭ pli ol 2 000 jaroj Ĉinio jam posedis relative altan ŝipkonstruan teknikon kaj iom post iom malfermis surmarajn trafikajn vojojn. En la komenco de la 12-a jc. Ĉinio jam aplikis kompason en la gvido de marŝipoj. Inter 1405-1433 la fama ĉina navigisto Ĝeng He (1371-1435) sep-foje gvidis ekspedicion al la regionoj okcidente de la Suda Ĉina Maro, atingis sinsekve Hindaĉinio, Malakan Duoninsulon, Malajan Insularon, Hindion, Persion, Arabion, eĉ la orientan marbordon de Afriko kaj bordon de la Ruĝa Maro, kaj starigis amikan rilaton kun pli ol 30 aziaj kaj afrikaj landoj.

Kun la senĉesa disvolviĝo de la ekonomia konstruado kaj efektiviĝo de la pordmalferma politiko, Ĉinio unue starigis specialan ekonomian distrikton en la marbordaj urboj Ŝenĝen, Ĝuhaj, Ŝantoŭ kaj Ŝjamen, kaj poste plie malfermis al fremdaj landoj la marhavenajn urbojn Dalian, Ĉinhŭangdaŭ, Tjanĝin, Jantaj, Ĉingdaŭ, Ljanjungang, Nantong, Ŝanhajo, Ŭenĝoŭ, Fuĝoŭ, Ĉjŭanĝoŭ, Kantono, Ĝangjang kaj Bejhaj kaj Hajnan-insulon. Dank' al la plena utiligo de la geografia situo kaj favoraj kondiĉoj de tiuj urboj kaj praktiko de specialaj politikoj en tiuj lokoj, nun ili ludas pli kaj pli gravan rolon en la ekonomia konstruado de Ĉinio.

La ĉina marbordo, ĝenerale dirite, povas dividiĝi en du kategoriojn, kun Hangĝoŭ-golfo kiel la limlinio: sablan bordon kaj rokan. Norde de Hangĝoŭ-golfo ĉefe estas sabla marbordo — ŝlima marbordo, kun simpla strukturo kaj vasta kaj ebena plaĝo. Ili formiĝis ĉefe el la ŝlimo kaj sablo alportita de la



*Putoboraj platformoj en la oleriĉa Bejbu-golfo ĉe Bejhaj*



*Dajŝji-salejo sur la insularo Ĝoŭŝan*

Flava Rivero, Hajhe-rivero kaj aliaj sabloriĉaj riveroj ĉe la enmariĝo, pro puŝado kaj amasiĝado de la fluso kaj tajdo. La ŝlima bordo de Ĉinio estas vasta kaj longa, kaj la plej tipa estas la okcidenta bordo de Bohaj-golfo. La grandkvanta amasiĝo de ŝlimo kaj sablo senĉese grandigas la teran areon.

Sude de Hangĝoŭ-golfo, precipe en la provincoj Ĝeĝjang kaj Fuĝjan, montaroj paralelaj kun

la marbordo, forte eroziitaj de ondegoj, formiĝis en rokan bordon kun multaj insuloj kaj golfoj. Ĝi karakteriziĝas per grandaj leviĝo kaj malleviĝo, zigzagaj kaj krutaj bordlinioj, profunda akvo kaj longaj golfoj, abundo da insuloj kaj bonaj naturaj havenoj.

La marbordo de Ĉinio estas kompleksa, ankaŭ sude de Hangĝoŭ-golfo estas sabla bordo kaj norde de ĝi, ekzemple en Ŝandong-duoninsulo kaj Ljaŭdong-

duoninsulo, apud Ĉinhŭangdaŭ kaj Huludaŭ ĉe la norda bordo de Bohaj-golfo, troviĝas roka bordo. Krome, la marbordo kun rizofora (*Rhizophora apiculata*) arbaro en la provincoj Fuĝjan kaj Gŭangdong, tiu de koralaj rifoĵoj de Taj'ŭan kaj la insuloj de la Suda Ĉina Maro kaj la faŭlta bordo oriente de Taj'ŭan donas pliajn kolorojn al la ĉina marbordo.

La marbordaj regionoj de Ĉinio estas riĉaj je mineraloj. Estas mondfamaj la riĉaj ŝtonoleaj rezervokvantoj de la olekampono, Dagang de Tjanĝin kaj la Suda Ĉina Maro de Gŭangdong-provinco. Ankaŭ la magnezio de Jingkoŭ, Ljaŭning-provinco, fosforo de Ljanĵungang, Ĝjang-

su-provinco, oro de Jantaj, Ŝandong-provinco, volframo, stano, antimono, bismuto, kupro, plumbokaj zinko ĉe la marbordo de Gŭangdong-provinco kaj karbo de Taj'ŭan ĉiuj okupas gravan lokon en Ĉinio. La proksima maro de Ĉinio estas la plej granda salo-rezervejo, laŭ la marbordo de Ljaŭdong-duoninsulo en nordo ĝis Hajnan-insulo en sudo dislokiĝas multaj salejoj, inter kiuj la plej famaj estas Ĉanglu-salejo ĉe Bohaj-golfo, Hŭajbej-salejo ĉe la marbordo de la norda Ĝjangsu-provinco kaj Jinggehaj-salejo de Hajnan-insulo. La marsala produkto-kvanto de Ĉinio okupas la unuan lokon en la mondo.

En la ĉinaj maroj produktiĝas rubandaj fiŝoj, ŝtonkapaj fiŝoj, sepioj, salikokoj, perloj k.a. fame konataj tra la mondo. La insularo Ĝouŝan estas la plej fama fiŝejo de Ĉinio. Ostroj, haliotoj (*Haliotis gigantea*) kaj marĉevaloj en la proksima maro de Gŭangdong-provinco, ĥelonioj kaj holoturioj sur insuloj de la Suda Ĉina Maro, pageloj, ŝarkoj kaj kacuvonoj (*Katsuwonus pelamis*) en la proksima maro de Taj'ŭan ĉiuj estas famaj raraj marproduktaĵoj.

Ĉe la ĉina marbordo troviĝas multaj famaj turismaj lokoj kun groteskaj terformoj kaj ĉarmaj pejzaĝoj, kaj ankaŭ multaj naturaj banejoj kaj somerumejoj kun vastaj kaj ebenaj plaĝoj. □

(*Daŭrigo de p. 32*)

devis diri sentime, ke la vestoj kaj koliero estas miaj donacoj. Kial vi toleris la ofendon? Kiel stulte!"

Juhŭa karese diris kun rigardo fiksita sur li: "Mi silentis pro vi."

"Pro mi?" Je Ĉiŭ estis konfuzita.

"Jes, pro vi." Juhŭa klinis la kapon kaj klarigis iom aflikte: "Vi edziĝos estontece, ĉu mi povus lasi vin kraĉi? Ĉe ni en la kamparo fraŭlinoj plej malŝatas virojn facile ŝanĝantajn sian amatinon. . ."

Je Ĉiŭ venis al plena kompreno. Li kolere kriegis piedbatante la plankon: "Ho vi, denove stultaĵojn vi diris. Ĉu estas destinite, ke mi edziĝos nepre al alia fraŭlino? Ĉu mi ne povas edziĝi al vi? Nu, rekte diru al mi, ĉu vi vere ne volas edziniĝi al mi?"

Juhŭa mallevis la kapon kaj kvazaŭ vidis, ke balancadis antaŭ ŝiaj okuloj la ferocaj vizaĝoj de la priserĉantoj. . .

Je Ĉiŭ pli kaj pli furioziĝis kaj, malgraŭ la deteno de Juhŭa, entruĝis en la hejmon de la kadro kaj kverelis kun li. Li mem ne sciis, kial li tiel forte flamiĝis. La rimarkigojn de la kuracistoj li tute forgesis.

Kelkajn tagojn poste, la vera ŝtelinto estis malkovrita. Tiu estis juna aktorino nove engaĝita en la ensemblon, kiu ĵus fametiĝis en sia provinco. Ŝi konfesis, ke la kadro adultis kun ŝi, kiam lia edzino forestis pro vizito al sia hejmloko. Ŝi avidis la luksan vivon en la urbego kaj luksajn objektojn, sed ŝi ne estis sufiĉe riĉa por ĝui tian vivon. Ŝi do utiligis adultadon kun la kadro kaj ŝtelis en lia domo oran kolieron kaj monon. La aliajn domojn ŝi priŝtelis, ankaŭ ekspluatante

sian belecon. Kvazaŭ vekiĝinte el sonĝo, la dommastrinoj de la priŝtelitaj familioj levis hejman krizon unu post alia.

Malboniĝis la voĉo de Je Ĉiŭ. Ĉu la kuracisto fuŝis la operacion, aŭ li mem ne bone protektis la voĉon, la kaŭzo restis malfacile trovebla. Sed li ŝajne ne rigardis la aferon grava kaj rezignis sian oficon en la ensemblo. Antaŭ la Printempa Festo oni vidis lin vendanta siajn pentraĵojn. Post nelonge Juhŭa subite sin maldungis kaj iris hejmen. Neniu sciis la kaŭzon. Oni kompatis ŝin pro ŝia stulteco.

Post Juhŭa venis nova balais-tino mezaĝa. Kun paso de tagoj, pli kaj pli fortiĝis la sopiro de la loĝantoj de la korto al Juhŭa. Kio do estis la kaŭzo? Neniu povis respondi.

Esperantigis ŬANG ŜIJONG

\* *Surnao: hoboiforma ĉina blovmuzikilo, kun altaj sonoj.*

# Tropika musona arbaro de Ĉinio

Sub la influo de la sudokcidenta musono de la Hindia Oceano kaj la sudorienta musono de Pacifiko, en la ĉina regiono sude de la tropiko de la Kankro regas intertropika klimato alt-temperatura kaj alt-humida, kio tre favoras la tropikajn vegetaĵojn. Sur la fekunda grundo pompe kreskas diversaj vegetaĵoj, kiuj formiĝas en ĉiamverdan tropikan plubarbaron. En la naturparkoj Ŝjiŝŭangbanna de Junnan-provinco kaj Ĝjanfengling de la insulo Hajnan konserviĝas ne nur granda areo da tropika primitiva arbaro, sed ankaŭ kompleta tropika faŭno.

La naturparkoj situas ĉe la tropiko de la Kankro, la norda ekstremo de la tropika zono, tial iliaj aspekto, strukturo, speco


k.a. diferencas de tiuj de la ekvatora plubarbaro. Precipe la klimato kun klara diferenco inter la sekeco kaj malsekeco, formita de la tropika musono, kaŭzas mallongan kaj koncentran foliŝanĝan periodon al la arboj sur la altaj lokoj en naturparkoj. En botaniko tia arbaro nomiĝas tropika musona arbaro.

La tropika musona arbaro estas rigardata kiel trezorejo de vegetaĵoj. La naturparko Ŝjiŝŭangbanna, situanta sude de la paleokontinento, ne estas influita de la kvaternaraj glaci-riveroj, kio ebligis al nemalmultaj primitivaj kreskaĵoj fekundiĝi kaj evolui. Pro tio tie dense kreskas abundaj vegetaĵoj kaj diversformaj vegetalaj sistemoj, kiuj formiĝis en plurtavolan tro-

pikan musonan arbaron. En la loko troviĝas pli ol 4 000 specioj de altklasaj vegetaĵoj, inter kiuj estas pli ol 200 specioj de manĝeblaj vegetaĵoj, 300 specioj de drogherboj, 100 specioj de oledonaj vegetaĵoj, 100 specioj de valoraj arboj, 50 specioj de bambuoj kaj 10 specioj de lianoj.

La naturparko Ĝjanfengling, kun alto de malpli ol 100 ĝis 1 332 m. super la marnivelo kaj jara pluvokvanto de ĉ. 1 500-2 000 mm. situas sudokcidente de la insulo Hajnan kaj estas 12 km. for de la marbordo. En la naturparko prosperas antikvaj arboj, interkruciĝas lianoj kaj veproĵoj kaj dense kreskas diversaj vegetaĵoj. Tie kreskas pli ol 2 000 specioj de vegetaĵoj, el kiuj pli ol 1 000 estas arboj kaj arbedoj. Plejofte vidiĝas diversaj banjanoj, jambosoj, kamforarboj, rubioj kaj fabacoj. Krome, tie kreskas ankaŭ multe da valoraj vegetaĵoj kuracaj, aromaĵaj fibraj, kaŭĉuk-donaj, taninaj kaj amel-donaj. Cefalotaksuso (*Cephalotaxus hainanensis*) estas grava kontraŭkancera vegetaĵo. Plurspecaj alkaloidoj ekstrakteblaj el ĝi estas gravaj substancoj por fari medikamenton, kiu kuracas leŭkemion kaj iujn aliajn kancerajn.

En la tropika musona arbaro la arboj kreskas laŭeble alten por asimili sunlumon kaj aeron. En la primitiva arbaro, la perimetro de arboj ordinare superas 50 cm, iuj arboj eĉ dikas 3-4 m., kaj



*Herboj kreskantaj  
sur arbotrunko*



ĝenerale altas 30-35 m, iuj eĉ pli ol 45 m. Tiom altaj arboj ne povas firme stari sur sia ĉefradiko. Tial ili kreskigas multajn radioformajn flankradikojn sur la trunkoj plurajn metrojn super la tero, kiuj etendiĝas plate je kelkaj metroj foren kaj subtenas la arbojn. Tia interesa fenomeno ne videblas en la arbaroj de la varmetaj zonoj. Ili formas apogilan strukturon.

Multaj arboj en la musona arbaro diferencas de la ordinaraĵoj en la varmetaj zonoj en florado kaj fruktado. Ekz. la fruktoj de banjano, bakaŭreo (*Baccaures ramiflora*), agapetesmoreo (*Agapetesmorei*), anono (*Annona squamosa*) k.a. ne pendas sur flankŝosoj, sed sur maljunaj dikaj trunkoj. La fruktoj, grandaj kaj brilaj, dense kreskas sur la trunkoj. En botaniko oni nomas tiun eksterordinaran fenomenon "maljuna tigo floras kaj fruktas". Iuj fruktoj aŭ kreskas sur trunkoj, aŭ eliĝas rekte el la tero kiel bambuaj ĝerموj. La florado kaj fruktado de tiuj vegetaĵoj karakterizas la tropikan arbaron per mistera koloro.

En la tropika musona arbaro kreskas sub la altaj arboj multaj mallumorezistaj arbedoj, herboj, pteridoj kaj aliaj vegetaĵoj. La folioj estas grandaj kaj maldikaj, iuj el ili estas pli grandaj ol homo. En malluma kaj humida densa arbaro malbonodoras velkaj branĉoj kaj putraj folioj, ĉie senorde kuŝas velkaj arboj, inter kiuj kreskas tiaj herboj kun eksterordinare grandaj folioj kaj altaj pteridoj. En ĝi estas malfacile iri kaj por iri antaŭen oni devas haki al si la vojon.

La lianoj, parazitoj kaj epifitoj faras la arbaron pli bela. Sen rekta ĉeftrunko la lianoj ja alkroĉas siajn ĉirojn, dornojn, suĉilojn kaj kromradikojn al la branĉoj de aliaj arboj, rampas pli

kaj pli alten kaj konkuras kun aliaj arboj por sunlumo kaj aero. Iuj lianoj interkroĉiĝante pendas sur la branĉoj de altaj arboj kiel trapezo, aliaj strikte volvas sin ĉirkaŭ dikaj arbotrunkoj kiel boao kaj triaj kuniĝas en cirklo aŭ aliajn formojn. Vere ravaj kaj belaj formoj! La epifitoj kaj parazitoj kreskas sur la trunkoj kaj eĉ folioj de aliaj vegetaĵoj, sekve de tio, prezentiĝas stranga fenomeno, ke arboj kreskas sur arboj kaj herboj sur folioj. Botanikistoj nomas ilin intertavolaj vegetaĵoj pro tio, ke ili ne povas formi certan tavolon en la arbaro. Troviĝas multaj intertavolaj vegetaĵoj, kiaj algo, musko, likeno, fabacoj kaj aliaj vegetaĵoj. Iuj el ili dum florado pendigas siajn florojn malsupren de la dependa arbo kiel pendflorkorbon. En la tempo de florado tie vidiĝas multaj florantaj pendflorkorboj diverskoloraj kaj graciaj.

En la tropika musona arbaro oni povas trovi la strangan vidaĵon "unu banjano faras forston". Banjano kun dika trunko kaj grandega krono havas multajn kroĉradiketojn, kiuj penetras en la teron kaj iom post iom dikiĝas asimilinte nutraĵon. Tial sub la giganta krono multaj trunkformaj subteniloj ĉirkaŭas la ĉefan kronon de la banjano kaj formas interesan bildon.

Pli mistera estas strangola vegetaĵo, alia specio de banjano. De sia naskiĝo ĝi kreskas sur alia arbo. En varma kaj humida medio la semo ekĝermas kaj elkreskas kroĉradiketoj el la plantido, kiuj sin etendas malsupren de la dependa trunko, rekte en la teron. Ĝi povas per si mem fari fotosintezon, tamen ĝi preferas ricevi nutraĵon de la dependa arbo tiom longe ĝis tiu lasta mortos pro sekiĝo. La

mortinta vegetaĵo putriĝas kaj defalas, tiel ke la altaj strangolaj vegetaĵoj kun multaj truoj ĉe la meza parto prezentas belan kaj strangan formon.

La tropika musona arbaro estas ankaŭ trezorejo de la tropikaj bestoj. Modera klimato, abunda vegetalaro donas bonajn kondiĉojn al la multspecaj bestoj por ilia vivo kaj generado. Ŝjiŝuangbanna estas unu el la lokoj kun abundaj bestoj en Ĉinio. Tie vivas 62 specoj de bestoj, pli ol 400 specoj de birdoj, kiuj konsistigas trionon de la specoj de la birdoj en Ĉinio. El ili 70 specoj estas propraj al Junnan-provinco, ĉ. 100 specoj de fiŝoj kaj 32 specoj de amfibioj. En la primitiva arbaro moviĝas tien kaj reen sovaĝaj elefantoj, kiuj ne videblas alie en Ĉinio. Sovagaj bovoj, lorisoj, urso-makakoj (*Macaca assamensis*), zibetoj, galinoj (*Gallus gallus jabouillei*), verdaj pavoĵoj, bluflugilaj pitoj (*Pitta brachyura*) k.a. estas raraj bestoj en Ĉinio. En tiu regiono inter la primatoj la blankvanga gibono, alte evoluinta besto, jam estas difinita kiel unuaklasa besto protektata de la ŝtato.

En la arbaro de la naturparko de Ĝjanfengling diversaj bestoj fekundiĝas unuj post aliaj kaj konsistigas siajn familiojn. La nombro de la birdoj de 143 specioj estas la plej granda en la arbaro. El la 28 specoj de la bestoj la nombro de nigrakronaj gibonoj, unu el la kvar antropoidoj, plej raraj, estas nur 20-30. Ili estas listigitaj kiel unuaklasaj bestoj protektataj de la ŝtato. Krome, la nubleopardoj (*Neofelis nebulosa*), leopardaj katoj, cibe-katoj, makakoj, galinoj, pavoĵoj, fazanoj k.a. ĉiuj estas gravaj bestoj kaj birdoj protektataj de la ŝtato. □




# La Naturparko Ŝjiŝuangbanna

Fotoj de LIU SIGONG

*Tropika arbaro*

*Cielskrapantaj arboj protektataj de la ŝtato*


La naturparko Ŝjiŝuangbanna en Junnan-provinco, Ĉinio, kovras 241 776.2 hektarojn kaj havas altan temperaturon kaj abundan pluvon. En ĝi interkruciĝas riveroj, ĉenas montoj kaj sterniĝas basenoj. Ĝin atakas nek frosto nek tajfuno. Ĝia klimato estas kontinenta kaj oceana. En la naturparko prosperas vegetaloj kaj vivas bestoj de multaj specioj. Tial ĝi estas konata kiel regno de la vegetaloj kaj natura zoo. Tie oni trovis jam pli ol 4 500 speciojn de altklasaj vegetaloj. Tie ne mankas tropikaj kaj subtropikaj arbaroj, kiaj pluv-arbaroj en valoj kaj sur kalkaj montoj. En la arbaroj kamforarboj, muskoj, grimpoplantoj, sufokaj vegetaloj kaj multaj aliaj arboj formas misteran verdan mondon. Tie vivas elefantoj, tigroj, leopardoj, sovaĝbovoj, simioj, gigantaj lacertoj, nigraj pitonoj, nigraj procionoj kaj aliaj raraj bestoj. La naturparko estas protektata de la ŝtato.








*Maljuna trunko fruktas.*



*Reĝo de la palmoj*




*Arboradikoj*

*Gigantaj lacertoj*







*Arbaro sur kalka monto*

*Pavo*





# Poŝtmarkoj pri Infanoj

de LU SJANG



## ĈINAJ POŝTMARKOJ

3% de la ĉinaj memorigaj kaj specialaj poŝtmarkoj temas pri infanoj. La serio "Ni Amas Sciencon ekde la Infaneco" el ses pecoj (supre-maldekstre) estis emisiita en 1979, la serio "Infanaj Pentraĵoj" el kvar pecoj (supre-dekstre) emisiita en 1983 kaj la serio "Ni Ekzercas Nin por la Revolucio" el kvin pecoj (malsupre-maldekstre) emisiita en 1978.



## LA NACIA EKONOMIO DE ĈINIO STABILE DISVOLVIĜIS EN 1986

Laŭ la statistika komuniko pri la nacia ekonomio kaj socia disvolviĝo de Ĉinio publikigita antaŭ nelonge de la Ŝtata Statistika Buroo de Ĉinio, la totala socia enspezo de Ĉinio en 1986 estis 1 877 400 milionoj da jŭanoj, je 9.1% pli multe ol tiu en 1985; kaj la nacia enspezo — 779 000 milionoj da jŭanoj, la totala produktovalororo de industrio kaj agrikulturo — 1 510 400 milionoj da jŭanoj kaj la totala nacia produktovalororo — 938 000 milionoj da jŭanoj, je 7.4%, 9,3% kaj 7.8% respektive plimulte ol tiuj en 1985.

## LA PLEJ GRANDA ŜIPO DE ĈINIO KONSTRUATA

118 000-tonela naveta cisternŝipo, la plej granda kaj plej avangarda en Ĉinio, estas konstruata en la Ŝipfarejo de Daljan en la nordorienta parto de Ĉinio.

La ŝipo kun monde avangarda ekipaĵo kaj konstruata per mondnivela tekniko. Ĝia aŭtomata lokaliza sistemo senekzemple portos marfundan sonaro-aparaton. Ĝia ĉefmotoro kun povo de 6 525 kilovattoj estas du porŝipaj ĉefdizeloj plej avangardaj internacie, faritaj de la Daljan-a Ŝipdizela Fabriko. La ŝipo 260 metrojn longa vetūros plenŝarĝita 14 marmejlojn hore.

## LA ĈINGHAJ-TIBETA SOSEO REKONSTRUITA

Nun oni ŝanĝis la gruzan Ĉinghaj-Tibetan Ŝoseon, plej altan super la marnivelo, en larĝan asfaltitan vojon kaj anstataŭigis per novaj la malnovajn aŭtomobilojn, kiuj veturadis longe sur tiu ŝoseo. Por traveturi la 1 100-kilometran ŝoseparton inter Golmud, nova urbo de Ĉinghaj-provinco, kaj Lhasa, la ĉefurbo de la Tibeta

Aŭtonoma Regiono, aŭtobuso antaŭe bezonis kelkajn tagojn, sed nun nur unu tagnokton.

## LA KOTONA EKSPORTOKVANTO DE ĈINIO OKUPIS LA DUAN LOKON EN LA MONDO

Rimarkinde kreskis kun ĉiu jaro la eksportokvanto de ĉina kotono, kiu ekvendiĝis en la internacia merkato antaŭ kvar jaroj. Ĉinio okupis la duan lokon tiurilate en 1986, nur post Usono.

## ĈINIO INVESTIS EKSTERLANDE PLI OL 200 MILIONOJN DA USONAJ DOLAROJ

Laŭ anonco de novaĵ-oficisto de la Ministerio de Eksteraj Ekonomiaj Rilatoj kaj Komerco de Ĉinio, ĝis la fino de 1986 Ĉinio sankciis starigi entute 277 entreprenojn ĉinajn kaj ĉinalilandajn, kun totala investa sumo

de 400 milionoj da usonaj dolaroj, el kiuj 230 milionoj estis investitaj de Ĉinio.


## ĈINIO RIMARKINDE SUKCESIS EN ESPLORADO PRI SUPERKONDUKTANTO

Dum diverslandaj fizikistoj konkure penis serĉi superkonduktanton de hipera kriza temperaturo, esplora grupo gvidata de Ĝaŭ Ĝongŝjan kaj Ĉen Liĉjŭan, vicesploristoj de la Fizika Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, akiris en la fino de 1986 superkonduktanton kun kriza temperaturo de 48.6 kaj je la 20-a de februaro 1987 superkonduktanton kun kriza temperaturo de pli ol 100 K. La 10-an de marto esplorantoj de la Ĉina Scienc-teknika Universitato pli progresis tiuflanke. Fakuloj opiniis, ke kvankam la superkonduktanto de la universitato havas krizan temperaturon de 110 K, tamen

*Kampanoj de Tjanmen-gubernio, Hubej-provinco, uzas nutrodonajn potojn kaj plastajn membranojn por kulturi plantidojn.*








*Scienc-esploristoj diskutas pri eksperimentaj rezultoj de superkonduktantoj.*

ĝi povas bone efiki ĉe 130 K. Ĝi jam enviciĝis inter la avan-

gardaj superkonduktantoj en la mondo.

*Enladiga produktolinio de la Congĉing-a Fabriko de Trinkaĵoj*



Superkondukto estas fenomeno, ke la rezistanco ĉe iuj objektoj tute malaperas en malalta temperaturo. La transira temperaturo estas tiu, en kiu objekto kun rezistanco transiras al tiu sen rezistanco. En scienco ĝi estas signata per  $K. 0 K$  egalas al  $273^{\circ}C$  sub la nulo.

Superkondukton oni aplikas multflanke, plejofte por fari superkonduktan magneton, kiu havas potencon magnetan kampon, malgrandajn volumenon kaj pezon kaj ŝparas energion. Superkonduktan magneton bezonas altenergia akcelilo por akceli korpusklojn, nukle-magneta resonanca bildoformiga aparato por konstati homajn malsanojn kaj artefarita satelito por serĉi ercojn.

### **ĈINIO LUIGOS SIAJN REVENIGEBLAJN SATELITOJN**

Laŭ peto de eksterlandaj klientoj Ĉinio luigos siajn revenigebajn satelitojn. En la internacian

merkaton iris du specoj de ĉinaj satelitoj FS — I kaj FS — II, kun efika ŝarĝkapablo de 300 kaj 500 kilogramoj respektive. Eksterlandaj klientoj povas lui ĉinajn revenigebajn satelitojn aŭ veturpeti por fari diversajn efikajn kosmajn eksperimentojn per ŝarĝita satelito

De post 1975 Ĉinio sukcese lanĉis kaj surterigis ok revenigebajn satelitojn. Ĝis nun ĝi perdis neniun tian sateliton. La ĉina servo celas vigligi per internaciaj komercaj rilatoj la internacian kunlaboron en kosmonaŭtiko kaj ĝian interŝanĝon kaj kontribui al la homa paca utiligo de la ekstera spaco. Pro tio Ĉinio ellaboros rimedojn favorajn al la klientoj.

### **NOVTIPA PAROLPOVA KOMPUTILO**

Kiam komputilisto enmetas tekston, komputilo tuj aŭdigas ĝin. Ĝi estas nova han-lingva inform-trakta sistemo. La hardvaro de la Aparato-Kompanio de Tek-saso, Usono, estas funkciigata per la softvaro de la sistemo provfarita de ĉinaj sciencistoj. Ĝi povas akcepti pli ol 6 000 ĉinajn ideogra-

fiaĵojn kaj la literojn latinajn, anglajn, rusajn kaj japanajn kaj paroligi ilin en tri rapidecoj.

### MULTIĜIS ĈINAJ TONIKAJ MANGAĴOJ KAJ TRINKAĴOJ

Ĉinio havas pli ol mil specojn de tonikaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj. Al la merkato oni liveras serion da produktaĵoj de abelreĝina gelateno, poleno, kratagfruktoj, fungoj kaj hipofao (*Hippophae rhamnoides*). Rimarkindas la sukceso en esplorado de amorfofalo (*Amorphophallus rivieri*) kaj nutrodonaj mineraloj. Prosperas la produktado de tonikaj trinkaĵoj, kiaj Tjanfu-kokakolo, Ŝaŭlin-kokakolo kaj Tjanci-pirsuko. Progresas la produktado de manĝaĵoj vizaĝobeligaj, graso-reduktaĵoj, kontraŭkadukaj, sanigaj por maljunuloj kaj nutraj por infanoj kaj manĝaĵoj por aparta uzo. Nun funkcias ĉ. mil tiurilataj fabrikoj.

### HISTOKULTURADO DE KAKAOPLANTOJ

Dekkelkaj kakaoplantoj, la unuaj tiaspecaj plantoj en la mondo, kulturataj per histokulturo, estis transplantitaj en grundon. Kunlaborante kun esplorantoj de la DNA-a Botanikteknika Kompanio de Usono la ĉina fakulo Ĉen Ĝenhŭa atingis la sukceson.

### PISTOLETO KONTRAŬ RABISTOJ

Ĉinio inventis kaj ekproduktis pistoletojn por armitaj policianoj kontraŭ aviadil-rabistoj kaj teroristoj. Tia pistoleto, en grandeco de mano kaj pezo duone malpli granda ol tiu de la ordinara, estas la plej malgranda el la pistoloj faritaj de Ĉinio kaj imuna kontraŭ akvo, alta kaj malalta temperaturoj. Ĝia speciale farita kuglo ne truas tegaĵon kaj kajutfenestron de aviadilo. Tia pistoleto estas taŭga por venki aviadil-rabistojn kaj teroristojn.

### PLI OL MIL ĈINAJ GUBERNIOJ POPULARIGIS ELEMENTAN EDUKON

El la pli ol 2 000 ĉinaj gubernioj 1 050 jam popularigis elementan edukon. 130 milionoj da ĉinaj infanoj vizitas elementajn lernejojn, kaj en la 93 000 ĉinaj mezlernejoj lernas 49 milionoj da geknaboj.

Laŭ statistiko 96.4% de la ĉinaj lernaĝaj infanoj jam vizitas lernejojn, kaj 97.1% de la lernantoj persistas en la lernado.

### REKUNIĜIS MANO DEROMPITA ANTAŬ 54 HOROJ

Antaŭ nelonge okazis, ke la maldekstra mano de 16-jara lernantino de Gansu-provinco estis detranĉita. Ŝi estis tuj portita al proksima hospitalo, kie oni traktis ŝian vunditan brakofinon, ne replantis la rompitan manon, sed konservis ĝin en fridujo. Poste iu hospitalo de Lanĝoŭ faris al ŝi operacion por rekunigi la manon. Recirkulis la sango en la mano post 54 horoj, dum kiuj la mano estis ekster la korpo. Antaŭ tio la monda rekordo tiuflanka estis 36 horoj.

### RUINO DE ANTIKVA URBO TROVITA UNUAFOJE EN NORDA ĈINIO

En la pasintaj jaroj ĉinaj arkeologoj trovis en norda Ŝenŝji-provinco, Ĉinio, ruinojn de urbo, en kiu vivis la ĉina nacimalplimulto Gujfang antaŭ 2 800—3 300 jaroj. La urbo estis 131 metrojn longa, kun murego pli ol unu metron alta. Ĝi prezentas neregulan ortangulon, kun totala areo de pli ol 10 000 kvadrataj metroj.

Gujfang estis antikva potenca nacimalplimulto en norda Ŝenŝji kaj nordokcidenta Ŝanŝji de Ĉinio.

### PLI OL 100 ĈINAJ ARTAJ TRUPOJ VIZITOS ALIAJN LANDOJN

La Ĉina Ekstera Impresaria Kompanio en 1987 organizos pli ol 100 ĉinajn artajn trupojn por prezenti eksterlande, inkluzive de la Ĉina Arta Trupo, Centra Kantadanco Ensemblo, Centra Filharmonio, Gŭangdong-opera Trupo de Gŭangdong, Pupteatra Trupo de Ĝangĝoŭ, famaj akrobataj trupoj, Ĉaŭĝoŭ-operaj trupoj kaj aliaj. □

*Lernantoj de la Centra Elementa Lernejo de Ĝindistrikto, Ĝinghong-gubernio, Junnan-provinco*



## DIAGNOZO DE KURACISTO (HUMURAĴO)

Iu mezaĝulino vizitis kuraciston. Kiam la lasta ŝin demandis pri la aĝo, ŝi, por ŝajnigi sin juna, respondis: "Jam 20-jara." Do, la kuracisto skribis sur la kajeron de medicina registro: "Ŝi perdis la memorkapablon."

## SERĈU



Bonvolu serĉi en la bildo, al kiu arbo la ŝnuro ligis la bovon. (Solve trovebla en ĉi numero)

## RECIPROKA DEPENDO

### (EKSPERIMENTO)

Materialoj: 3 dikaj provtuboj kun korko, 2 helikoj, 2 akvaj plantoj, 1 pura pelvo.

Maniero: Plenigu la pelvon per akvo kaj ĝin metu en malvarmetan lokon por 48 horoj. Metu helikon en provtubon kaj donu al ĝi akvon je  $\frac{2}{3}$  de la tubo, ĝin hermetike ŝtopu per adhera rubando. Metu unu akvan planton en la duan, kaj helikon kaj 1 akvan planton en la trian, kaj ilin hermetike ŝtopu post dono de sama kvanto da akvo.

Metu la 3 tubojn en lokon helan, tamen sensunan. Post kelkaj tagoj, la vivaĵoj en la unua kaj dua tuboj mortos, sed la heliko kaj akva planto en la tria restos vivaj.

Principo: La animalo kaj la planto dependas unu de la alia. La planto donas al la animalo nutraĵon kaj oksigenon, dum la animalo al la planto nutron kaj karbonan dioksidon.

## FLUGA DRAKO KUN PERLO

Preparado: 1. Bildo: Desegnu sur kartono flugan drakon levigantan al la ĉielo super furioza maro kaj eligantan perlon el la buŝo. 2. Kunligu la drakon konturitan de nuda kupra drato kun baterio, metala bastoneto kaj elektra sonorilo. La perlo, formita el drato, estas ligita kun metala bastoneto, lampo kaj alia baterio.

Ludmaniero: La ludanto trapasigas la metalan bastonon tra la korpo de la drako. Se la bastono tuŝos la nudan kupran draton, sonoras la sonorilo, do li malsukcesos. Se li kontaktos per la bastono tra la drako la perlon (lampon), kaj tiu brilos, do li sukcesos.

## ENIGMOJ

1. Rigardate, ĝi ne ekzistas. Palpate ĝi estas. Aspektante kiel glacio, ĝi ne degelas sub la suno. Aspektante kiel akvo, ĝi ne fluas. (Objekto)

2. Melono plena de desegnoj estas piede frapebla, sed ne tuŝebla mane. (Sporta uzaĵo)



(Solvej troveblaj en ĉi numero)

de MJAŬ ĜJAJEN (Ĉinio)

## KARIKATURO

(sen temo)

de TOMISLAV MITROVIĆ  
(Jugoslavio)





# Ĉe Tongtjan-rivero

Teksto de DA ŬEJ

Fotoj de CAJ HAJFENG

La malsupra parto de la riveroj Tŭotŭo kaj Damĉju estas nomata ankaŭ Tongtjan-rivero, la lokaj tibetanoj nomas ĝin Ĝuĉju, kun la signifo de "lakto de bovino" en la tibeta lingvo. Legendo diras, ke antikve Juŝu-regiono estis tre bela, eĉ pli bela ol la paradizo. Tie ŝvebis blankaj nuboj sur la lazura ĉielo kaj paŝtigis gregoj da bovoj kaj ŝafoj sur la vasta stepo. Pri tio informiĝinte, la Ĉiela Imperiestro flamis de kolero kaj ordonis al dia bovido malsupreniri al la homa mondo, formanĝi ĉiujn verdajn herbojn en tri tagoj kaj difekti la akvofontojn. Sed la dia bovido raviĝis de la bela homa mondo kaj bonkoraj homoj. Ĝi muĝis trifoje, ŝprucigis el siaj naztruoĵoj du kolonojn da lakto, kiuj fluis laŭ montoj al la stepo. La akvo verdigis la her-

bojn kaj grasigis la brutojn. Sed la dia bovido estis transformita de la Ĉiela Imperiestro en grandan rokon, kiu ĉiam kuŝis sur Ĉinghaj-altebenaĵo. La de ĝi ŝprucigitaj fontoj fine formis la riverojn Tŭotŭo kaj Damĉju.


## NATURA STEPO


Estas granda natura stepo la baseno de Tongtjan-rivero, etendiĝanta pli ol 800 km. La montoj kaj sovaĝejoj sur Juŝu-altebenaĵo estas kovritaj de verda herbo. Tie malmultas kalvaj montoj kaj dezertoj, kaj la naturaj herbejoj estas la ĉefa parto de la vegetaĵoj de Juŝu. La nombro de ĝiaj diversaj herbejoj utiligeblaj atingis pli ol 8.93 milionojn da hektaroj, kiuj konsistigas 27% de tiuj de Ĉinghaj-provinco. La areo de la herbejoj kaj ĝiaj po-

hektaraj brutoproduktaĵoj okupas la unuan lokon en la provinco respektive. Ĉiu 6.6-hektara herbejo en Ĉinio ebligas paŝti meznombro 25.5 brutojn, sed tiu en Juŝu-subprovinco 47.48 brutojn.

Sur la paŝtejoj apud Tongtjan-rivero paŝtigas multnombraj gruntbodyoj kaj tibetaj ŝafoj. La Juŝu-tipa gruntbodyo estas rara bovo-specio sur la frosta altebenaĵo kaj la tibeta ŝafo estas la sola ŝafo-specio akomodiganta al la alt-frosta medio. Ili estas du gravaj faktoroj en la brutobredado de Juŝu. La regiono ĉiujare liveras al la ŝtato pli ol 5 milionojn da kilogramoj da bovaĵo kaj ŝafaĵo.

De antikve la gruntbodyo senĉese liveras al la lokaj tibetanoj vivbezonaĵojn. Ĝiaj viando, lakto kaj laktaj produktaĵoj butero kaj ĉjula (manĝaĵo, malpli bona ol butero) estas ĉefaj manĝaĵoj de la paŝtistoj. Ĝia hararo estas prilaborita en feltojn, el kiuj oni povas fari tendojn kaj sakojn. Ĝi estas ankaŭ ĉefa veturilo de la tibetanoj. Ĝi povas sekure iri sur neĝmontoj 5 000 m. altaj super la marnivelo kaj sur kru-taj vojetoj. Tial ĝi ĝuas la renomon "ŝipo sur neĝmonto" de antikve. Ĝia fekaĵo estas nemankigebla hejtaĵo por tibetanoj. Tial la paŝtistoj aparte ŝatas ĝin. Oni rakontis al mi: Kvin lupoj venis al la ŝafostalo





*La unua pramejo ĉe la supra Jangzi-rivero*

de iu paŝtisto, sed lia gruntbovo baris per sia granda korpo la vojon ĉe la pordo. En la intensa luktado la gruntbovo mortigis 3 lupojn, kaj ĝi ne povis moviĝi pro grava vundiĝo. Kiam la mastro haste alvenis, ĝi ankoraŭ staris ĉe la pordo. Ĝi mortis, sed la ŝafoj estis savitaj. Larmis la mastro.

### **HIDROELEKTREJO KAJ PRAMEJO**

En 1982 stariĝis hidroelektrajo sur Tongtjan-rivero en Ĉumarleb-gubernio, nordokcidente de la urbo Juŝu.

En bruo de la dinamoj mi eniris la hidroelektrajon, la unuan ĉe la fonto de Jangzi-rivero.

Kelkaj junuloj deĵoris tie, unu el ili laŭvoĉe interparolis kun mi manfrotante. Li diris, ke la elektrajo estas administrata de 11 junuloj. Ĝi situas 4 006 m. super la marnivelo. Kanalo 6 km. longa kondukas akvon de Tongtjan-rivero en la elektrajon kaj la riverakvo havas niveldiferencon de 12 m. La du genera-

toroj ĉiu kun kapacito de 320 kilovattoj ĉiumonate produktas pli ol 300 000 kWh da elektro por kontentigi la bezonon de produktado kaj la popola vivo de la gubernio.

Starante sur la plej alta loko de la elektrajo, mi vidis, ke la montoj ĉe ambaŭ bordoj estas arĝente vestitaj per la ĵus falinta neĝo, Tongtjan-rivero tie faras kurbiĝon kaj sin turnas sudorienten. La torenta Jangzi-rivero entenas grandan riĉfonton de akvo, nur malgrandan parton de ĝi oni nun ekspluatas kaj utiligas. Ne subtaksu la hidroelektrajn malgrandan kun 11 laborantoj kaj du milionoj da kWh produktitaj jare. Ĝi ja estas la komenca parto de la granda elektro-reto de Jangzi-rivero. Krom ĝi funkcias multaj hidroelektrajoj grandaj kaj malgrandaj, kiuj donas potencon energian al la baseno de Jangzi-rivero.

Forlasinte la elektrajon, mi iris antaŭen ĉ. 4 km. laŭ la rivero kaj venis al la unua pramejo de Tongtjan-rivero.

Unu ŝtala kablo estas super la rivero. Unu el ĝiaj ekstremoj estas fiksita al monta roko kaj la alia ligita kun ligna skafaldo, sur kies malsupra parto amasiĝas ŝtonegoj kiel kontraŭpezo. La pulio sur la ŝtala kablo ligiĝas kun malnova pramo. Jen la tuta ekipaĵo de la pramejo. Antaŭ la jaro 1970 la simpla pramejo transveturigis la varojn kaj materialojn liveritajn de diversaj lokoj al la aliborda Ĉumarleb-gubernio, malrapide kaj nesekure. En la fino de 1983, kiam formiĝis reto de simplaj ŝoseoj ligantaj la guberniojn kun Ĝjegu-urbeto, kiel la centro, kie sidas la Juŝu-subprovinca registaro, la pramejo fariĝis ne tiel vigla. Nur malmultaj homoj transpasas tie la riveron.

Mia juna akompananto de la elektrajo malligis la kablajn enpramigis min. Li iom turnis la pramon, tiel ke la pramo iom oblikviĝis en la fluo. La pramo, puŝata de la akvo kaj kondukata de la pulio sur la kablo, glitis malrapide al la kontraŭa bordo. Ekster mia atendo, ke sur la simpla ekipaĵo oni saĝe

utiligis la meĥanikan principon. Mi informiĝis, ke antaŭ kelkaj jaroj tie renversiĝis pramo, sed tio estis tute hazarda.

## ĈUMARLEB — STEPA URBO

Transpasinte Tongtjan-riverson, mi venis al la gubernia urbo Ĉumarleb, stepa urbo ĉe Seuĉjubranĉo de Tongtjan-rivero. Antaŭe ĝi estis paŝta punkto kun feltaj tendoj. Tiam la tibetaj paŝtistoj ĉiam vivis kiel nomadoj. Epidemio, neĝego kaj herbomalsufiĉo portis al ili grandan suferon. Post la 50-aj jaroj la ŝtato asignis grandan monsumon por helpi la paŝtistojn en konstruado de paŝtejoj, preventado de epidemioj kaj fiksloĝa paŝtado, kaj la gubernio disvolviĝis iom post iom.

Respondeculo de la gubernio diris al mi, ke la antaŭa gubernia urbo de Ĉumarleb troviĝis en mallarĝa loko, ĉiam atakata de ventego, tial ĝi ne povis disvolviĝi tie. En 1979 la gubernia urbo translokiĝis al la nuna loko kun vasta tereno, krome ĝi estas malpli alta je 90 m. ol la antaŭa.

La nuna gubernia urbo vere estas en bona ordo. Brikdomoj staras ambaŭflanke de la larĝa kaj ebena strato. Tie ne troviĝas etaĝdomoj, la sola okulfrapa estas la pordo de la gubernia registaro, sur kiu estas inkrustitaj marmoraj platoj.

Mi miris, ke la stratojn vualas tavolo da densa nebulo. Pasantoj en malproksimo iras en

nebulo kaj jen vidiĝas jen malaperas, tio mistere impresis la novajn alvenintojn. La loko troviĝas 4 175 m. super la marnivele, kredeble kiam la fortaj sunradioj de la altebenaĵo vaporigas surteran humidan aeron, la frosta aero tuj turnas ĝin en nebulon.


En la urbo troviĝas magazenoj, hospitalo, restoracioj kaj kineto, sed la pasantoj estas tre malmultaj. En la loko kun areo de 28 000 kvadrataj kilometroj vivas nur pli ol 17 000 loĝantoj. Ne strange, ke la loko estas kvieta kaj ne vigla.

Ĉe Tongtjan-rivero de Juŝualtebenaĵo troviĝas ĉefa produkto de la blanklipa cervo, rara besto en la mondo. En Ĉumar-

*Paŝtistoj*







*En Ĉumarleb-hidroelektrejo*

leb estas bredejo kun 160 blanklipaj cervoj. Ili akomodiĝas al la medio de frosta altebenaĵo kaj havas altan valoron de aprecado kaj ekonomio. Ili estas tute flav-brunaj, escepte de la pure blankaj lipoj. La relative grandaj pezas je pli ol 100 kg. Oni antaŭ nelonge segis iliajn kornojn, tial mi vidis, ke ŝajne al ili io mankas. La blanklipa cervo estas ekonomie valora, la kornoj de vircervo kaj la placento de cervino estas valoraj medikamentoj. Bredisto diris al mi, ke

matura cervino ĉiujare naskas nur unu idon. Ĉiumatene la bredistoj rajdantaj sur ĉevaloj pelas la cervojn sur la stepon kaj vespere kondukas ilin en la bredejon. La blanklipaj cervoj estas tre amindaj. Vidinte min staranta antaŭ si, ili staris senmove kaj kun starigitaj oreloj rigardis min.

Ĉumarleb estas brutobreda gubernio, ĝiaj naturaj kondiĉoj estas relative malbonaj pro la alta situo kaj frosta vetero. Tial ĝia brutobredado longtempe ne

liberiĝis de la natura kateno. Antaŭ kelkaj jaroj, kontraŭ la leĝo de brutobredado, oni klopodis nur multigi la brutojn, sed neglektis la ekonomian efikon, ke multe pliigi la nombro de brutoj, kiun la stepo ne povis vivteni, tio kaŭzis multan perdon. En 1984 la gubernio forlasis kolektivitan produktadon, la unua efektivigis en la subprovinco respondecan sistemon en brutobredado kaj donis al la paŝtistoj la brutojn laŭkoste kaj la herbejojn laŭkontrakte, kaj la paŝtistoj mem bredis la brutojn. Dank' al tio la brutobredado de la gubernio pliboniĝis. Ankaŭ la reformo de produkta strukturo akcelis la disvolviĝon de diversspeca entreprenado kaj ebligis al la superflua laborfortoj labori laŭ sia speciala kapablo. Sekve de tio la gubernio fariĝis unu el la riĉaj gubernioj de la provinco.


En 1985 malofta, granda neĝŝtormo falis sur la stepon Ĉumarleb. Ĝi daŭris longe kaj suferigis vaste. En iuj lokoj neĝegis pli ol 50 horojn, la tavolo de la falinta neĝo estis dika je 0.66 m. Malgraŭ tio, ke la registaro plenenergie batalis kontraŭ la plago, la perdo estis serioza. Post la plago la riĉa Ĉumarleb fariĝis malriĉa, vivis de la ŝtata monhelpo, la produktado kaj vivo de la paŝtistoj malfaciliĝis. Sed la loĝantoj ne subiĝis al la natura plago. En la lastaj du jaroj ili faris grandan penadon por disvolvi la produktadon kaj denove riĉigi la hejmlokon.

En la baseno de Tongtjan-rivero ne ĉiam vidiĝas bela verda stepo kaj paŝtiĝas gregoj da bovoj kaj ŝafoj. Oni devas ĉiam sin prepari por batali kontraŭ la furiozaj ŝtormoj. □



*Gruntbovoj*


*Paŝtisto preparanta manĝon*







*Paŝtistoj sur stepo*



*Tibetaninoj*

*Saĵaro sur stepo* Foto de **PI DAŬEJ**







*Tongtjan-rivero*



*Blanktipaj cervoj paŝtataj*